
Jack Vance
Domo de l' Se

# Enhavoj

Kovrilo
Antaŭparolo
Titola Paĝo
Ĉapitro 1
Ĉapitro 2
Ĉapitro 3
Ĉapitro 4
Ĉapitro 5
Ĉapitro 6
Ĉapitro 7
Ĉapitro 8
Ĉapitro 9
Ĉapitro 10
Senpage Haveblaj
Atribuoj
Permesilo

# Antaŭparolo

**Vortaro:** Vidante vorton 'ĉi-aspektan' (sen citiloj), ŝvebu super ĝi per fingropinto aŭ muso kaj ekvidu, ke ĝi ŝanĝiĝos por aspekti 'tiel ĉi'. Per tio vi scios ke tiu vorto havas difinon en la provizita vortaro. Klaku ĝin por ekvidi ties difinon. Post legi la difinon, atentu pri la komenco-vorto de la difino, kiu aspektos kiel '**difin/o**'. Klaku tion por salti reire al la rakonto.

Se sur via aparato ligiloj ne aspektas kiel supere, tio rezultas de afero kie la niaj `CSS`-aj reguloj super-regiĝus fare de interna sistemo de via propra aparato: `Nook`, `Kobo`, `Kindle`, ktp. Do, substrekoj povas aperi *malgraŭ* niaj specifaj elektoj. Kulpigu la propran aparaton tiukaze.

Ni provis elekti mezan stilon post demandi ĉe Fejsbuko kaj alie pri diversaj personaj preferoj. Ni ja volas provizi elekton al ĉiu leganto. Bedaŭrinde, tio nuntempe ne eblas. Solvo devas atendi ĝis la plimulto el bitlibraj aparatoj subtenos la formaton `EPub 3,` kio permesos funkcion pri elekto inter stiloj pere de `JavaScript.` Sed `EPub 2,` per kio la plimulto el aparatoj ankoraŭ funkcias, ne ebligas tiajn elektojn.

Ni elektis difini nur la niaopinie maloftajn vortojn. Bonega helpo por esperantaj progresantoj, nur iometa helpo por komencantoj. Se viaopinie, plua vorto bezonas difinon, kontaktu nin, kaj ni aldonos.

Fine sciu, ke ajna leganto rajtas peti aldonon de plua defino en la vortaro. Kontaktu la eldonejon epoŝte or sugesti pri tio.

**Propraj Nomoj:** Plejparte ni lasis, ke propraj nomoj restu kiel eble plej proksimaj al la originalo. Tamen, por eviti falsajn sufiksojn '*-an*' ktp, ni opiniis tion dece, ke ni faru necesajn ŝanĝetojn.

**Angla Titolo:** La referenca originalo kiun ni tradukis devenas el volumo 5a el la 44-voluma eldono *Vance Integral Edition* (`ISBN 0-9712375-1-4`), kun la angla titolo *Chateau D'If*.

# Domo de l’ Se

*( angle, Chateau d'If )*

*verkita de*

# Jack Vance

*tradukita de*

**Ĝan Ŭesli Starling**
**&**
**Jan Pospíšil**

*re-eldonita je*

**2015-03-15**

# 1

LA REKLAMO APERIS sur teleekrana vendomontraĵo, kaj kelkajn tagojn poste sur flanko de la novaĵa fakso. La teksto estis verda sur nigra fono, rektangulo modesta inter la oranĝoj, ruĝoj kaj flavoj. Ĝia frapeco portiĝis ene de la mesaĝo mem:

Trosata? Enua?
Ĉu dezirante AVENTURON?
Provu la Domon de l’ Se’.

La Teraso Oksforda estis plaĉa loko de kvieteco en la koro de la urbo — ruĝaŝtone pavimita rektangulo surŝutita per strand-modaj sunombreloj, tabloj, pigraj homoj. Aro da magnoliaj arboj apartigis ĝin disde la strato kaj elfiltris la plimulton de la bruo; la tralasaĵo, mola sono kiel surfo, kuŝis sube de l’ konversaciado kaj la malregula *frap-frap-frap’* de la Oksfordaj manpilkadaj ludejoj.

Roland Mario sidis en tuta ripozeco, duone subfleksita, kapo klinita malantaŭen, piedoj apogitaj sur la tablo el interŝpinitaj aero kaj vitro — en tiu sama pozo kiel liaj kvar kunuloj. Rigardanta ilin de sub duone fermitaj palpebroj, Mario pripensis la antikvan misteron pri homa karaktereco. Kial estas ke homoj povas esti ĉiuj samaj kaj tamen ĉiu tute unika?

Ĉe lia maldekstro sidis Breŭ, riparisto de aritmetikiloj. Li havis longan ostecan nazon, rondajn okulojn, pezajn nigrajn brovojn, viro lerte kapabla per la fingroj, metoda kaj pacienca. Li havis kimran nomon, kaj li ŝajnis specimeni puran antikve kimran tipon, la etaj malhelaj viroj kiuj antaŭis Cezaron, antaŭis la keltojn.

Apud tiu sidis Janiver. Norda eŭropo, afriko, la oriento kombinis por formi liajn cerbon kaj korpon. Laboristo pri kontoj, li estis alta maldika viro kun flavaj haroj. Li havis longan vizaĝon kun trajtoj kiuj ŝajnis esti unue ĉizitaj kaj poste rondige kneditaj, malakrigitaj. Li estis zorgema, pripensema, kontraŭulo malfacile venkebla sur manpilkadejo.

Zaer estis la rapidulo, la plej juna el la grupo. Palahaŭta kun ruĝaj vangoj, malhelaj buklaj haroj, okuloj ĝojaj tiel, kiel Valenten-festaj amkartetoj, li parolemis pli, ridis pli ol ĉiuj aliaj, sed perdis foje la kolero-regon.

Apud li sidis Ditmar, sardona viro kun atentaj mallarĝaj okuloj, alta frunto, kaj malhele bronz-kolora haŭto de Polinezio, Sudano, aŭ Hindujo, aŭ Sudameriko. Li ludis neniom da manpilkado, konsumis malpli da kokteloj, pro malsano de l’ hepato. Li okupis bonpagan administran postenon ĉe unu el la televidaj retoj.

Kaj Mario mem, kiel ili rigardis lin? Li konsideris. Probable malsama bildo en ĉiu el iliaj mensoj, kvankam estis malmulte da pretendoj aŭ frapaj trajtetoj sur lia ekstero. Li havis nerimarkinde plaĉajn trajtojn, harojn kaj okulojn sendistingajn, haŭton meztipe ore brunan. Mezan staturon, mezan pezecon, kvietan parolmanieron, mildmodan vestaron. Li sciis ke, lin homoj ŝatas, almenaŭ laŭ tio, ke la vorto havis signifon inter la kvinopo; ilin cirkonstancoj kunigis ne tiom multe pro afableco kiom pro la manpilkadejo kaj komuna fraŭleco.

Mario konsciiĝis pri la silento. Li finis sian koktelon. “Ĉu iu pretas por biso?”

Breŭ faris geston jesan.

“Mi havas sufiĉe,” diris Janiver.

Zaer kline malplenigis algorĝe sian glason, surtabligis ĝin kun frapsono. “Je la aĝo de kvar jaroj mi promesis al la patro, ke mi neniam rifuzos drinkaĵon.”

Ditmar hezitis, poste diris, “Decas ke mi elspezu mian monon pri drinkaĵoj same kiel pri alia ajn.”

“Mono valoras nur por tio,” diris Breŭ. “Por aĉeti iom da ĝuo aldone al la vivo.”

“Multe da mono aĉetas multon da ĝuo,” diris Ditmar moroze. “Provu akiri la monon.”

Zaer gestis, larĝa, kaprica svingo de l’ brako. “Estu artisto, inventisto, kreu ion, konstruu ion. Ne troveblos bona futuro en laŭhora laborado.”

“Pripensu tiun ĉi novan aron da ĵus diplomitaj geniuloj,” diris Breŭ amare. “De kie, diable, ili originis? Ĉu el spontanea memgeneriĝo pro la agado de sunlumo sur ŝlimo?... Nun subite, ekestas nenio krom geniuloj, ĉie kien oni rigardas. DeSatz, Koli — atomistoj. Hon, Versoviĉ, Leki, Brul, Riĉardz — administroj. Gandelip, Neŭ, Kardosa — financistoj. Dekojn da ili, neniu pliaĝa ol dudek tri aŭ dudek kvar. Ĉiuj el ili alvenintaj tiel kiel meteoritoj.

“Ne forgesu pri Pit Zaer,” diris Zaer. “Li estas plua, sed li ankoraŭ ne meteoris. Lasu al li pluan jaron.”

“Nu,” murmuris Ditmar, “eble ĝi estas bona okazaĵo. Iu devas fari por ni la pensadon. Oni nutras nin, vestas nin, edukas nin, ni laboras ĉe nemalfacilaj postenoj, kaj bona drinkaĵo malmulte kostas. Jen ĉio, kion vivo signifas al naŭdek naŭ el cent homoj.”

“Nur se oni forigus la postebrion de la drinkaĵo,” sopiris Zaer.

“Drinkaĵo estas eskapilo for de l’ vivo,” diris Janiver sombre. “Ebrieco estas preskaŭ la sola aventuro kiu restas al ni. Ebrieco kaj la morto.”

“Jes,” diris Breŭ. “Oni ĉiam rajtas montri sian viv-malestimon per morti.”

Zaer ridis. “Viskio aŭ cianido. Lasu ke mia estu viskio.”

Freŝaj kokteloj aperis. Ili elskuis ĵetkubojn por decidi tion, kiu pagos. Mario perdis, surskribis la pagendan elspezon.

Post momento Breŭ diris, “Sufiĉe veras, tamen. Ebrio kaj la morto. La neprognozeblaj. La nuraj du lokoj kiuj pluestas por esplorado — almenaŭ krom se vi kapablas elspezi dudek milionojn da dolaroj por aĉeti interplanedan raketo-boaton. Kaj eĉ post vi alvenos, restos nur senviva roko tie.”

Ditmar diris, “Vi preterrigardis trian eblaĵon.”

“Kio estas?”

“La Domo de l’ Se.”

Ĉiuj sidis kviete; poste ĉiuj kvin ŝanĝis iom la sidopozon, kurbigis sin malantaŭen aŭ rektigis sin.

“Ĝuste kio estas la Domo de l’ Se?” demandis Mario.

“*Kie* ĝi estas?” demandis Zaer. “La reklamo diris ‘Provu la Domon de l’ Se,’ sed ĝi diris nenion pri kiel aŭ pri kie.”

Janiver gruntis. “Probable nur nova noktoklubo.”

Mario kapneis dubosigne. “La reklamo prezentis alian impreson.”

“Ĝi ne estas noktoklubo,” diris Ditmar. Ĉiuj okuloj svingiĝis al li. “Ne, mi ne scias pri kio ĝi estas. Sed mi scias pri *kie* ĝi estas, tiel nur ĉar jam dum du monatoj cirkuladis onidiroj.”

“Kiaj onidiroj?”

“Ho — nenio firme difina. Nur aludoj. Tiel ke *se* oni deziras aventuron, *se* oni havas la monon por tion aĉeti, *se* oni volas riski ŝancon, *se* oni havas neniom da respondecoj neforlaseblaj —”

“Se — se — se,” diris Breŭ kun rideto. “La Domo de l’ Se.”

Ditmar kapjesis. “Precize tiel.”

“Ĉu danĝere?” demandis Zaer. “Se ili estus farantaj nenion pli ol streĉi ŝnuron super fosaĵo plena je serpentoj, liberigi tigron ĉasi, kaj lasi al oni elekton inter transpaŝi ŝnuron kaj batali tigron, mi preferus sidi ĉi tie kaj trinki koktelojn kaj plani pri kiel mi venku Janiveron je la turniro.”

Ditmar ŝultrolevis, “Mi ne scias.”

Breŭ malridetis. “Povas esti drogejo, nova speco de bordelo.”

“Nenio tia ekzistas,” diris Zaer. “Ĝi estas hantita domo kun veraj fantomoj.”

“Se ni fantazias,” diris Ditmar, “intertempa veturilo.”

“Se,” diris Breŭ.

Estis mallonga medita silento.

“Estas iom strange,” diris Mario. “Ditmar diras ke estis onidiroj jam dum du monatoj. Kaj lastasemajne estis reklamo.”

“Kio estas stranga en tio?” demandis Janiver. “Aferoj sinsekvas tiel en ajna nova entrepreno.”

Breŭ diris haste, “Jen la ŝlosila vorto — ‘entrepreno’. La Domo de l’ Se ne estas natura fenomeno; ĝi estas objekto de homoj farita, ideo, procedo — kio ajn ĝi estas. La motivo malantaŭ ĝi estas homa motivo — probable mono.”

“Kio alia?” demandis Zaer kaprice.

Breŭ levis alte la brovojn. “Ho, oni neniam povas prognozi. Nu, ĝi ne povus esti krima entrepreno, alikondiĉe la AKP* estus jam sur ĝi tute svarminta.

Ditmar kliniĝis malantaŭen, svingis al Breŭ rigardon duone mokan. “La Agentaro Krimo-Preventa ne rajtus movi krom se estus okazaĵo kontraŭleĝa, krom se iu subskribus plendilon. Se nenia nekaŝita krimaĵo troviĝis, nenia plendo, la leĝistoj ne rajtas agi.”

Breŭ faris senpaciencan geston. “Tre vere. Sed tio estas flanka afero al la ideo kiun mi provis disvolvi.”

Ditmar ridetis. “Pardonu. Daŭrigu.”

“Kiaj estas la motivoj kiuj instigas viron al nova entrepreno? Unue, mono, kio en certa senco konsistas el, inkludas en si, ankaŭ ĉiujn aliajn motivojn. Sed por esti klare, unue nomu ĝin deziro por mono, ia celo en si mem. Due, ekzistas la volo kreskigi sian propran potencon. Subdividu tiun lastan en, eble, la instinkton pri sankt-militismo kaj nomu ĝin deziro pri senlima seks-ŝanco. Povo super virinoj. Kaj trie, kuriozeco, la volo scii. Kvare, entreprenado nur pro ĝia propra kialo, kiel distraĵo. Kvine, filantropio. Ĉu ajnaj aliaj?”

“Kovras ĉion,” diris Zaer.

“Eble la urĝo pri sekureco, kiel je la egiptaj piramidoj,” sugestis Janiver.

“Mi pensas ke tio kovriĝas sub la fundamenta motivo malantaŭ la unua kategorio, la avido pri mono.”

“Artista spirito, kreemo.”

“Ho, tro streĉite, diras mi.”

“Memprezentismo,” Ditmar argumentis.

“Same tro streĉite.”

“Mi malkonsentas. Teatra ludaĵo baziĝas sole kaj ekskluzive, je la vidpunkto de la aktoroj, sur ilia manio memprezentema.”

Breŭ ŝultrolevis. “Probable vi pravas.”

“Religiaj movadoj, misioj.”

“Kategoriigu tion sub la volo administri potencon.”

“Ĝi etendiĝas preter la limoj.”

“Ne multe... Ĉu ĉio? Bone. Kion tio indikas? Ĉu ion ajn sugestan?”

“La Domon de l’ Se!” laŭte pensis Janiver. “Ankoraŭ ŝajnas tiel, kiel supernecese ornamita profitoprena konspiro.”

“Ĝi ne estas filantropiaĵo — almenaŭ ne ĉe la surfaco,” diris Mario. “Sed probable ni povus fabriki eblajn situaciojn kiuj kovrus ĉiujn viajn cirkonstancojn.”

Ditmar faris geston senpaciencan. “Parolo ne utilas. Por kio bonas ĝi? Neniuj el ni scias kun certeco. Supozu, eble, ke ĝi estas konspiro por bombegi la urbon?”

Breŭ diris senemocie, “Mi nomumas vin al komitato unupersona, Ditmar, ke vi enketu kaj raportu.”

Ditmar ridis amare. “Mi ĝojus fari. Sed mi havas pli bonan ideon. Ni rulu la ĵetkubojn. “Tiu, kiu malaltos je poentoj kandidatiĝu je la Domo de l’ Se — financita de la restanta kvaropo.”

Breŭ kapjesis, “Taŭgas laŭ mi. Mi rulos kun vi.”

“Kiom kostos?” demandis Zaer.

Ditmar kapneis. “Mi havas nenian ideon. Probable ĝi altas.”

Zaer malridetis, moviĝis maltrankvile en la seĝo. “Metu limon sur tio je du mil dolarojn po persono.”

“Bone, laŭ mi. Janiver?”

La alta viro kun mallongaj flavaj haroj hezitis. “Jes, mi rulos. Mi havas nenion malperdendan.”

“Mario?”

“Taŭgas laŭ mi.”

Ditmar suprenprenis la ĵetkuban pokalon, kovris ĝian buŝon per la mano, skuis la kubojn. “La reguloj samas kiel pri ĵetkuba pokero. Unu ĵeto, aso altas. Aliavorte, paro da asoj rangas super paro da sesoj. Aro el sinsekvaj nombroj valoras inter sampunkta triopo kaj plena familio. Ĉu tio taŭgos por ĉiu?... Kiu volas ruli unue?”

“Vi komencu, ĵetu,” diris Mario milde.

Ditmar skuis, skuis, skuis, eligis la ĵetkubojn. Kvin korpoj kliniĝis antaŭen, kvin paroj da okuloj sekvis la rondirantajn kubojn. Ili klaketadis laŭlonge sur la tablo, tintis kontraŭ kokteloglason, ripoziĝis.

“Laŭ aspekte, triopo da kvinoj,” diris Ditmar. “Nu, tio meze bonas.”

Mario, sidanta je lia maldekstro, prenis la pokalon, enfaligis la ĵetkubojn, skuis, ĵetis. Li blekis. Duo, trio, kvaro, kvino, kvaro. “Duopo da kvaroj. Oj!”

Breŭ ĵetis silente. “Tri asoj.”

Janiver ĵetis. “Du paroj. Duoj kaj trioj.”

Zaer, iom pala, prenis la ĵetkubojn. Li ekturnis rigardon al Mario. “Paron da kvaroj mi devas superi.” Li skuis la ĵetkubojn, skuis — poste ĵetis kun subita elegante kurba gesto. Tint’, klaket-klak’, inter la glasoj. Kvin paroj da okuloj rigardis. Aso, duo, trio, seso, duo.

“Paro da duoj.”

Zaer ĵetis sin malantaŭen kun strikta rideto. “Nu, mi ludemas. Mi iros. Oni supozas ĝin aventuro. Kompreneble tiuj ne diris pri tio, ĉu poste oni revenos vivanta, aŭ ĉu ne.”

“Decas ke vi delektiĝu,” diris Breŭ, enpremante tabakon en sian pipon. “Preter ĉio, estas nia mono kio aĉetos por vi tiun ĉi misteran ekscitaĵon.”

Zaer faris senhelpan geston per ambaŭ manoj. “Kien mi iru? Kion mi faru?” Li rigardis al Ditmar. “Kie mi akiru tiun pritrakton?”

“Mi ne scias,” diris Ditmar. “Mi demandos ĉe la studio. Iu tie konas iun kiu iam tie vizitis. Morgaŭ ĉirkaŭ ĉihore mi havos la informo-detalojn, almenaŭ tiom multe kiom mi povos akiri.”

Nun venis momento da silento — silento konsistanta el kelkaj apartaj kvalitoj. Ĉiu el la kvin kontribuis parton, sed kiu la gardemon, kiu la timon, kiu la kvietan plaĉitecon, ne estis eble pridiri.

Breŭ malsuprenmetis sian glason. “Nu, Zaer, kion vi pensas? Ĉu preta por trapasi la streĉitan ŝnuron aŭ fronti la tigron?”

“Decas ke vi kunportu paron da latunaj pugnumoj kaj lumbrilo-pafan ringon,” diris Ditmar kun rideto.

Zaer ekrigardis ĉirkaŭe laŭ la cirklo da okuloj, ridis bedaŭre. “La interezo kiun vi havas pri mi estas flata.”

“Ni deziras plenan raporton. Ni volas ke vi travivu la sperton.”

Zaer diris, “Ankaŭ mi volas ke mi travivu. Kiu provizos min per odorsalo kaj adrenalino, se okazos tiel ke la aventuro fariĝu tro aventura?”

“Ho, vi aspektas esti sufiĉe forta,” diris Breŭ. Li levis sin stari. “Mi devas iri manĝigi miajn katojn. Jen la aventuro en mia vivo — la prizorgado de sep katoj. Iom neutila ekzistado. La katoj ŝategas ĝin.” Li faris sardonan nazoblekon. “Ni vivas tian vivon, kian viroj prirevis ekde tiam, kiam ili komencis revi. Manĝaĵo, senlaboreco, libero. Ni ne rekonas tion, ke ni ja bone fartas.”

# 2

Zaer timis. Li tenis la brakojn rigide kontraŭ la ventro, kaj lia rideto, kvankam tiel larĝa kaj tuje preta kiel antaŭe, tamen estis duone nervoza grimaco, tordita ĉe unu flanko. Li neniel kaŝis sian anksion, kaj sidis en la seĝo sur la teraso tiel, kiel profesia boksisto atendanta la gongon.

Janiver rigardis lin solene, dum trinkanta bieron. "Eble nur la ideo de la Domo de l' Se sufiĉas por aventuro."

"'Kio estas aventuro?' demandis ŝercanta Zaer, kaj ne atendis por aŭdi respondon," diris Breŭ, la okuloj scintilantaj. Li ŝarĝis la pipon.

"Aventuro estas nur alia nomo por sperti ektimon preskaŭ mortigan kaj tamen pluvivi por priparoli ĝin," diris Zaer mizere.

Mario ridis. "Se vi neniam plu aperos, ni scios ke ĝi ne estis vera aventuro."

Breŭ turnis kolotorde la kapon. "Kie estas Ditmar? Li estas la viro havanta ĉiujn informojn."

"Jen li venas," diris Zaer. "Mi sentas tiel, kiel kondamnito."

"Ho, diable!" diris Breŭ. "Vi ne devas plenumi ĝin se vi tiom malvolas. Preter ĉio, ĝi estas nur ludaĵo. Ne afero pri vivo kaj morto."

Zaer balancis nee la kapon. "Ne tiel. Mi ekprovos ĝin."

Ditmar tiris al si seĝon, stabis fingre la mendobutonon, mendis bieron. Sen priparolo li diris, "Kostas ok mil. Kostas speciale al vi ok mil, nu. Estas du niveloj. Nivelo 'A' kostas dek milionojn; nivelo 'B' dek mil, sed ili akceptos ok. Ne necesas diri, ke neniu el ni povas pagi du kaj duonon da milionoj, do vi enviciĝis sur la listo de nivelo 'B'."

Zaer grimacis. "Mi ne ŝatas la sonon de tio. Ŝajnas tiel, kiel surprizodomo ĉe kermesa amuzejo. Kelkaj trairas la surprizaron, aliaj staras ĉirkaŭe por spekti, atendantaj ke ies jupo suprenbloviĝu. Krome estas la knabo kiu turnas la valvojn, premas la ŝaltilojn. Li estas tiu, kiu vere amuziĝas."

Ditmar diris, "Mi jam pagis la ok mil dolarojn, do vi uloj povas skribi al mi ĉekojn. Bonas, ke ni plenumu tiun ĉi parton nun, dum mi ankoraŭ havas vin ĉiujn proksimaj."

Li enmetis la ĉekojn skribitajn de Mario, Janiver kaj Breŭ en sian monujon. "Dankon." Li turnis sin al Zaer. "Ĉi vespere je la sesa horo, iru al tiu ĉi adreso." Li puŝis karteton trans la tablon. "Al tiu, kiu ajn respondos ĉe la pordo, donu tiun ĉi karteton."

Breŭ kaj Mario, ambaŭflanke de Zaer, kliniĝis al li, inspektis detale la karteton kune kun Zaer. Ĝi montris:

DOMO de l' SE
5600 Eksmor' Avenuo
Herbokamp' Urbero

Ĉe unu angulo skribiĝis la vortoj: "Zaer, pere de Sutloŭ."

"Mi devis strebe laboregi por akiri ĝin," diris Ditmar. "Ŝajnas ke oni volas tenadi ke ĝi daŭre estu ekskluziva. Mi devis forte ĵuri pri ĉiaj viaj karakterecoj. Nu, mi preĝas, ne estu eltrovota AKP-ano aŭ mi suferos ekan malamikiĝon fare de Sutloŭ, kaj li estas mia estro."

"AKP?" Zaer levis la brovojn. "Ĉu ĝi estas — kontraŭleĝa?"

"Mi ne certas," diris Ditmar. "Estas por eltrovi tion, ke mi elspezis du mil dolarojn je vi."

"Mi esperas ke vi havu ege bonan memoron," diris Breŭ kun malvarmeta rideto. "Ĉar — se vi vivos — mi volos havi du mil dolarojn da anstataŭula aventuro."

"Se mi mortos," rebatis Zaer, "aĉetu tiam spiritisman fantomo-komunikan tabulon; mi tamen raportos tiom

informe, kiom valoris via mono."

"Nu," diris Ditmar, "ni renkontiĝos ĉi tie marde kaj vendrede je la tria — ĉu jes, uloj?" — li ekrigardis ĉirkaŭe al la vizaĝoj — "ĝis tiam, kiam vi ĉeestos."

Zaer levis sin. "Agrable. Mardojn kaj vendredojn je la tria. Mi vidos vin." Li faris mangeston al ili ĉiuj, kaj iom stumblete, paŝadis for.

"Kompatinda junulo," diris Breŭ. "Li rigidas pro timo."

Mardo pasis. Vendredo pasis. Alia mardo, alia vendredo, kaj mardo venis denove. Mario, Ditmar, Breŭ, Janiver atingis sian tablon je la tria horo, kaj kun subpremitaj salutoj, prenis siajn seĝojn.

Kvin minutoj, dek minutoj pasis. Konversacio malmultiĝadis ĝis halto. Janiver sidis rigide kontraŭ la tablo, grandaj brakoj ripozante apud lia biero, foje gratante al liaj mallongaj flavaj haroj, aŭ frotante lian malakran nazon. Breŭ, sidanta kurbe malantaŭen en la seĝo, rigardadis senvide elen tra la pasanta homamaso. Ditmar fumis senatente, kaj Mario kirlis kaj balancis peceton de papero kiun antaŭe li rulis en cilindron.

Je la tria kaj dek kvin Janiver ronksonis gorĝe, "Mi konjektas, ke li freneziĝis."

Breŭ blekis. Ditmar ridetis iomete. Mario ekbruligis cigaredon, malridetis.

Janiver diris, "Mi vidis lin hodiaŭ."

Ses okuloj svingiĝis al li. "Kie?"

"Mi ne planis mencii ĝin," diris Janiver, "krom se li misis prezenti sin hodiaŭ. Li loĝas ĉe la Atlantika-Imperio — en ĉambraro sur la dudeka etaĝo. Mi pagis ŝmirmonon al akceptisto kaj eltrovis ke li estas loĝinta tie dum pli ol semajno."

Breŭ diris kun sulkigita frunto, okuloj nigraj kaj suspektemaj, "Kiel hazardis ke vi tie vidis lin?"

"Mi iris por inspekti ties kontojn. Ĝi estas sur mia prilabora listo. Elirante, mi vidis Zaeron en la antaŭ-halo, tre facile memevidenta."

"Ĉu li vidis vin?"

Janiver ŝultrolevis iom rigide. "Eble. Mi ne certas. Li ŝajnis iom envolvita kun virino, virino kun riĉegaj gustoj."

"Hmf!" diris Ditmar. "Ŝajnas ke Zaer ja akiris la plej altan valoron kontraŭ nia mono."

Breŭ levis sin. "Ni iru alparoli lin, malkovru la kialon pro kio li ne venis viziti nin." Li turnis sin al Janiver. "Ĉu li registriĝis per sia propra nomo?"

Janiver balancis jese sian longan pezan kapon. "Jes ja! Ĝuste tiel."

Breŭ komencis iri for, haltis, ekrigardis de vizaĝo al vizaĝo. "Ĉu vi uloj venos?"

"Jes," diris Mario. Li stariĝis. Same faris ankaŭ Ditmar kaj Janiver.

La Hotelo Atlantika-Imperio estis masiva kaj eleganta, ekipita per ĉiu ilo havebla por la manĝigado, banado, komfortigado, amuzado, flatado, ripozigado, stimulado, plaĉado de tiuj viroj kaj virinoj kiuj povis pagi la prezon.

Ĉe la enirejo servilisto en blanka jako prenis la eksterdomajn vestojn de eĉ la plej ordinara vizitanto, brosis lin, ofertis al virinoj bukedon el glacioŝranko. La halo enkondukanta al la antaŭĉambro estis tiel kvieta kiel navo de katedralo, ambaŭflankita per speguloj dek metrojn altaj. Moviĝanta tapiŝo portis gaston en la vestiblon, grandega halo ornamita laŭ la modo gloriana* de kvindek jaroj pasintaj. Vendejaro el etaj butikoj situis flanke ĉe unu muro. Ĉi tie — se gasto zorgus tre malmulte pri prezalteco — oni povus aĉeti prilaboritajn kupron, oron, tantalon; robojn en brilaj ŝtofoj el skarlato, purpuro, indigo; artaĵoj el antikva Tibeto kaj la fabrikaĵoj de Novometi'; kapoloj de verdaj jupiteraj

opaloj, venditaj po miligramo, bluaj baltikanoj* el marso, fajrodiamantoj suprenportitaj de dek kilometroj sub la terkrusto; Maratestaj* ĉerizoj prezervitaj en Organdia likvoro, parfumoj pakitaj en arkta musko, blankaj marmoro-floroj tiaj kiaj fantomoj de belaj virinoj.

Alia tuta muro estis unuopa vitra panelego, unu flanko de la ĉefa hotela naĝbaseno. Subakva lumo briletis blu-verde, kaj estis ŝpruco, brile malseka oreco de naĝantaj korpoj. La mebloj de la atendejo koloris en gradoj el la samaj blu-verdo kaj oro, kun intimeco provizita per ekranoj el grimpoplantoj kun ruĝaj, nigraj kaj blankaj floroj. Orkoloroj lumis kvazaŭ dissolviĝintaj en la aeron, pliigis la iluzion de sorĉa mondo kie homoj moviĝas en akre ekscitita fono de altprezaj vestoj, fantastaj juveloj, eleganta ŝerco-gusto, zorga interamorado.

Breŭ ĉirkaŭrigardis kun tordita buŝo. “Hororaj parazitoj, afektantaj kaj pepantaj kaj diboĉantaj unu la alian dum tute ĉiuj aliaj mondanoj laboradas!”

“Ho! Moderiĝu,” diris Ditmar. “Ne estu tiel fajre intensa. El ĉiuj eblaj amuziĝantoj, nur tiu ĉi malmulto restas.”

“Mi dubas tion,” diris Breŭ. “Ili venkiĝis kaj malutiliĝas same tiel, kiel ĉiuj aliaj. Restas al ili neniom pli da aventurecaj lokoj, ol restas al ni.”

“Ĉu vi aŭdis pri la Turo Empirea?”

“Ho — malklare. Iu grandega konstruaĵo iuloke en la ĉirkaŭurbo ‘Herbokamp’.”

“Prave. Turego alta je kvin kilometroj. Iu amuzas sin per tiu projekto. Per desegni ĝin. Per vidi ĝin kreski supren, supren, supren.”

“En la mondo estas kvar bilionoj da homoj,” diris Breŭ. “Nur unu Turo Empirea.”

“Kiel estus la mondo sen havi ekstremaĵojn?” demandis Ditmar. “Loko tia, kia la interno de tekoŝranko. Enspiru la aeron ĉi tie. Ĝi riĉas, malbonordoras pro troa civilizacio, tradicio.”

Mario ekrigardis kun surprizo al Ditmar, la moroza seka Ditmar, kiun li juĝis esti inter la unuaj kiuj ekmokos la distraĵojn de la elituloj.

Janiver diris milde. “Mi mem ĝuas veni ĉi tien. Iamaniere, ĝi estas aventuro, ekvido al alia mondo.”

Breŭ blekis naze. “Nur riĉegulo povas fari pli ol rigardi.”

“La normo de homara vivokvalito leviĝadas ja konstante,” pensis Mario. “Kaj preskaŭ samrapide la nombro da riĉeguloj malleviĝadas. Malgraŭ tio, ĉu oni ŝatas tion aŭ ĉu ne, la ekstremoj tamen alproksimiĝas unu la alian. Fakte, jam nun ili preskaŭ intertuŝas.”

“Kaj vivo fariĝas ĉiutage pli tiel, kiel bovlo da dika, nutra kaĉo — sen salo.” diris Ditmar. “Per ĉiuj metodoj, forigu ja la malriĉecon, sed lasu ke ni daŭre havu niajn riĉegulojn... Ho, nu, ni venis ĉi tien por trovi Zaeron, ne por disputi sociologion. Estos dece, mi supozas, ke ni ĉiuj iru kune.”

Ili trairis la akceptejon. La akceptisto, bela arĝenthara viro kun gravmiena vizaĝo, riverencis.

“Ĉu s-ro Zaer ĉeestas?” demandis Ditmar.

“Mi telefonos al lia ĉambraro, sinjoro.” Momenton poste: “Ne, sinjoro, li ne respondas. Ĉu mi sendu voki lin?”

“Ne,” diris Ditmar. “Ni iom ĉirkaŭe esploros.”

“Mi kredas ke antaŭe je ĉirkaŭ horo li trairis la akceptejon cele al la Maŭna-Hiva’. Eble vi serĉu tie.”

“Dankon.”

La Maŭna-Hiva’ estis ronda ĉambro. Ĉe ĝia mezo leviĝis granda montaĵo el erodita ŝtono, superkovrita per kreskantaj palmoj, filikoj, kaj neorda interplekto el ekzotikaj plantoj. Tri kokoso-palmoj etendiĝis kline trans la insulon, kaj la tuto heliĝis pro mola akveca blanka lumo. Sube estis verŝtablo konstruita el vaksitaj tropikaj lignoj, kaj poste, ĉe la rando de l’ lumcirklo, ringo da tabloj.

Ili trovis Zaeron rapide. Li sidis kun nigrahara virino vestita per smerald-kolora silko. Sur la tablo antaŭ ili moviĝis kelke da etaj lumaj multekoloraj formoj — scintilaj, ekbrilaj, intensaj tiel kiel kolorformoj detranĉitaj el papiliaj flugiloj. Ĝi estis baleto, projekciita kiel tri-dimensia miniaturo. La etaj figuroj saltis, dancis, pozis konforme al sorĉa muziko meze de lukse bela fono el rompitaj marmoraj kolonoj kaj alpaj cipresoj.

Post momento la kvar staris iomete for, rigardantaj kun severa amuziĝo.

Breŭ kubutumis al Mario. “Mire. Li agas tiel, kvazaŭ li estus tion farinta dum la tuta vivo!”

Ditmar aliris la tablon; la virino turnis supren al li siajn longajn maldiafanajn okulojn. Zaer ekrigardis supren senkomprene.

“Nu, saluton, Zaer,” diris Ditmar, liaj lipoj streĉitaj en sarkasma rido. “Ĉu vi forgesis pri viaj malnovaj kunuloj de la Oksforda Teraso?”

Zaer rigardadis senesprime. “Mi ne komprenas.”

“Mi supozas ke vi ne konas nin?” demandis Breŭ, rigardanta malsupren laŭ sia longa malrekta nazo.

Zaer puŝis manon tra sia malordaĵo de buklaj nigraj haroj. “Mi timas ke vi havas avantaĝon super mi, ĝentiluloj.”

“Hmf!” diris Breŭ. “Ni certiĝu pri io. Vi estas Pit Zaer, ĉu ne?”

“Jes, mi estas.”

Janiver interpozigis sin, “Eble vi preferus alparoli nin sen aliuloj.”

Zaer palpebrumis. “Tute ne. Nu, do...diru.”

“Ĉu vi iam ajn aŭdis pri la Domo de l’ Se?” demandis Breŭ acide.

“Kaj pri ok mil dolaroj?” aldonis Ditmar. “Pri plurpersona entrepreno, ni menciu?”

Zaer malridetis kun esprimo tia, ke Mario povus ĵuri ke ĝi ja indikis honestan nekomprenon.

“Vi kredas ke mi ŝuldas al vi ok mil dolarojn?”

“Aŭ tion, aŭ informon valoran je ok mil dolaroj.”

Zaer ŝultrolevis. “Ok mil dolarojn?” Li etendis manon en brustan poŝon, elprenis monujon, kalkulis. “Unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok. Jen por vi, ĝentiluloj. Por kio ajn ĝi estas, pri tio mi certas ke mi ne komprenas. Eble mi ebriis.” Li transdonis ok mil-dolarajn banknotojn al la rigida Ditmar. “Ĉiel ajn, nun vi kontentas kaj mi esperas ke vi estu tiel afablaj, ke vi foriros.” Li gestis al la malgrandaj figuroj, svinge moviĝantaj, pozantaj, laŭ la sorĉa muziko. “Ni jam misatentis la dancon adoradan, la ĉefa kialo por kio ni ŝaltis ĝin.”

“Zaer,” diris Mario halte. La feliĉaj junaj okuloj svingiĝis al li.

“Jes?” — ĝentile.

“Ĉu tio estas ĉio, per kio ni informiĝos? Preter ĉio, ni kunagis en bona interfido.”

Zaer rigardis al ili malvarme. “Vi havas ok mil dolarojn. Mi ne rekonas vin disde la dua bovo de Adamo. Vi postulas ĝin, mi pagas ĝin. Tio estas pli ol iome bona interfido miaparta.”

Breŭ tiris al la brako de Mario. “Ni iru.”

# 3

Sobre ili sidis ĉe tablo en nepretendeca taverno, trinkantaj bieron. Dum ioma tempo neniu el la kvar parolis. Kvar silentaj figuroj — alta forta Janiver, kun la malglataj trajtoj, la baltaj haroj, la afrikan internan fortecon, la orientan sindetenon; Breŭ, la viglaokula, nigrabrova kaj longanaza; Ditmar, la sardona aŭtunkolora viro kun la malsana hepato; Mario, normala, modesta, plaĉa.

Mario parolis unue. “Se tio indikas pri tio, kion ok mil aĉetas ĉe la Domo de l’ Se, mi volontulos.”

“Se,” diris Breŭ post mallonge.

“Tio ne donas sencon,” tondretis Janiver. Inter ili, liaj emocioj probable estis la malplej maltrankviligitaj, lia senso pri ordo kaj taŭgeco la plej ofendegita.

Breŭ frapis la tablon per pugno, facila bato, sed tamen fervora. “Ja ne senshave! Kontraŭas la logikon!”

“Vian logikon,” Ditmar elmontris.

“Breŭ klinis flanken la kapon. “Kio estas via?”

“Mi ne havas.”

“Mi daŭre kredas ke la Domo de l’ Se estas entrepreno,” diris Breŭ. “Je tiom granda prezo, kion ili postulas, mi pripensas ĝin tiel, kiel pri profitogajna plano. Ŝajnas ke mi eraras. La financo de Zaer estis neniom antaŭ kelke da monatoj. Aŭ preskaŭ tiel. Ni donis al li ok mil dolarojn. Li iris al la Domo de l’ Se, li elvenas, prenas ĉambraron ĉe la Antlantika-Imperio, aĉetas altprezan virinon, ŝovas monon al ni po plena pugno. La nura loko de kie li povis akiri ĝin estas ĉe la Domo de l’ Se. Nu, ne estas ajna profito en tia speco de entrepreno.”

“Kelke da ili pagas dek milionoj da dolaroj,” diris Mario milde. “Tio povas rekompenci iom el la manko.”

Ditmar trinkis sian bieron “Kio nun? Ĉu iuj volas skui denove?”

Neniu parolis. Post longe Breŭ diris, “Verdire, mi timas fari.”

Mario levis la brovojn. “Kio? Kun la suprengrimpo de Zaer al riĉeco tuj antaŭ vi?”

“Strange,” pensis Breŭ, “li diris ĝuste tion. Ke li estis unu el la meteoraj gimnazi-knabaj mirinduloj kiu jam ne meteoris. Nun li probable montros sin tiel, kiel neprognozita geniulo.”

“La Domo ankoraŭ ŝajnas bona, se tiel ĝi faras al oni.”

“Se,” mokis Breŭ.

“Se,” jesis Mario milde.

Ditmar diris kun kruda rido, “Jen mi havas ok mil dolarojn. La kuna posedaĵo de ĉiuj. Laŭ mia sinteno, ĝi estas tute via, se vi volas preni al vi mem la taskon de Zaer.”

Breŭ kaj Janiver faris jesetajn ŝultrolevojn.

Mario mense ludis pri la ideo. Lia vivo estis sencela, senutila. Li hobiis pri arĥitekturo, ludis manpilkadon, dormis, manĝis. Plaĉa sed sensignifa ekzistado. Li levis sin stari. “Mi ekiras nun. Donu al mi la ok mil antaŭ ol mi ŝanĝos la volon.”

“Jen por vi,” diris Ditmar. “Ah — malgraŭ la ekzemplero de Zaer, ni atendos raporton. Marde kaj vendrede je la tria, sur Oksforda Teraso.”

Mario mangestis gaje, dum li puŝe eliris la pordon eniri la malfruan posttagmezon. “Marde kaj vendrede je la tria. Mi vidos vin.”

Ditmar skuis la kapon. “Mi dubas pri tio.”

Breŭ kunpremis la buŝon. “Mi dubas ĝin ankaŭ.”

Janiver nur neis kape...

La avenuo Eksmor’ komencis en Lanĉestero, antaŭ la Energia Banko, sur la kvara nivelo, svingiĝis norden, leviĝis partavoje al la kvina nivelo por transiri la Kontinentan Ŝoseon, kurbiĝis okcidenten, kliniĝis sub la Bulvardo Grimŝaŭ’, malsupreniĝis surfacen ĉe Herbokamp’.

Mario trovis la adreson 5600 Eksmor’, konstruaĵo el grizaj blokoj, ne vere kaduka, sed ŝajne neamita kaj nezorgita. Maldika senatentiga strio de herbaro apartigis ĝin disde la voĵo, trotuaro kondukis al nura duone elstara portiko.

Kun la malkrutaj posttagmezaj sunradioj plene brilantaj kontraŭ lia dorso, Mario almarŝis la portikon, premis la butonon.

Momento pasis, poste la pordo svingiĝis flanken, malkaŝante etan halon. “Bonvolu enveni,” diris la mola voĉo de aŭtomata bonveniga skatolo.

Mario antaŭeniris laŭ la halo, konscia pri tio ke radioj esploris lian korpon serĉante aŭ metalon aŭ armilojn. La halo malfermiĝis al verda kaj bruna akceptejo, meblita per leda kanapo, skribotablo, pentraĵo de tri maldikaj larĝokulaj nudaj virinoj kontraŭ fono de malhela arbaro. Pordo abrupte malfermiĝis, juna virino eniris.

Mario striktigis la buŝon. Estis aventure vidi la virinon. Ŝi estis mire bela, kun tia beleco, kia kreskiĝis ju pli korŝira des pli longe oni ĝin konsideris. Ŝi estis silenta, delikata. Ŝiaj okuloj estis malvarmetaj, rekte rigardaj, ŝia mandiblo kaj mentono fajnis kaj firmis. Ŝi estis bela tute en si mem, sen ornamaĵo; bela preskaŭ spite al si mem, kavazaŭ tiel ke ŝi estus bedaŭrinta la magion de la vizaĝo. Mario sentis malvarmetan nelogecon de ŝia vizaĝo, malpasian neamikecon. Homa perverseco tuj ekcitis en lia korpo volon frakasi tiun indiferentecon, ekciti tie pasion de iu speco aŭ alia... Li subpremis la instigon. Li venis kun serioza celo.

“Via nomo? Bonvolu informi.” Ŝia voĉo estis mola, kun fajna teksturo en ĝi, tiel, kiel multekoste rara ligno, kaj vibradis je stranga tonalo.

“Roland Mario.”

Ŝi skribis sur formularon. “Aĝo?”

“Dudek naŭ.”

“Profesio?”

“Arĥiteko.”

“Kial vi venis?”

“Tio ĉi estas la Domo de l’ Se?”

“Jes.” Ŝi atendis, ke li ekspliku.

“Mi estas kliento.”

“Kiu sendis vin?”

“Neniu. Mi estas amiko de Pit Zaer. Li venis ĉi tien antaŭ ol du semajnoj.”

Ŝi kapjesis, skribis.

“Ŝajnas, ke li ja sukcesis iom bone,” observis Mario bonhumore.

Ŝi diris nenion ĝis tiam, kiam ŝi finis skribi. Poste: “Tiu ĉi estas komerca afero, profitocela. Ni interesiĝas pri

mono. Kiom multe vi havas por elspezi?”

“Mi volas scii pri tio, kion vi vendas.”

“Aventuron.” Ŝi diris la vorton sen akcento, sen emfazo.

“Ah,” diris Mario. “Mi vidas... Mi kuriozas, kiel efikas je vi, ke vi laboras ĉi tie? Ĉu vi trovas ĝin aventura, aŭ ĉu ankaŭ vi tediĝas?”

Ŝi pafis al li rapidan ekrigardon. “Ni ofertas du klasojn de servico. La unua valoras je dek milionoj da dolaroj. Ĝi malmultekostas eĉ je tiu prezo, sed ĝi estas la pli teda kaj malpli vigliga el la du — la situacio super kio vi havos iom da kontrola povo. La dua valoras je dek miloj da dolaroj, kaj tiu ĉi produktas la plej ekstremajn emociojn pro esti havanta minimumon da tuja kontrolkapablo viaparta.”

Mario konsideris la vorton ‘tuja’. Li demandis, “Ĉu vi mem trapasis la traktadon?”

Refoje estis la malvarmeta ekrigardo. “Ĉu vi volas indiki pri tio, kiom multe vi volas elspezi?”

“Mi parolis demandon al vi,” diris Mario.

“Vi ricevos pli da informo ĉe la interna ĉambro.”

“Ĉu vi estas homarano?” demandis Mario. “Ĉu vi spiradas?”

“Ĉu vi volas indiki pri kiom multe vi havas por elspezi?”

Mario gestis ŝultroleve. “Mi havas enpoŝe ok mil dolarojn.” Li kunpremis la lipojn. “Kaj mi pagos mil ke vi esprimu al mi per langomontro.”

Ŝi puŝfaligis la formon en longatruon, leviĝis. “Sekvu min, mi petas.”

Ŝi kondukis lin tra pordo, laŭ koridoro, en etan ĉambron, senornaman kaj severan, lumigitan per sola konus-forma stangolampo turnigita plafonen, ĉambron farbitan blanke, grize, verde. Viro sidis ĉe skribotablo ekpremadante klavojn de aritmetikilo. Malantaŭ li staris tekoŝranko. Estis malforta odoro en la aero, kiel intermiksitaj mento, gardenio, kun sugesteto pri antisepsa medikamenta parto.

La viro ekrigardis supren, levis sin por stari, gestis ĝentile per kapkliniĝo. Li estis juna, tiel blonda kiel stranda sablo, tiom grandioze bela viro-mode kiom estis la virino laŭ ina modo. Mario sentis en la cerbo etan akriĝon. Unuope ili estis mirindaj, ilia beleco ŝajnis natura. Kune, la beleco trosatis, kvazaŭ ĝi estis io posedata kaj alte taksata. Ĝi ŝajnis esti konscie farata kaj maleleganta. Kaj Mario subite eksentis kvietan fieron pri la propra memo ordinara.

La viro superaltis Marion je kelkaj centimetroj. Lia brusto estis glata kaj larĝa, ŝnurita de fortaj tendenoj. Malgraŭ lia preskaŭ tro-zorga ĝentileco, li impresis pri havi superfortan, superregan memkonfidencon.

“S-ro Roland Mario,” diris la junulino. Ŝi aldonis seke, “Li havas ok mil dolarojn.”

La juna viro kapjesis grave, etendis manon. “Mia nomo estas Mervin Alen.” Li ekrigardis la junulinon. “Ĉu tio tutas, Tejn?”

“Jen ĉio por ĉi tiu vespero.” Ŝi foriris.

“Ne povas pluiri enspezante je ok mil nokte,” grumblis Mervin Alen. “Eksidu, s-ro Mario.”

Mario prenis sidlokon. “Devas esti ke la aventura komerco havas enormajn elspezojn,” li observis kun strikta rideto.

“Ho, ne,” diris Alen kun larĝaj malkaŝemaj okuloj. “Kontraŭe. La funkciuloj havas enorman avaron. Ni provas profiti je dudek milionoj nokte kiel mezvaloro. Foje ni ne povas atingi tion.”

“Pardonu min, ke mi agacas vin per taksi-lupreza sumo,” diris Mario. “Se vi ne deziras ĝin, mi mem ĝin konservos.”

Alen faris geston de malavaro. “Laŭ via volo.”

Mario diris, “La akceptistino informis min ke dek milionoj aĉetus la malplej interesajn el viaj servicoj, kaj dek mil ion iom sovaĝan. Kion mi akirus kontraŭ nula prezo? Vivisekcion?”

Alen ridetis. “Ne. Vi tute sekuras kun ni. Tio estas diri, ke vi suferos nenian korpan doloron, vi eliros vivante.”

“Sed ĉu vi ne informos pri ajnaj detaloj? Preter ĉio, mi havas naturon kiu ŝatas purecon. Tio, kion vi konsiderus bona ŝerco, eble agacos al mi tre multe.”

Mervin Alen gestis per sugestomanka ŝultrolevo. “Vi ankoraŭ spezis nenian monon. Vi ankoraŭ rajtas foriri.”

Mario frotis al la brakoj de sia seĝo per la platoj de l’ manoj. “Tio estas iom maljusta. Mi interesiĝas, sed ankaŭ mi volas scii ion pri tio, en kio mi estas enironta.”

Alen kapjesis. “Tio kompreneblas. Vi volas preni ŝancon, sed vi ne estas tuta malsaĝulo. Ĉu tiel?”

“Precize.”

Alen ordigis krajonon sur la skribotablo. “Unue, mi volas fari al vi ekzamenojn psikiatrian kaj medicinan. Komprenu,” kaj li ekmontris al Mario brilan senkaŝan ekrigardon, “ni maldeziras ajnajn akcidentojn ĉe la Domo de l’ Se’.”

“Komencu,” diris Mario.

Alen glitis malferme la supron de l’ skribotablo, transdonis al Mario ĉapelon el faldita krisp-sona plasto en kiu tre malgrandaj dratoj brilis. “Encefalografa sensilo. Bonvolu ordigi ĝin sufiĉe strikte.”

Mario ridetis. “Nomu ĝin mensog-indikilo.”

Alen ridetis momenton. “Mensogindikilo, do.”

Mario murmuris, “Mi volas meti ĝin sur vin.”

Alen ignoris lin, elprenis foliaron da presitaj formoj, turne ĝustigis regodiskon kiu situis antaŭ li.

“Nomo?”

“Roland Mario.”

“Aĝo?”

“Dudek ok.”

Alen rigardis la indikilon, malridetis, rigardis supren demand-esprime.

“Mi volis esplori pri tio, ĉu ĝi funkcias,” diris Mario. “Mi havas dudek naŭ jarojn.”

“Ĝi funkcias,” diris Alen post nelonge. “Profesio?”

“Arĥiteko. Almenaŭ mi ludas je tio, desegnas hundo-domojn kaj kuniklo-kaĝojn por miaj amikoj. Kvankam mi ja desegnis la fabrikon de la Korporacio Ĝeraf Fliter ĉe Hanovero antaŭ proksime unu jaro, iom granda okupo.”

“Hm. Kie vi naskiĝis?”

“Buenos-Ajreso.”

“Ĉu vi iam ajn laboris por la registaro? Ŝtatoficiste? Policane? Administratiste? Eble en la AKP?”

“Ne.”

“Kial ne?”

“Implikismo. Aĉegaj burokratistoj.”

“Plej proksima parenco?”

“Mia frato Artur Mario. Ĉe la urbo Kalako. Kafa komerco.”

“Nenia edzino?”

“Sen edzino.”

“Via financa valoro, proksime? Monoj, posedaĵoj, landoj?”

“Ho — sesdek, sepdek mil. Modeste komforta. Sufiĉe por ke mi povu ripozi, se mi tiel volas.”

“Kial vi venis al la Domo de l’ Se?”

“Pro la sama kialo pro kiu ĉiuj faras. Tediĝo. Entenata energio. Manko de io por kontraŭbatali.”

Alen ridis. “Do vi pensas ke vi ellaboros iom el tiu energio batalante la Domon de l’ Se?”

Mario ridetis milde. “Se ĝi prezentus interesan provokon.”

“Ĉi tie ni havas bonan entreprenon,” Alen konfidis. “Miraklas ke oni jam ne faris ĝin antaŭ ol nun. Kiel do estis la situacio, ke vi decidis veni al la Domo de l’ Se?”

“Kvin el ni rulis ĵetkubojn. Viro nomata Pit Zaer perdis. Li venis, sed li rifuzis alparoli nin poste.”

Alen kapjesis kun saĝa mieno. “Ni devas peti ke niaj klientoj prizorgu niajn sekretojn. Se mistero mankus, ni havus neniom da klientoj.”

“Mi postulas ke ĝi estu bona,” diris Mario, “post akcepti tian grandan reklamon.” Kaj li pensis ke li vidis flagron da amuzo en la okuloj de Alen.

“Ĝi plusvaloras la koston eĉ kontraŭ dek milionoj.”

“Kaj tre kara kontraŭ dek miloj?” sugestis Mario.

Alen kliniĝis malantaŭen en la seĝo, kaj lia bela vizaĝo estis tiel malvarma kiel masko el marmoro. Mario subite ekpensis pri la junulino en la antaŭa oficejo. La sama esprimo de netuŝebla malproksimeco kaj alteco. Li diris, “Mi supozas, ke vi havas la saman disputon kun ĉiu kiu alvenas.”

“Precize.”

“Nu, kien ni iru de tie ĉi?”

“Ĉu vi sanas? Ĉu estas ajnaj korpaj difektaĵoj?”

“Neniuj.”

“Nu bone. Mi flankenlasos la kuracistan ekzamenon.”

Mario levis manon, demetis la encefalografan sensiloreton. “Nun mi rajtas mensogi refoje.”

Alen tamburis fingre la tablosurfacon, etendis manon antaŭen, ĵetis la reton remete en la tirkeston, skribis sur folion da papero, ĵetis ĝin al Mario. “Kontrakto malkulpiganta nin disde respondeco.”

Mario legis. Per akcepti servicojn faritajn, Roland Mario konsentis ke la Domo de l’ Se kune kun ĝiaj agentoj ne estu respondecaj rilate al ajnaj vundoj, aŭ korpaj aŭ mensaj, kiujn li eble suferus tiuloke. Pluse, li specife malpostulas

ĉiujn rajtojn je proceso. Ajnaj kaj ĉiuj interfaroj, medicinaj ekfaroj, eksperimentoj, eventoj kiuj okazis ĉe, pri aŭ sur lian korpon estis tute laŭ lia permeso kaj laŭ lia rekta direkto.

Mario maĉetis dube je la lipo. “Tiu ĉi ŝajnas iom maldelikata. Preskaŭ la maksimumo kion vi ne rajtas fari estas mortigi min.”

“Ĝuste tiel.”

“Tre timoprognoza kontrakto.”

“Eblas ke nur la priparolo sufiĉe aventurecas,” sugestis Alen, iomete malestime.

Mario kunpremis la lipojn. “Mi ŝatas plezurajn aventurojn. Sonĝo terura estas aventuro, kaj mi ne ŝatas terurosonĝojn.”

“Kiu ja ŝatas?”

“Aliavorte, vi neniel pluse informos min?”

“Neniel.”

“Se mi estus havanta ajnan saĝecon,” diris Mario, “Mi ekstarus por foriri.”

“Plaĉu vin mem.”

“Kion vi faras per ĉiom multe da mono?”

Mervin Alen malstreĉiĝis en la seĝo, metis la manojn malantaŭ sia blonda kapo. “Ni konstruas la Turon Empirean. Tio neniel estas sekreto.”

Estis novaĵo al Mario. La Turo Empirea — la plej vasta, plej granda, plej peza, plej alta, plej nobla konstruaĵo iam ajn farita aŭ eĉ pripensita de homoj. Ĉielopenetra, alstele etendanta fosto kvin kilomentrojn alta.

“Kial, se mi rajtas demandi, vi konstruas la Turon Empirean?”

Alen suspiris. “Samkiale ke vi estas ĉi tie, ĉe la Domo de l’ Se. Tedeco. Kaj ne sugestu ke mi prenu mian propran rimedon.”

“Ĉu vi jam prenis?”

Alen studis lin per okuloj mallarĝigitaj. “Jes. Mi faris. Vi demandas multe. Tro multe. Jen la kontrakto. Subskribu ĝin aŭ disŝiru ĝin. Mi ne povas doni al vi pli da tempo.”

“Unue,” diris Mario pacience, “vi devos doni al mi ian ideon pri tio, kion mi eniros.”

“Ĝi ne estas krimo,” diris Alen. “Ni diru — ke ni donos al vi novan vidpunkton koncerne je la vivo.”

“Artefaritan amnezion?” demandis Mario, rememorante pri Zaer.

“Ne. Viaj rememoroj restos neŝanĝitaj. Jen ĝi,” kaj Alen ekŝovis al li la kontrakton. “Subskribu ĝin aŭ disŝiru ĝin.”

Mario subskribis. “Mi rekonas min kiel stultulon. Ĉu vi deziras miajn ok milojn?”

“Ni entreprenas por gajni monon,” diris Alen post nelonge. “Se vi povas malŝpari ĝin.”

Mario elkalkulis la ok mildolare valorajn banknotojn. “Jen por vi.”

Alen prenis la monon, metis ĝin frape sur la tablon, inspektis Marion pripense. “Niaj klientoj dividiĝas precipe laŭ tri grupoj. Senzorgaj junaj viroj ĵus el adoleskanteco, trospertintaj maljunaj viroj serĉantaj novajn tipojn de malvirto, kaj policaj spionuloj. Vi ŝajne ne tiel engrupiĝas.”

Mario diris kun ŝultrolevo. “Prenu la mezvaloron de la unuaj du. Mi estas senzorga, trospertinta kaj dudek naŭ jarojn aĝa.”

Alen ridetis momenton, ĝentile, kaj ekstaris. “Sekvu min, mi petas.”

Panelo malfermiĝis malantaŭ li, malkaŝante ĉambron lumigitan per malvarmenta fojnokolora lumo. Verdaj plantoj, altaj je l’ talio, kreskis abunde — larĝafoliaj ekzotikaĵoj, delikataj filikoj, fantastaj spike turoformaj fungoj, kurbaj glavopintaj lancoj samkoloraj kiel Azteka jado. Mario notis ke Alen prenis profundan enspiron antaŭ ol eniri la ĉambron, sed pensis nenion pri tio. Li sekvis, rigardante dekstren kaj maldekstren kun admiro pri la etaj artefaritaj ĝangaloj je ambaŭ flankoj. La aero pezis forte pro la menta gardenia antisepsa odoro — pike odora. Li palpebrumis. Liaj okuloj akviĝis, malfokusiĝis. Li haltis, ŝanceliĝante. Alen turniĝis, rigardis kun malvarmeta duonrideto, kvazaŭ tiu ĉi estis spektaklo kiun li bone konis sed trovis senĉese amuza.

Vido foriris; aŭdo zumzumis, malfortiĝis, foriris; tempo drivis tien kaj reen, kirliĝis...

# 4

Mario vekiĝis.

Ĝi estis akre klare subita vekiĝo, ne la malrapida vadado tra marĉo de drogeco.

Li sidis sur benko en Placo Tanagro, sub la granda mimozo, kaj la kuprokoloraj pavoj bekis je pano kion li etendis elen al ili.

Li rigardis al sia mano. Ĝi estis grasa, dika mano. La brako ĉirkaŭiĝis de malmola griza fibro. Nenia kostumo de li posedata estis griza. La brako estis mallonga. Liaj gamboj estis mallongaj. Lia abdomeno estis granda. Li lekis al si la lipojn. Ili estis pulpecaj, dikaj.

Li estis Roland Mario ene de la cerbo, la korpo estis iu alia. Li sidis tre senmove.

La pavoj bekis al la pano. Li ĵetis ĝin for. Lia brako estis rigideta, strange peza. Li havis muskolojn aĉe molajn. Li stariĝis kun muĝeto. Lia korpo estis mola sed ne fleksebla. Li movis palpe la manon sur la vizaĝo, sentis mallongan malmolan nazon, longajn orelojn, pezajn vangojn tiajn kiaj patoj plenaj de malvarma gluo. Li estis tiel kalva kiel la suba flanko de fiŝo.

Kiu estis la korpo? Li palpebrumis, sentis la menson tordiĝi, tiri je ĝia kateniĝo. Mario baraktis stabiligi sin, same tiel kiel viro en balancema kanuo provus teni ĝin stabila, ke ĝi ne rulu flanken por sinki en malhelan akvon. Li kliniĝis apoge kontraŭ la trunko de la mimoza arbo. Stabile, stabile, fokusu viajn okulojn! Tio, kion oni faris al li sendube povus esti malfarata. Aŭ eble ĝi mem malfariĝos. Ĉu ĝi estas sonĝo, intense vivsimila parto de narkota sperto? Aventuro — ha! Tio estas milda vorto.

Li palpis fuŝe en siajn poŝojn, trovis falditan folion de papero. Li malfaldis ĝin, sidis dum li legis la tajpitajn vortojn. Unue estis peza averto:

> PARKERU LA SEKVAN, ĈAR TIU ĈI PAPERO EKDETRUIĜOS POST PROKSIME KVIN MINUTOJ!
>
> Vi nun ekiras en la vivon por kio vi pagis.
>
> Via nomo estas Ralston Eberi. Via aĝo estas 56. Vi estas edzo al Florens Eberi, aĝo 50. Via hejma adreso estas 19 Marośaŭma Placo. Vi havas tri infanojn: Luter, aĝo 25; Ralston 2-a, aĝo 23; Klidia, aĝo 19.
>
> Vi estas riĉa fabrikisto de modelo de flugvehiklo, la Eberia Flugĉaro. Via banko estas la Afrika Federala; la kontolibro estas en via poŝo. Kiam vi subskribos vian nomon, ne gvidu la manon per mensa volo; lasu ke la volomankaj muskoloj skribu la aŭtografon Ralston Eberi.
>
> Se vi malŝatas vian nunan formon, vi rajtas reveni al la Domo de l' Se. Kontraŭ pago de dek mil dolaroj vi gajnos elekti inter la korpoj jam haveblaj. Kontraŭ dek milionoj aĉeteblos juna sana korpo laŭ viaj propraj specifoj.
>
> Bonvolu ne komuniku kun la polico. Unuakaze, ili taksos vin freneza. Duakaze, se ili sukcesus obstakli la funkciadon de la Domo de l' Se, vi estus por ĉiam kaptita en la korpo de Ralston Eberi, cirkonstanco kiun vi eble ne ĝuos. Triakaze, la korpo de Roland Mario insistados pri sia leĝa identeco.
>
> Kun viaj komercaj oportunoj, dek milionoj da dolaroj estas facile en la kampo de viaj kapabloj. Kiam vi ekhavos ĝin, revenu al la Domo de l' Se por havigi al vi junan kaj sanan korpon.
>
> Ni estas plenumigintaj nian kontrakton kun vi. Ni provizis al vi aventuron. Per lerteco kaj genieco, vi estos kapabla aniĝi al la grupo de homoj sen aĝo, por ĉiam junaj.

Mario legis la folion duan fojon. Ĵus kiam li finis, ĝi tiam disiĝis kaj disfalis en polvon en liaj manoj. Li kliniĝis malantaŭen, konscia pri naŭzo tiel leviĝanta en li kiel lifto en ĝia tubo. La plej malaminda el intimecoj, loĝi en korpo de alia viro — aparte en iu tiom ĉi troa kaj malneta. Li eksentis malsaton, kaj pro perversa malico decidis lasi ke la korpo de Ralston Eberi restu malsata.

Ralston Eberi! La nomo estis malklare familiara. Ĉu Ralston Eberi nun posedas la korpon de Mario? Eble. Ne necese. Mario havis nenian koncepton pri la principo funkciiĝanta en la transŝanĝo. Signoj indikaj pri incizo, pri cerbogrefto mankis.

Kion fari nun?

Li povus raporti al la AKP. Sed, eĉ se li povus kredigi ilin pri li, ankoraŭ restus al li nenia leĝa savo. Laŭ lia plej bona kompreno, neniu ĉe la Domo de l' Se estas farinta al li ajnan krimon. Li eĉ ne havas evidencon por plendi pri provita korpovundo, ĉar li jam forĵuris siajn rajtojn pri procesa plendo.

La ĵurnaloj, la teleekranoj? Imagu ke malplaĉa famo eble instigus al la Domo de l' Se ke ĝi rezignu de komercado, kion fari do tiukaze? Mervin Alen povus starigi similan komercon aliloke — kaj Mario neniam poste povus reveni al sia propra korpo.

Li povus sekvi la sugeston de la ĵus disiĝinta papero. Preter ĉia dubo Ralston Eberi havis potencajn politikajn kaj financajn interligojn, kune kun multa riĉeco sia propra. Aŭ, ĉu li plu havas? Ĉu ne estus pli probable ke Eberi jam liberigis tiom multe da sia mono kiom eblas, kaj por pagi dek milionojn da dolaroj al la Domo de l' Se, kaj ankaŭ por provizi sian novan korpon ke ĝi havu financan subtenon?

Mario pripensis rimedon perfortan. Eble ekzistas ia metodo por devigi la redonon de lia korpo. Helpo de aliaj estus utila. Ĉu li raportu al Ditmar, Janiver, Breŭ? Ja vere, li ŝuldas al ili ian specon de ekspliko.

Li stariĝis. Liaopinie, Mervin Alen ne lasus ke partoj de la defendilaro restu atakeblaj. Li certe devas rekoni ke malpaco, venĝo, estus la unua ideo okazanta en menso perforte kaptita en maljunan, malsanan korpon. Ekzistos antaŭzorgoj kontraŭ memevidenta malpaco, pri tio li certis.

Ideoj svarmis, volvis, ŝaŭmis, kiel malsamkoloraj farboj kirligitaj en sitelo. Lia kapo fariĝis malpeza, zumo sonis en la oreloj. Sonĝo, kiam li vekiĝos? Li ekenspiregis, anheladis, faris senfortajn baraktajn brakmovojn. Policano haltis apud li, per aŭtomata gesto ekfunkciigis sian okazaĵo-kameraon.

“Kio malĝustas, sinjoro? Ĉu malsane?”

“Ne, ne,” diris Mario. “Mi bonfartas. Nur ekdormis.”

Li stariĝis, surpaŝis la Strion Koreops', pasis la centran fonton pavimitan per kvarco aventurina, depaŝis ĉe la Pavilono Malabar', vagadis sube de la grandaj laŭroj elen sur Avenuon Keselin-on. Malrapide, peze, li strebe paŝadis inter la florovendaj budoj, kaj ĉe l' Strato Pacifiko, lasis ke la eskalatoro portu lin al la tria nivelo, kie li surpaŝis la rapidan glitostrion de la Granda Piedvojo al la Ĉefa Placo.

Lia progresado estis senkonscia, aŭtomata, kvazaŭ lia korpo estus farinta la turnojn laŭ ĝia propra volo. Nun ĉe la piedo de la Bloko Etera li deiris la strion, spirante iom peze. La korpo de Ralston Eberi estis spongeca, en malvigla stato. Kaj Mario sentis malvirtan ĝojon je imagbildo pri la korpo de Ralston Eberi, ke ĝi devu ŝviti, strebe anheli, malsati — forlabori ĝian grason.

Vizaĝo ekpuŝis sin tuj antaŭ lia, grimaca vizaĝo plena de malamo. Dentoj montriĝis, la pupiloj de la okuloj estis kiel la nigre kovritaj pintoj de venenaj sagetoj de la sovaĝejo de Mazumbŭe-o. La vizaĝo estis tio de juna/maluna viro — sensulka, sed grizhara; senkulpa sed saĝa, tordita pro la internaj barakto kaj risorta strebo de l' propra malamo. Tra kunpremitaj dentoj kaj striktigitaj mentonaj muskoloj la juna/maljuna viro minacis per tordita esprimo:

“Vi malpurega finaskita feko-ŝtelisto, ĉu vi espreras pri plua vivado? Vi veneno, vi fiodoro. Min fie malpurigus se mi mortigus vin. Sed mi ja faros!”

Mario paŝis retroen. La viro estis nekonata. “Mi bedaŭras. Devas esti ke vi eraris,” li diris, antaŭ ol ekevidentiĝis al li ke la faraĵoj de Ralston Eberi nun surtrudiĝas al li.

Mano falis sur la ŝultro de la juna/maljuna viro. “Foriru, Arnold!” diris malmola voĉo. “Ekiru for!” La juna/maljuna viro stumblis malantaŭen.

La savinto de Mario turnis sin por alfronti — nete vestita juna viro kun vigla vizaĝo kiel vulpo. Li kapjesis kun respekto. “Bonmatenon, s-ro Eberi. Bedaŭrinde ke tiu misulo agacis vin.”

“Bonmatenon,” diris Mario. “Ah — kiu li estis?”

La juna viro ekrigardis lin kun miro, “Nu, tiu estis Letja Arnold. Antaŭe laboris por ni. Vi maldungis lin.”

Mario sentis konfuzon. “Kial?”

La juna viro palpebrumis. “Mi certas ke mi neniel scias. Pro senefikeco, mi supozas.”

“Ne estas grave,” diris Mario haste. “Forgesu tion.”

“Certe. Kompreneble. Ĉu supreniranta al la ofico?”

“Jes, mi — mi supozas tiel.” Kiu estas tiu juna viro? Jen problemo kion li alfrontos multafoje, li ekpensis.

Ili aliris la liftojn. “Poste ol vi,” diris Mario. Estis tiom senlime multe da detaloj por lerni, mil personaj ĝustigoj, la komplika kutimo de la komerco de Ralston Eberi. Ĉu ajna komerco restas? Eberi certe estus jam rabinta ĉiun cendon por riĉigi sian novan korpon. La firmao Eberia Flugĉaro estis granda komerco; tamen la elpreno de dek milionoj devus esti lasinta mankon. Kaj tiu juna viro kun la lerta vizaĝo, kiu li estas? Mario decidis provi ĉirkaŭirecon, malklaran demandon.

“Nu, ni esploru — kiom longe antaŭe okazis via lasta promocio?”

La juna viro flankenturnis rapidan rigardon, evidente scivolante pri tio ĉu Eberi estis en bona sanstato. “Nu, mi estadis via oficestro du jarojn.”

Mario kapjesis. Ili enpaŝis la lifton, kaj la juna viro estis rapida unue premi la butonon. Komplezaĉa lakeo, pensis Mario. La pordo fermiĝis frape, kaj sekve okazis la suprenfluga salto pri kiu stomakoj de tiu ĉi epoko jam alkutimiĝis. La lifto haltis, la pordoj rapide malfermiĝis, ili elpaŝis en aktivan oficejon, plena de klakantaj maŝinoj, komizoj, linioj da teleekranoj. Klakado, zumado — kaj subita silento kun ĉiu okulo fiksita je la korpo de Ralston Eberi. Kaŝaj ekrigardoj, pristudaj atentoj al la laboro, superordinaraj laborprovoj.

Mario haltis, esplore rigardis la ĉambron. Ĝi estis lia propra. Pro foresto de la originala Eberi. Neniu en la ĉambro rifuzus al li aŭtoritaton super tiu ĉi firmao, kondiĉe ke Ralston Eberi ne plu estus tro rapida, tro avara, akirante siajn pli ol dek milionoj dolaroj. Se Ralston Eberi jam defraŭdis aŭ trompŝtelis de klientoj, li — Roland Mario en la korpo de Eberi — estus punota. La pasintaj faroj de Eberi tenas Marion tute kapta. La erarojn de Eberi homoj tenos kontraŭ li, la malamo tiel iniciata alĵetiĝos sur lin, kaj li heredis la edzinon de Eberi, ties familion, ties kroman kvazaŭedzinon, se li iun tian havus.

Malalta mezaĝa viro kun larĝaj seniluzigitaj okuloj, la amara kunpremo de lipoj kia indikas pri multaj esperoj nun perditaj aŭ forlasitaj, alproksimiĝis.

“Bonmatenon, s-ro Eberi. Mi ĝojas ke vi venis. Kelkaj aferoj bezonas vian propran atenton.”

Mario akre alrigardis la viron. Tiu tono en lia voĉo, ĉu sarkasmo? “En mia ofico,” diris Mario. La malaltulo turnis sin al koridoro. Mario sekvis. “Kune venu,” li diris al la oficestra subulo.

Gotik-stilaj literoj desegnitaj el arĝento literumis la nomon Ralston Eberi sur pordo. Mario metis sian dikfingron en seruron; la surfacaj linioj ĝustis, la pordo glitis flanken; Mario eniris malrapide, malridetante pro malgusto je la superdetaleca ornamo. Ralston Eberi estis amanto de l’ rokoko. Li sidiĝis malantaŭ labortablo el polurita nigra metalo, diris al al suba oficestro, “Portu al mi la persono-tekojn pri la oficeja laboristaro — priskriboj, fotografioj.”

“Jes, sinjoro.”

La malaltulo tiris seĝon antaŭen. “Nun, s-ro Eberi, mi bedaŭras diri ke miaopinie, vi jam metis la firmaon en situacion ambiguan.”

“Kion vi volas diri?” demandis Mario per frosta voĉo, kvazaŭ li ja estis mem Eberi.

La malaltulo nazblekis. “Kion mi volas diri? Mi diras ke la kontraktoj kiujn vi vendis al Atlasa Aerboato estis la plej grande profitodonaj kiujn havis Eberia Flugĉaro. Kiel vi mem jam scias. Ni suferis teruran puniĝon je tiu interŝanĝo.” La malaltulo salte stariĝis, ekmarŝadis tien kaj reen. “Verdire, s-ro Eberi, mi ne komprenas ĝin.”

“Nu, minuton,” diris Mario. “Lasu ke mi alrigardu la poŝtaĵojn.” Malŝparante tempon, li foliumadis inter la leteroj ĝis la suba oficestro revenis kun aro da kartetoj.

“Dankon,” diris Mario. “Tio sufiĉas dumtempe.”

Li rapidturne traserĉis ilin, alrigardante la bildojn. Tiu malaltulo havis aŭtoritaton; decas ke lia karteto estu ie ĉe la supro. Jen li — Luis Koreŭs, Direktora Konsilisto. Informoj pri salajro, familio, aĝo, historio — pli ol li povus digesti ĉimomente. Li metis la tekon je flanko. Luis Koreŭs ankoraŭ paŝadis tien kaj reen, kolere.

Koreŭs paŭzis, ekmontris venenan rigardadon al Mario. “Malbone decidite? Mi kredas vin freneza!” Li ŝultrolevis. “Mi diras tion ĉi al vi ĉar mia posteno valoras neniom al mi. La firmao ne povas travivi la punadon kiun vi jam faris al ĝi. Ne laŭ la maniero per kiu vi volas regi ĝin. Vi insistas oferti flugantan teo-vagonon, ĉirkaŭkrustitan per ornamaĵoj; krome vi forvendas la nurajn profitodonajn kontraktojn, la nurajn partojn de la ŝipo kiuj faras ĝin eĉ iomete taŭga al flugado.”

Mario pripensis minuton. Poste li diris, “Mi havis proprajn kialojn.”

Koreŭs haltis la paŝadon, rigardadis refoje.

Mario diris, “Ĉu vi povas konjekti pri kiel mi planas profiti per tiuj ĉi cirkonstancoj?”

La okuloj de Koreŭs estis kiel plastaj vetlud-moneroj; lia buŝo mallarĝiĝis, striktiĝis, formis literon O. Li pensadis. Post momento li diris, “Vi vendis nian ŝtal-fabrikon al Ĝonz kaj Kejhil, niajn rajtojn pri la vetur-stabiligilo al Blukrafto.” Li rigardadis fokuse flanken al Mario. “Ŝajnas, ke vi faras tion, kion vi ĉiam promesis neniam fari. Elmeti novan desegnon kiu ja bone flugos.”

“Kiel vi ŝatas la ideon?” demandis Mario, afektante saĝecon.

Luis Koreŭs balbutis, “Nu, s-ro Eberi, tio ĉi estas — mirakle! Vi demandas al mi pri tio kion mi pensas! Mi estas via jesisto. Jen tio, por kio vi min pagas. Mi rekonas tion, vi scias tion, ĉiuj scias tion.”

“Vi hodiaŭ ne jesadis al mi,” diris Eberi. “Vi diris al mi, ke mi estas freneza.”

“Nu,” balbutis Koreŭs, “Mi ne vidis vian ideon. Ĝi estas tio, kion mi jam delonge ja volis esti faranta. Enmeti novan transformatoron, deprenu ĉiom da tiu aĉaj ornamaĵoj, uzu planŝenon* anstataŭ ŝtalon, simpligu, simpligu —”

“Luis,” diris Mario, “vi mem faru la anoncon. Komencu la antaŭenigon. Vi estru. Mi subtenos ĉion, kion vi volos fari.”

La vizaĝo de Luis Koreŭs estis elĉerpita masko.

“Levu vian salajron je ajna nivelo kiun vi volas,” diris Mario. “Mi havas kelkajn novajn projektojn kiuj plene okupos min. Mi volas, ke vi estru la entreprenon. Vi estas la estro. Ĉu vi povas plenumi tion?”

“Jes, mi povas.”

“Faru ĉion laŭ via propra volo. Estigu tian novan desegnaĵon kia superos ĉion alian en la merkato. Mi kontrolos la finan aranĝon, sed ĝis tiam, vi estos la superestro. Ĝuste nun, ordigu ĉiujn ĉi detalojn.” Li fingre montris la aron da poŝtaĵoj. “Prenu ilin al via oficejo.”

Koreŭs eke rapidis antaŭen, ekprenis la manon de Mario. “Mi faros tiel plejege bone, kiel mi povos.” Li foriris la ĉambron.

Mario diris en la komunikilon, “Interkonektu min kun la banko Afrika Federala... Saluton —” al la vizaĝo de l’ virino sur la ekrano. “jen Ralston Eberi. Bonvolu informi min pri la tuto de miaj kontoj.”

Post momento ŝi diris, “Ĝi estas falinta ĝis nur mil ducent dolaroj, sro Eberi. Via lasta elĉerpo preskaŭ nuligis vian tuton.”

“Dankon,” diris Mario. Li ripozigis la dikan korpon de Ralston Eberi en la seĝo, kaj fariĝis konscia pri granda kaverna muĝado en la abdomeno. Ralston Eberi estis malsata.

Mario ridetis maldolĉan, makabran rideton. Li vokis la servicejon manĝaĵan. “Sendu supren sandviĉon el distranĉitaj olivoj kune kun celerioj kaj glaso da senkrema lakto.”

# 5

Dum la posttagmezo li fariĝis konscia pri peno kiun li ne plu povus ignori: konigi al si la familion de Ralston Eberi, ties hejman vivon. Ĝi ne povus esti feliĉa afero. Neniu feliĉa edzo kaj patro elektus forlasi siajn edzinon kaj gefilojn ke ili falu sub la influo de nekonatulo. Tio estas ago de malamo anstataŭ de amo.

Plurhoma foto staris sur la labortablo — bildo en neelstara loko, kvazaŭ ĝi meritas spacon nur pro pacienca suferado. Tiu ĉi estis lia familio. Florens Eberi estis malforta virino, facile ignorebla, timema, troe vestita, kaj ŝia vizago elrigardanta de sub absurda ĉapelo, portis la paciencan senkomprenantan esprimon de familia dorloto-besto surkovrita en pupaj vestoj — iel mizere kompatinda.

Luter kaj Ralston la 2-a estis forte dikaj junaj viroj kun fiksite obstinaj vizaĝoj, Klidia plenvanga ino kun neplaĉigeme ĉiampostulanta buŝo.

Je la tria horo Mario finfine suprentiris sian kuraĝon, vokis la hejmon de Eberi surekrane, petis pri Florens Eberi. Ŝi diris per maldika malproksima voĉo, “Jes, Ralston.”

“Mi venos hejmen ĉivespere, kara mia.” Mario aldonis la kares-vortojn kun konscia strebo.

Ŝi esprimis nazosulke, kunpremis la lipojn kaj ŝiaj okuloj ekbriletis kvazaŭ ŝi estus preta ekplori. “Vi ne eĉ informas min pri tio, kie vi forestadis.”

Mario diris, “Florens — verdire. Ĉu vi juĝus min bona edzo?”

Ŝi palpebrumis defie al li. “Mi ne havas plendojn. Mi neniam plendis.” La tono de ŝia voĉo sugestetis ke tiu ĉi eble ne estis laŭvorte vera. Ŝi probable havis kialojn, pensis Mario.

“Ne, mi volas aŭdi la veron, Florens.”

“Vi estis donante al mi ĉiom da mono, kiom mi deziris. Vi humiligis min mil fojojn — publike ignoris min, faris min priridinda antaŭ la gefiloj.”

Mario diris, “Nu, mi bedaŭras, Florens.” Li ne povus juĝi pri sia amo. Li sentis kompaton al Florens — la edzinon de Eberi — sed ŝi estis la edzino de Ralston Eberi, ne lia propra. Unu el la viktimoj de Ralston Eberi. “Mi vidos vin ĉivespere,” li diris per lama voĉo, kaj malŝaltis la kontakton.

Li klinigis sin malantaŭen. Pensu, pensu, pensu. Devas ekzisti eskapa vojo. Aŭ ĉu tiu ĉi estados lia vivo, lia sorto, en tiu ĉi grasa nebonsana korpo? Mario ekridis subite. Se dek milionoj da dolaroj aĉetus al Ralston Eberi novan korpon — ŝajne tiun de Mario — sekvas ke dek milionoj plu el la dolaroj de Ralston Eberi eble aĉetos la korpon refoje plu. Ĉar mono paroladis laŭte en la lingvo de Mervin Alen. Humiliga, naŭzige servila ago, kvazaŭ kisi piedon ĵus albatintan, memsubmeto, kapitulaco — sed la nuraj elektoj estis inter tio kaj daŭre porti la formon de Ralston Eberi.

Mario ekstaris, marŝis al la fenestro, elpaŝis sur la flugĉaran platformon, gestis al flugtaksio ke ĝi haltu.

Dek minutojn poste li staris ĉe adreso 5600-a sur avenuo Eksmor’ en Herbokamp’, la Domo de l’ Se. Ĝardenisto tondanta la heĝon okulumis lin kun malfido. Li suprenpaŝis laŭ la domvojeto, premis la butonon.

Estis, kiel antaŭe, mallongan atendadon, la nevidata serĉ-observado de spionaj aparatoj. La suno brilis varme sur lian dorson, al liaj oreloj venis la *ŝirrrr*-sono de l’ heĝotondiloj de l’ ĝardenisto.

La pordo malfermiĝis.

“Bonvolu enveni,” diris la mola komerca voĉo.

Laŭ la koridoro, en la verdan kaj brunan akceptejon kun la pentraĵoj de la tri severaj nudulinoj antaŭ la antikva arbaro.

La virino fabele belega envenis; Mario rigardis refoje en la larĝajn klarajn okulojn kiuj kondukis al ia neordinara cerbo. Kies cerbo? scivolis Mario. Ĉu de viro aŭ de virino?

Ne plu sentis Mario la emon ke li ekscitu ŝin, enamigu ŝin. Ŝi estis nenatura, ia aĵo.

“Kion vi deziras?”

“Nu, do, vi konas min?”

“Pri kiu komerco?”

“Vi estas profitoĉasa komerco, ĉu ne?”

“Jes.”

“Mia komerco signifas pri mono.”

“Bonvolu sidiĝi.” Ŝi turnis sin; Mario rigardis la sveltan korpon forirantan. Ŝi marŝis malpeze, gracie, en malaltaj elastaj senŝnuraj ŝuetoj. Li fariĝis konscia pri la korpo de Eberi. La glandoj de la maljuna kapro estis sufiĉe aktivaj. Mario kontraŭbatalis aflikton naŭziĝan.

La virino revenis. “Sekvu min, mi petas.”

Mervin Alen ricevis lin afable, kvankam ne strebigante sin sufiĉe por oferti manprenon.

“Saluton, s-ro Mario. Mi iom atendis ke vi vizitos nin. Sidiĝu. Kiel glatas la aferoj? Ĉu vi ĝuas vian sperton?”

“Ne aparte. Mi agnoskas ke vi provizis al mi tre stimulan aventuron. Kaj ja — nun dum mi pripensas retrotempe — neniam faris vi falsajn reklamo-informojn.”

Alen ridetis malvarmetan nedaŭran rideton. Kaj Mario scivolis pri kies cerbo tiu ĉi bela korpo nun ĉirkaŭas.

“Via sinteno estas neordinare filozofeca,” diris Alen. “La plimulto de niaj klientoj ne ekkonas ke ni estas donintaj al ili precize tion, por kio ili pagis. La esencoj de aventuro estas surpriziĝo, danĝero, kaj rezulto kiu dependas tute de la propraj streboj.”

“Preterdube,” rimarkis Mario, “tio, kion vi ofertas estas ĝuste precize tiel. Sed ne miskomprenu min. Se mi pretendus amikecon, tio ne estus sincera konduto. Malgraŭ ĉiuj raciaj argumentoj, mi sentas fortan rankoron. Mi mortigus vin senbedaŭre — eĉ kvankam tio, kiel vi certe montros — ke mi alprenis la tuton sur mi mem.”

“Precize.”

“Flanke de miaj propraj sentoj, ni havas certan komunecon de interesoj, kiun mi volas ekspluati. Vi deziras monon. Mi deziras mian propran korpon. Mi venis informiĝi pri tio, per kiuj cirkonstancoj niaj deziroj povus esti ambaŭ satigitaj.”

La vizaĝo de Alen estis ĝoja, li ridegis kun plena ĝuo. “Mario, vi amuzas min. Mi aŭdis ja multajn proponojn, sed neniujn tiel formalajn, tiel elegantajn. Jes, mi deziras monon. Vi deziras la korpon al kiu vi jam delonge kutimiĝis. Mi bedaŭras diri ke via antaŭa korpo nun estas la propraĵo de iu alia, kaj mi dubas ke ni povus persvadi lin pri ĝia redono. Sed — mi povas vendi al vi alian korpon, sanan, belan, kontraŭ nia kutima prezo. Dek milionoj da dolaroj. Kontraŭ tridek milionoj mi ofertos al vi ke vi elektu el ĉio havebla — korpon kian la mia, ekzemple. La Empirea Turo estas treege altkosta projekto.”

Mario diris, “Mi scivolas, kiel oni efikas tian ĉi interŝanĝon? Mi ne notas ajnan cikatron aŭ alian signon pri cerba grefto. Kio plej probable neniel eblas ajnakaze.”

Mervin Alen kapjesis. “Estus tede, interplekti kelke da milionoj da paroj da nervoj. Ĉu vi scias pri la fiziologio de la cerbo?”

“Ne,” diris Mario. “Ĝi estas komplika, tio sumas la tuton de miaj scioj pri tio — tiom, kiom mi ĝis nun eĉ volis scii.”

Alen kliniĝis malantaŭen, ripozetis, parolis rapide, kvazaŭ laŭ parkero. “La cerbo dividiĝas laŭ tri partoj, la medolo, la cerbeto — tiuj du regas la pretervolaj movoj kaj refleksoj — kaj la cerebro, la sidloko de memoro, inteligenteco, personeco. Pensado okazas en la cerbo per la sama metodo laŭ kiu pensado okazas en meĥanikaj cerboj, per la elektado inter vojoj tra sinsekva aro el la individuaj nervoĉeloj.

“En psiko-manka cerbo, la relativa facileco de ĉiuj eblaj cirkvitoj samas, kaj la elektraj potencialoj de ĉiaj kaj ĉiuj ĉeloj samas.

“La nia teĥnika metodo dividiĝas laŭ sinsekva aro de paŝoj — malkovritaj, mi povas aldoni, hazarde dum programo de esplorado en tute alia kampo. Unuapaŝe, oni metas la kapon de paciento en kavaĵo de io, kion la originaj esploristoj nomis *golasmo** — organika kristalo kun granda nombro da ĉirkaŭaj fibroj. Inter la golasma kavaĵo kaj la cerbo estas kelke da tavoloj — harara, haŭtohista, osta, tri apartaj membranoj, kaj ankaŭ interplektaĵo de sangotuboj, tre komplike. Tamen, la nervaj ĉeloj unikas pro tio ke ili havas altan elektran potencialon, kaj por praktikaj kialoj la aliaj interkuŝantaj ĉeloj neniel obstaklas.

“Duapaŝe, per komplika skan-metodo, ni kopias ĉiujn statojn de la nervaj interĉeloj sur la golasmon, dividante la rilatojn laŭ struktura mapo komuna inter ĉiuj homoj.

“Triapaŝe, oni interŝanĝas la kavojn de golasmo, kaj retrofaras la metodon, la cerbo de homo A ekipiĝas per la potenciajoj de homo B, kaj tiu de B per tiuj de A. La tuta farado bezonas nur kelke da minutoj. Neĥirurge, sendolore, senvunde. Homo A ricevas la psikon kaj memorojn de homo B, kaj homo B alprenas tiujn de homo A.”

Malrapide Mario frotis al si la grasan mentonon. “Ĉu vi volas diri, ke mi — mi — neniel estas Roland Mario? Ke pensi la pensojn de Roland Mario estas nura iluzio? Kaj ke neniu ĉelo en tiu ĉi korpo devenas el Roland Mario?”

“Ne eĉ la plej malgranda spiraĵo. Vi estas tute — mi pensu. Via nomo estas Ralston Eberi, mi kredas. Ĉiu aparta ĉeleto de vi estas Ralston Eberi. Vi fakte estas Ralston Eberi, ekipita per la memoroj de Roland Mario.”

“Sed mia glanda strukturo? Ĉu tio ne modifos la psikon de Roland Mario? Preter ĉio, la agoj de viro ne devenas tute de ties cerbo sola, sed de intermiksita sintezo.”

“Ĝuste tiel,” diris Alen. “La efekto progresados dum tempopaso. Vi grade ŝanĝiĝos, fariĝos pli tiel kiel estis Ralston Eberi antaŭ ol okazis la interŝanĝo. Kaj same okazos je la korpo de Roland Mario. La tutaj ŝanĝecoj dependos de la relativaj fortecoj inter medioj kontraŭ genetikaĵoj en ambaŭ viaj du personecoj.”

Mario ridetis. “Mi volas foriri el tiu ĉi korpo baldaŭ. Mi ne ŝatas tion, kion jam mi eklernis pri Eberi.”

“Alportu dek milionojn da dolaroj,” diris Mervin Alen. “La Domo de l’ Se ekzistas por nur unu celo — alporti monon.”

Mario inspekte rigardis zorge al Alen, notis la solidan senmakulan haŭton, la belan figuron de la vizaĝo, kranio, mieno.

“Por kio do vi bezonas tiom multege da mono? Kial, inter ĉiuj eblaj kialoj, oni konstruu Turon Empirean?”

“Mi faras tion kiel ludon. Ĝi amuzas min. Mi tediĝis. Mi jam esploris multajn korpojn, multajn ekzistecojn. Tiu ĉi korpo estas al mi la dek kvara. Mi ekzercis jam povon. Al mi ne gravas tiu sento. Ĝia premo agacas min. Mi neniel suferas psikozon. Mi ne eĉ agas senkompate. En mia komerco, kion perdas unu viro, tion gajnas la alia. Ambaŭ valoroj egalas.”

“Sed estas rabe!” protestis Mario amare. “Ŝteli jarojn for de la vivo de unu viro por transdoni al ies alia.”

Alen gestis ŝultroleve. “La korpoj vivas same longe mezurite laŭ la sumo. La tuta rezulto ja egalas. Nenio ŝanĝiĝas krom la moviĝo de memoroj. Preter ĉio, eble mi estas, laŭ la ĵargono de metafiziko, solipsisto. Laŭ la tuto de miaj sentoj — laŭ miaj okuloj, laŭ mia cerbo — mi estas la unu sola vera individuo, la unu sola konscia intelekto.” Liaj okuloj parte fermiĝis. “Kiel alie povus esti ke mi — mi — estis elektita inter tiom multe da aliaj por sperti tian ĉi magie specialan vivon, kion mi ja spertas?”

“Ba!” respondis Mario.

“Ĉiu amuzas sin laŭ sia plej bona kapablo. Mia nuna intereso estas konstrui la Turon Empirean.” Lia voĉo profundiĝis sonorile pro emocia suprenflugo. “Ĝi leviĝos ĝis kvin kilometroj en la ĉielon! En ĝi troviĝas bankeda ĉambro kun planko el alternaj arĝentaj kaj kupraj strioj, larĝa je duono da kilometro, interne alta je duono da kilometro, ĉirkaŭita de ok vitraj balkonoj. Estos ĝardenaj terasoj tiaj, kiaj neniuj aliaj sur la tero, kun fontanoj, akvofaloj, fluantaj riveretoj. Unu tuta etaĝo estos felando de la antikvaj tempoj, popoligita de belaj feinoj.

“Aliaj etaĝoj montros la teron laŭ staĝoj de ĝia historio. Estos muzeoj, konservejoj de diversaj muzikostiloj, ĉambroj por artistoj, laborejoj, laboratorioj por ĉiu konata scienca esplorado, sekcioj por vendobudoj. Estos belegaj ĉambroj kaj balkonoj destinitaj al nenio krom por esti travagataj, sekcioj celantaj — eble adoradon al Astarta. Estos koridoroj plenaj de ludiloj, cent restoracioj de gastronomoj, mil tavernoj vendantaj likvajn sonĝojn; koridoregoj por vidado, aŭdado, ripozado.”

Diris Mario, “Kaj kio post vi tediĝos pri la Turo Empirea?”

Mervin Alen ĵetis sin malantaŭen en la seĝo. “Nu, Mario, vi tuŝas al mi je vunda loko. Preterdube io sugestos sin. Nur se ni povus eskapi de l’ tero, povus flugi preter la nudaj rokoj de la planedoj, al aliaj steloj, aliaj vivaĵoj. Se tiel, ne plu estos kialo por ia Domo de l’ Se.”

Mario frotis al si la grasan vangon, okulumis al Alen pensoplene. “Ĉu vi mem inventis tiun ĉi teĥnikon?”

“Mi kaj kvar aliaj kune estis esplora teamo. Ĉiuj aliaj jam mortis. Mi sola nun konas la teĥnologion.”

“Kaj via sekretariino? Ĉu ŝi estas unu el viaj ŝanĝitoj?”

“Ne,” diris Mervin Alen. “Tejn estas tio kio ŝi estas. Ŝi vivas por malami. Ĉu vi kredis min ŝia amato? Ne,” kaj li ridetis malforte. “Ne tio mi laŭ ajna difino. Ŝi deziras pri detruo, morto. Ino brila nur ĉe la surfaco. Interne ŝi estas malhela kaj detruema, kiel guto de varmega oleo.”

Mario jam ensorbis tro multe da faktoj, tro multe da informo. Li estis jam preteririnta sian kapablon pri plua konceptado. “Nu, mi ne prenos vian tempon multe plu. Mi volis esplori pri la mia situacio.”

“Nun vi scias. Mi bezonas monon. Jen, laŭ miaj scioj, la plej facila metodo por akiri ĝin grandakvante. Sed mi ankaŭ ofertas mian propran oportundonon pri rabato — banka nokto, binga vespero, kio ajn vi volas nomi ĝin.”

“Kiel, do?”

“Mi bezonas klientojn. Ju pli da klientoj, des pli da mono. Kompreneble mia reklamado ne povas trakti tion tre precize. Do mi ofertas unu senpagan ŝanĝiĝon, senpagan korpon kontraŭ alsendo de ses novaj klientoj.”

Mario mallarĝigis la okulojn. “Do — Sutloŭ akiras krediton kontraŭ Zaer kaj mi?”

Alen esprimis nekomprene. “Kiu estas Sutloŭ?”

“Vi ne konas pri Sutloŭ?”

“Neniam aŭdis la nomon.”

“Ĉu eble Ditmar?”

“Ho, li estas sukcesema, Ditmar estas. Dek mil aĉetis por li korpon kun progresinta cirozo. Du klientoj plu sufiĉas por ke li eskapu. Sed eble mi paroladas tro. Mi ne povas doni al vi plu da tempo, Mario. Bonan nokton.”

Dum li eliris, Mario haltis ĉe la ricevejo, rigardis malsupren al la vizaĝo de Tejn. Ŝi rigardis reciproke, vizaĝo kiel ŝtono, okuloj kiel safiroj. Mario subite sentis ekzaltiĝon, mistikecon, kvazaŭ li marŝis sur vivantan pensoŝtofon; li konis la povon de interna ekscio.

“Vi belas sed vi tiel malvarmas, kiel la subo de l’ maro.”

“Jen la pordo kondukanta eksteren.”

“Via beleco estas tiom nova kaj rompiĝema afero — surfaco dika je nura milimetro. Du viŝoj per tranĉilo ŝanĝus

vin en teruraĵon, ian de kiu homoj forturnus la rigardon dum vi pasus.”

Ŝi malfermis la buŝon, fermis ĝin, levis sin stari, diris, “Iru jenen por eliri, sinjoro.”

Mario etendis manon, spertis ekvidon de la grasaj malfirmaj fingroj de Ralston Eberi, grimacis, reprenis la manojn. “Mi ne povus tuŝi vin — per tiuj ĉi manoj.”

“Nek per ajnaj aliaj,” ŝi diris trans la malvarmeta distanco de sia propra ekzisteco.

Li pasis ŝin alirante la pordon. “Se oni vidus la plej belan estulinon kiu povas ekzisti, se ŝi havus animon kiel roka kristalo, se ŝi defius ke oni prenu ŝin, rompu ŝin, kaj oni estus perdita en grasa malbelega korpo el kaĉo — ”

Ŝia mieno ŝanĝiĝetis iomete, laŭ kiu direkto li ne povis certiĝi. “Jen la Domo de l’ Se,” ŝi diris. “Kaj vi ja estas grasa malbelega kaĉaĵo.”

Li foriris senparole. Ŝi glitis ferme la pordon. Mario gestis ŝultroleve, sed la vizaĝo de Ralston Eberi bruliĝis en varma ardeco de humiliĝo. Ne estis amo, nenia penso pri amo. Nenio pli troviĝis en la defio, multe tiel kiel la defio de monto al grimpistoj kiuj supreniras ĝian altecon, rabas la sekretojn de ĝiaj malebenaĵoj, mastrumas ĝian supron. Tejn, tiom malvarma kiom la fora flanko de l’ luno!

Iru for, diris akre la cerbo de Mario, disiĝu eskape for de l’ obsedo. Pufeco, inaj korpoj, forgesu ilin. Ĉu la nuna malordo ne jam sufiĉe komplikas?

# 6

Ĉe la pordo de la Domo de l' Se Mario luis flugtaksion al la 19-a Marŝaŭma Placo — grandega domo el rosa marmoro, multepinta, voluta, tiel troe detaloplena kiel ĉiuj aliaj posedaĵoj de Ralston Eberi. Li dikfingrumis la serurotruon. La linioformoj kongruis al la identigaj desegnoj, la pordo ekglitis malantaŭen. Mario eniris.

La fotografio jam preparis lin pri lia familio. Florence Eberi renkontis lin kun timeta suspektemo; la filoj estis malafektaj, pasive malamikaj. La filino ŝajnis havi neniajn ajn emociojn, krom konstanta kvalito de malkomprena surprizo.

Dum vespermanĝo, Mario elvokis koleron de la korpo de Elberi per manĝi nenion krom salato el laktuko kun karotoj kaj vinagro. Lia familio konfuziĝis.

"Ĉu vi sentas sane, Ralston?" demandis lia edzino.

"Tre bone."

"Vi ne manĝas."

"Mi eksekvas dieton. Mi deprenos la lardon el tiu ĉi malbelega korpo."

Ok okuloj ekelstaris, kvar paroj da tranĉiloj kaj forkoj haltiĝis kvazaŭ ekglaciiĝinte.

Mario daŭrigis trankvile, "Okazos kelkaj ŝanĝoj ĉi tie. Tro multe da facila vivado estas malsanige al homo." Li frontigis sian parolon al la du junaj viroj, ambaŭ samaj kun blankaj vizaĝoj, pastecaj vangoj, pufaj lipoj. "Vi junuloj, do — mi ne volas trakti vin misforte. Preter ĉio, ne estas via kulpo naskiĝi kiel filoj de Ralston Eberi. Sed ĉu vi scias pri tio, kion signifas vivtenadi per ŝvite labori?"

Luter, la pli maljuna, ekparolis kun digno. "Ni laboras per la ŝvito de niaj cerboj."

"Diru pli al mi pri tio," diris Mario.

La okuloj de Luter montris koleron. "Mi elfaras pli da laboro en unu semajno ol vi faras dum tuta jaro."

"Kie?"

"Kie? Nu, en la vitraĵofareja laborkorto. Kie alie?" Jen fajra sento, pli ol tio kion Mario atendis.

Ralston la 2-a diris per raŭka kolerema voĉo, "Ni pagas al vi kontraŭ niaj ĉambroj kaj manĝoj, ni ne ŝuldas al vi eĉ cendon. Se vi ne ŝatas la aranĝojn ĝuste tiel, kiel ili nun estas, ni foriros."

Mario eksentis vundiĝon. Li misjuĝis la infanojn de Eberi. Blankaj vizaĝoj, pastecaj vangoj, ne necese signifas pri pastecaj spiritoj. Estos pli bone, ke li entenu la proprajn sentojn, bazigu sian konversacion nur sur konataj faktoj. Li diris milde. "Pardonu, mi ne intencis ofendi vin. Ĉesu al mi pagi kontraŭ viaj ĉambroj kaj kostoj. Elspezu tion kontraŭ ion utilan."

Li ekrigardis kun suspekta scivolemo al Klidia, la filino de Eberi. Ŝi montris duone vakuan rideton. Pli bone ke li tenu la buŝon fermita. Povas okazi ke ŝi ellaboras dek du horojn ĉiutage je servado al la socio.

Mario tamen trovis ke li sentas agacan premiĝon en la domo de Eberi. Malgraŭ vivante en la korpo de Eberi, la sento de liaj vestoj, liaj intimaj ekipaĵoj tamen profunde maltrankviligis lin. Li ne povis devigi sin uzi la razilon kaj dentobroson de Eberi. Pritrakti la necesojn de la korpo de Ralston Eberi al li malbongustis plej ekskvizite. Li trovis, kun ekĉeso de kreskinta timo, ke la propra litoĉambro malsamis ol tiu de Florens Eberi.

Li vekiĝis tre frue la sekvan matenon, apenaŭ post sunleviĝo, malpacience forlasis la domon, matenmanĝis oranĝosukon kaj sekajn toastojn ĉe eta restoracio. La stomako de Eberi protestis la malgrandan kvanton per kolera tondretado. La gamboj de Eberi plendis tiam, kiam Mario decidis marŝi laŭ la piedira strio anstataŭ voki flugtaksion.

Li malŝlosis kaj eniris la malplenan oficejon de Eberia Flugĉaro, vagis sencele tien kaj reen laŭlonge en la ĉambraro, pensanta. Ankoraŭ pensante, li eniris sian propran oficoĉambron. La malordo, la aro de rokokaj malbelaĵoj,

agacis lin. Li vokis ke purigisto venu, mangeste montris la ĉambron. “Forprenu ĉiujn tiujn troornamaĵojn. Vi mem hejmenportu ilin, alproprigu ilin. Kion ajn vi ne deziras, tion forĵetu. Lasu resti nur la labortablon, kelke da seĝoj. La restaĵo — for!”

Li eksidis kline malantaŭen, pensante. Metodoj, planoj.

Kiajn armilojn povus li uzi?

Li desegnis markojn sur paperfolio.

Kiel li povus ataki?

Eble la leĝuloj povus lin helpi — iel. Eble la AKP. Sed kiun leĝon kontraŭis Mervin Alen? Precedentoj mankis. La Domo de l’ Se vendas aventuron. Se kliento aĉetis multon pli ol tio kion li atendis, tiu rajtas kulpigi nur sin mem.

Mono, mono, mono. Ĝi ne povas reaĉeti lian propran korpon. Li bezonis movigan ilon, armilon, premon kion li povos apliki.

Li teleekrane vokis publikan informoservejon, petis la informotekon pri ‘golasmo’. Nekonata.

Li faris kelke pli da markoj, desegnis per sensignifaj strekoj; kie troviĝas mankoj en la defendilaro de Mervin Alen? La Domo de l’ Se, la Turo Empirea. Fojon plu li teleekranis la informejon, petis la tekojn traktantajn pri la Turo Empirea. Tajpaĵoj ekmontriĝis sur lia ekrano.

> La Turo Empirea estos multcela konstruaĵo ĉe loko en Herbokamp’. La plej alta etaĝo situos kvin kilometrojn super la grundo. La arĥitekta firmao estas Grupo Kubal’, Korporacio, ĉe Lankestero. Kontraktoj por la fundamento jam interkonsentiĝis je la firmao Lorni’ kaj Libel’ —”

Mario tuŝis la ŝanĝoklavon; la ekrano montris arĥitektan krajonan desegnon — maldika konstruaĵo etendiĝanta supren tra tavolo de nuboj ĝis la malplena blua ĉielo. Mario tuŝis la ŝanĝoklavon.

Nun venis detalaj informoj, pri la pezeco, volumeno, komparoj kontraŭ la piramidoj, la digego ĉe la Ĉilung-rivera interkrutejo, la konstruaĵego Skaterholm’ ĉe Rono, la Turego Haŭke’, la Merkato de l’ Mond’ ĉe Daressalamo.

Mario premis la komuniko-klavon. Nenia respondo. Ankoraŭ tro frue. Malpacienca nun, li mendis kafon, eltrinkis du tasojn, laŭmarŝante la oficoĉambron pro nervozeco.

Finfine voĉo respondis lian signalon. “Kiam s-ro Koreŭs envenos, mi tiam volos alparoli lin.”

Kvin minutojn poste, Luis Koreŭs frapis ĉe lia pordo.

“Bonmatenon, Luis,” diris Mario.

“Bonmatenon s-ro Eberi,” diris Koreŭs kun strikte gardita mieno, kvazaŭ atendanta informon plej ege malbonan.

Mario diris, “Luis, mi deziras konsilon...ĉu vi iam ajn aŭdis pri la Grupo Kubal’, Korporacio? Arĥitektoj?”

“Ne. Mi ne povas diri, ke mi tion priaŭdis.”

“Mi ne volas distri vin for de la via laboro,” diris Mario, “sed mi volas akiri regopovon super tiu firmao. Kviete. Sekrete, eĉ. Mi volas ke vi faru kelkajn kvietajn enketojn. Ne uzu mian nomon. Elaĉetu tiom multe da voĉdonrajtaj akcioj kiom nun merkate haveblas. Pagu tiom multe kiom necesas, sed akiru la akciojn. Kaj ne menciu mian nomon.”

La vizaĝo de Koreŭs fariĝis masko de amuziĝo, kun amara tordiĝo ĉe la buŝo. “Kion mi uzu por mono?”

Mario frotis al si la malstriktajn faldaĵojn ĉirkaŭ la mandiblo. “Hm! Ĉu ne ekzistas rezervita konto, ia ŝparaĵo ĉe l’ banko?”

Koreŭs rigardis lin strange.

“Decas, ke vi mem prisciu.”

Mario strabis flanken. Tio veras, decas ke li jam sciu. Al Luis Koreŭs, jen sidas antaŭ li Ralston Eberi — la arbitrema, ordonema Ralston Eberi. Mario diris, “Enketu pri tio, kio ajn vi povas eltrovi, Luis, mi petas.”

Koreŭs diris, “Atendu minuton.” Li eliris la ĉambron. Li revenis kun peco de papero.

“Mi estis kalkulanta la kostojn de planitaj ŝanĝoj pri la fabriko. Estos necese ke ni pruntu. Tio ne estas afero mia, kion vi jam elfaris pri la konto.”

Mario ridetis malamuzite. “Vi neniel povus kompreni, Luis. Kaj se mi dirus tion al vi, min vi ne kredus. Forgesu pri tio. Ĝi ne plu estas.”

“La Sudafrika agentejo hieraŭ transsendis sumon valora je iom pli ol miliono. Tio apenaŭ eĉ iomete helpos pri la fabrika rearanĝo.”

Mario faris geston de malpacienco. “Ni faros pruntoprenon. Ĝuste nun vi havas milionon. Esploru pri tio, kiom multe da la akcioj de Grupo Kubal’ vi povos aĉeti.”

Koreŭs foriris la ĉambron sen diri eĉ vorton. Mario grumblis murmure al si mem, “Kredas min freneza. Pensas ke eble li plaĉumu min...”

Dum la tuta mateno Mario ekstudetis malnovajn tekojn tra sia ekrano, provante elpreni la fadenon de la komercoj de Eberi. Estis multaj postsignoj de la hastaj elraboj de Eberi — la interŝanĝado de ĉekoj kontraŭ valoro, forvendado de valoraj havaĵoj, transsendo de kontraŭ-valoroperdaj kontoj en lian propran konton. Sed malgraŭ tiuj forprenegoj, la firmao Eberia Flugĉaro tamen ŝajnis esti finance sekura. Ĝi ankoraŭ tenis hipotekojn, koncesiojn, kontraktojn valorajn je multoble pli ol tiu kvanto da mono kion Eberi sukcesis forpreni.

Tediĝinta pri la tekoj, li mendis pli da kafo, surpaŝadis la plankon. Lia menso konsideris pri la 19-a Marŝaŭma Placo. Li pensis pri la kulpigontaj okuloj de Florens Eberi, pri la malamikeco de Luter kaj Ralston la 2-a. Kaj Mario al Eberi priesperis destinon inferian. La familio de Eberi estis nenia respondeco, nenia afero propra al li. Li televokis al Florens Eberi.

“Florens, mi ne plu vivados ĉehejme.” Li provis paroli kompate.

Ŝi diris, “Tiel mi kredis.”

Mario diris rapide, “Mi pensas, ke ĉion konsiderante, estos pli bone je vi, ke ni divorciĝu. Mi ne kontraŭstaros tion; vi rajtas havi tiom multe da mono kiom vi deziras.”

Ŝi montris al li senemocian silentan rigardadon. “Tiel mi kredis,” ŝi diris refoje. La ekrana kontakto ekrompiĝis.

Koreŭs revenis tuj post tagmanĝo. Estis varme, Koreŭs estis marŝinta la piedstrion, lia vizaĝo briletis pro ŝviteroj.

Li subenĵetis orname tranĉitan plastan faldpoŝon sur la tablon, montrante la dentojn en triumfa rideto. “Jen ili. Mi ne scias tion, kion vi planas fari per tio, sed jen ili. Kvindek du procentoj da la akcioj. Mi elaĉetis la nevon de maljunulo Kubal kaj du el la proprietularo. Mi kontaktis ilin ĝustatempe; ili ĝojis vendi. Ili malŝatas pri tio, kien la komerco progresas. Maljunulo Kubal donas ĉiom da sia propra tempo al la Turo Empirea, kaj ne akceptas ajnan repagon kontraŭ la laboro. Diras, ke la honoro de la laboro sufiĉas. La nevo ne kuraĝas dispute batali kontraŭ maljunulo Kubal, sed li ja ĝojis elvendi sin. Estis same pri Kon kaj Ĉiver, la kunproprietuloj. La laborpreno de la Turo Empirea ne eĉ repagas ĉiutagajn elspezojn.”

“Hm! Kiom da jaroj havas Kubal?”

“Li devas esti ĉirkaŭ okdekjara. Viveca maljuna knabo li, plena de vinagro.”

Honoro de la laboro! pensis Mario. Neniaĵo! La repago al maljuna Kubal estos juna korpo. Voĉe li diris, “Luis, ĉu vi iam ajn vidis Kubalon?”

“Ne, li apenaŭ montras sin ĉirkaŭ la oficejo. Li envicigas la laborajn kontraktojn, la inĝeniera laboro okazas ĉe la oficejo.”

“Luis,” diris Mario, “jen tio, kion mi volas ke vi faru. Surlistigu la akciaron ĉe la registaro nome de vi mem, donu

al mi transdonan kontrakton sur kiu dato mankas, kiun ni ne surlistigos. Teleekrane kontaktu la oficejon, alparolu la ĝeneralan oficejestron. Diru al li ke vi sendos min tien. Mi estas nur amiko via al kiu vi ŝuldas favoraĵon. Diru al li ke li devos min doni tutan kaj finan aŭtoritaton super ajna laboro kion mi deziras alpreni. Ĉu komprenite?”

Koreŭs okulumis Marion kvazaŭ li atendis ke la dika korpo eksplodos en fajron. “Kion ajn vi deziras. Mi supozas, ke vi scias pri tio, kion vi faras.”

Mario ridetis bedaŭre. “Mi ne povas elpensi pluajn farendaĵojn. Intertempe, ellaborigu vian novan desegnon. Vi mem estru pri tio.”

Mario vestis la korpon de Ralston Eberi per modesta bluo, sin prezentis ĉe la oficejo de la Grupo Kubal’, tuta etaĝo en la konstruaĵo Rotenburgo. Li demandis al la akceptistino pri la oficejestro kaj kondukiĝis enĉambren al alta kvardek kelkjara viro havanta vizaĝon delikate flavecan. Li havis frunton surŝutitan de efelidoj, maldensajn sable blondajn harojn, kaj li respondis al la demandoj de Mario kun pikeco kaj malamikeco.

“Mia nomo estas Taŭsig... Ne, mi estas nur la oficejestro. Kon antaŭe estris la desegnoĉambron, Ĉiver la inĝenierajn aferojn. Ili ambaŭ eksiĝis. La oficejo estas malordegaĵo. Mi laboris ĉi tie dek du jarojn.”

Mario certigis al li, ke ne ekzistas plano por lin superpaŝi. “Ne, s-ro Taŭsig, vi daŭros kiel la estro. Mi parolas por la nova regado. Vi daŭre regu la oficejon — pri ĝeneralaj aferoj, ĉiuj novaj kontraktoj — tiel same, kiel ĝis nun. Via titolo nun estu ĝenerala direktoro. Mi volas prilabori la Turon Empirean — sen sperti ajnan altrudon. Mi ne trudos al vi; vi ne trudos al mi. Ĉu agrable? Post elkonstruiĝos la Turo Empirea, mi foriros kaj la oficejo refariĝos tute via.”

La vizaĝo de Taŭsig malstriktiĝis ĉirkaŭ sulkoj esprimantaj suspektemon. “Ne multe alia okazas krom pri la Turo Empirea. Nature, tio mem estas grandega afero. Pli granda ol ajna sola viro.”

Mario rimarkis ke li ne planis desegni la tutan aferon sur desegnobenko sia propra, kaj la vizaĝo de Taŭsig striktiĝis refoje, reage al la ŝajna sarkasmo. Ne, diris Mario, li nur volis esti la plej supera aŭtoritato je tiu aparta laboro, super ĉio krom la volo de la konstruprojekta kliento.

“Unu lasta afero,” diris Mario. “Tiu ĉi interparolo, kiun ni ĵus faris inter ni, devas esti,” li montris kline al Taŭsig flankan palpebrumon, “strikte privata. Vi prezentu min tiel, kiel novan dungiton, nur tiel. Nenia vorto pri la nova reganto. Nenia vorto pri tio, ke li estas amiko mia. Forgesu tion. Ĉu komprenite?”

Taŭsig konsentis kun amara digneco.

“Mi deziras kvietecon,” diris Mario pensoplene. “Mi deziras nenian kontakton kun la klientoj. La intervjuoj kun ĵurnalistoj — vi traktu tiujn. Mi estados nevidebla inter la fonaĵoj.”

“Ĝuste tiel, laŭ via diro,” diris Taŭsig.

# 7

Turo Empirea fariĝis parto de la vivo de Mario tiom multe, kiom lia spirado, lia pulso. Dek du horojn tage, dek tri, dek kvar, la grasa korpo de Eberi sidadis kurbe ĉe la longa laborbenko, kaj la okuloj de Eberi sentis pike kaj larmis pro tralaboradi longajn kostoprognozojn, desegnodetalojn, planojn pri etaĝaj plankoaranĝoj. Sur la granda ekrano unu metron for de liaj okuloj fluadis la laboraĵoj de dudek kvar desegnistoj, ok cent inĝenieroj, artistoj, ornamistoj, metiistoj sennombraj, ĉiuj atendante lian oficialan aprobon. Sed lia regado estis minimuma, sindetenata, ne notita. Nur pri kelke da detaloj altrudis Mario, kaj tio nur kun tiel ega zorgo, tiel subtile, ke la ŝanĝoj restadis nekonataj.

La novaj konstru-teĥnikoj, la regado super materialoj, la ekzakta muldado de planŝeno* kaj parencaj substancoj, antaŭ-fabrikado, nepena transportado de masivaj membroj faris ke la konstruado de la Turo Empirea estu preskaŭ magie facila kaj rapida. Etaĝon post etaĝo ĝi etendiĝis en la ĉielon, kreskante tiel kvazaŭ nenormale grandega fazeol-burĝono. Ŝtalaj, betonaj, planŝenaj plankoj kaj muroj, magneziaj solivoj, flank-apogiloj, pilastroj, la nova vezikeca vitro por fenestroj — kunmetitaj por fari precizajn unuojn, hisitaj, metitaj ĝustaloke pere de ŝarĝ-helikopteroj.

Tutatage kaj tutanokte la blua brileco de la aŭtomataj veldiloj bruligis la ĉielon, kaj la fajreroj disŝutiĝis kontraŭ la steloj, kaj ĉiutage la esperanta masivaĵo puŝis sin pliproksimen al la malaltaj nuboj. Poste tra la malaltajn nubojn supren al la superaj niveloj. Suno ĉe iu etaĝo, pluvo ĉe alia fore malsupera. Supren je kilometro post kilometro, en la regionojn de aero kie la vento ĉiam fluadas tiel, kiel kremo, nehaltigita, ne intermiksita kun la varmeta fetoro de l’ tero.

Mario perdis sin pri la Turo Empirea. Li konis la amplekson de materialoj, la brilecojn de cent metaloj, la silkecan glaceon de planŝeno, la koloroj de la duon-valoraj mineraloj: jado, cinabro, malakito, agato, gagato, raraj porfiroj de sub la montaroj de antarktio. Mario forgesis sin, forgesis la Domon de l’ Se, forgesis pri Mervin Alen, pri Tejn, pri Luis Koreŭs kaj Eberia Flugĉaro, krom je spasmecaj, neinterligitaj periodoj kiam li fortiris sin de la Konstruaĵo Rotenburgo dum kelke da horoj.

Kaj kelkafoje, kiam li estis plej envolvita, li trovis kun ekhororo ke lia voĉo, lia vidpunkto, liaj gestoj ne estis tiuj de Roland Mario. La dumvivaj refleksoj kaj kutimoj de Ralston Eberi prezentis sian efikecon. Kaj Roland Mario sentis pli fortan hastegon. Konstruu, konstruu, konstruu!

Kaj pri nenia alia loko laboris Mario pli zorge ol pri la 900a nivelo — la plej supera etaĝo, priskribita sur la indekso kiel oficejoj kaj vivoĉambroj por Mervin Alen. Kun la plej komplika atento al detaloj Mario planis la konstruadon, specifanta pri speciale konstruitaj solivoj, ventolaj ekipaĵoj, ĉiuj aparte fabrikitaj laŭ mezuroj de li mem desegnitaj.

Kaj tiel do la monatoj de la vivo de Mario ŝanĝiĝis laŭ sia naturo de estonteco en pasintecon, dum kiuj li fariĝis preskaŭ alkutimiĝinta al la korpo de Ralston Eberi.

Je iu marda nokto la personeco de Mario estis enmetita en la korpon de Ralston Eberi. Je merkreda mateno li vekiĝis. Je vendredo li strebadis sian menson en la oficejo de Eberia Flugĉaro ĉe la Bloko Etera, kaj la tria horo posttagmeza preterpasiĝis sen lia atento. Je vendreda vespero li pripensis la Oksfordan Terason, lian renkontiĝon kun Janier, Breŭ, la sennoma spirito en la malsana korpo nomata Ditmar. Kaj la sekvan mardon je la tria horo, Mario sidadis ĉe tablo sur la Oksforda Teraso.

Ses metrojn malproksime sidis Janiver, Breŭ, Ditmar. Kaj Mario pensis pri tiu tago antaŭa kiam la kvin sidadis mallaboreme en la sunbrilo. Kvar senkulpuloj kaj unu viro okulumante ilin malsate, prijuĝante la prezon kion alportos iliaj korpoj.

Du el tiuj korpoj li jam sukcesis akiri. Kaj Mario vidis ilin sidantaj kviete en la varmeta sunlumo, parolantaj malrapide — du el ili, almenaŭ, pacaj kaj sekuraj. Breaŭ parolis kun la kutima al li klinita pozo je sia kapo indikanta memfidon troan. Janiver estis malrapida kaj sobra, malordinara kunplektiĝo de rasaj trajtoj. Kaj jen Ditmar, fremda spirito rigardanta sardone el malgrasa, malhele bronza korpo. Malsana korpo, kiun viro paginta dek mil dolarojn konsiderus malbona marĉandaĵo. Ditmar aĉetis aventuron — aventuron faritan el doloro kaj timo. Dum momento, la akre malmola emocio de Mario malstrikiĝis sufiĉe por agnoski ke pro sopiri al sia propra vivo en sia propra korpo, viro povus facile forgesi pri moralo, egaleco. Dronanto strangolas estuntan saviston.

Mario trinketis bieron sendecide. Ĉu decas ke li iru kunsidi je la triopo? Tio ne povus kaŭzi malbonon. Detenis lin kurioza malvolo, malpacienciga, emocio preskaŭ honta. Alparoli ĉi tiujn virojn, informu ilin pri kio ilian monon aĉetis je li — Mario sentis la varmetan gluecon, la internan kirliĝon de ekstrema embaraso. Je subita penso, Mario serĉis la proksimajn tablojn. Zaer. Li preskaŭ forgesis pri Pit Pete Zaer. La menso de milionulo loĝas en la korpo de Zaer. Ĉu la menso de Zaer alportu la korpon de la milionulo ĉi tien?

Mario vidis maljunan viron kies okuloj esprimis mankecon ĉe tablo malproksima. Mario fiksrigardis, observis ties ĉiujn movojn. La maljuna viro ekbrulis cigaredon, inhalis, estingis la alumeton per fingra ĵeto — unu el la kutimoj de Zaer. Cigaredo inter la fingroj, li levis la koktelon, trikis, unue, due, metis la cigaredon en la buŝon, malsuprenmetis la glason. Manieroj Zaer-aj.

Mario levis sin, transiris, prenis sidlokon. La maljuna viro suprenrigardis kun avaro, poste kolere, per okuloj ruĝaj ĉe randoj. La haŭto estis kalcine flava, la buŝo estis griza. Zaer aĉetis eĉ malpli kontraŭ sia mono ol faris Mario.

“Ĉu vi nomiĝas Pit?” demandis Mario. “Laŭ kaŝaspekto?”

La buŝo de la maljunulo moviĝadis. La okuloj likviĝis preskaŭ plore. “Kiel — Kial vi diras tion?”

Mario diris, “Rigardu la tablon. Kiu alia mankas?”

“Roland Mario,” diris la maljunulo per voĉo malforta kaj raŭka. La ruĝaj okuloj strebe rigardis. *“Vi!”*

“Prave,”diris Mario, kun amara rideto. “Post unu/du semajnoj eble estos tri el ni, eble kvar.” Li gestis. “Rigardu ilin. Por kio ĉifoje skuas ili la ĵetkubojn?”

“Ni devas ilin haltigi,” raŭkis Zaer. “Ili ne *scias*.” Sed li ne moviĝis. Nek faris Mario. Estis tiel kiel devigi sin elpaŝi nudakorpe eksteren sur popolplenan straton.

Io rigida ĉirkaŭis, prenis firme je la cerbo de Mario. Li stariĝis. “Vi atendu ĉi tie,” li diris preskaŭ subvoĉe. “Mi provas meti haltilon al tiu afero.”

Li amblis trans la sunplena teraso, al la tablon kie Janiver estis ruliganta ĵetkubojn. Mario etendis suben la manon, forprenis la signifoplenajn kubetojn.

Janniver rigardis supren per okuloj konfuzaj. Breŭ kubigis siajn rektajn kimrajn brovojn je komenciĝanta kolero. Ditmar, malridetanta, klinigis sin malantaŭen.

“Pardonu min,” diris Mario. “Ĉu mi rajtas demandi pri tio, kian decidon vi priskuas?”

Breŭ diris, “Afero privata. Tio vin ne koncernas.”

“Ĉu ĝi temas la Domon de l’ Se?”

Ses okuloj ekfiksrigardis.

“Jes,” diris Breŭ, post unu aŭ du sekundojn heziti.

Mario diris, “Mi estas amiko de Roland Mario. Mi portas mesaĝon de li.”

“Kio ĝi estas?”

“Li rekomendas restadi for de la Domo de l’ Se; ne malŝparu la monon. Fidu al neniu kiu sugestas ke oni tien iru.”

Breŭ nazblekis. “Neniu estas sugestanta ion ajn al iu ajn.”

“Kaj li diris, ke li kontaktos vin baldaŭ.”

Mario foriris sen adiaŭi, revenis tien kie li lasis Zaeron. La maljuna viro kun varme ruĝaj okuloj jam forestis.

Ralston Eberi havis multajn malamikojn, Mario lernadis. Estis je li granda nombro da gekonatuloj, neniuj amikoj. Kaj estis iu blank-vizaĝa estulo kiu vivadis ŝajne nur cele lin embuski, sibli fiaĵojn. Tiu estis Letja Arnold, antaŭa dunginto el la esploraj laboratorioj.

Mario malatentis la unuan kaj duan renkontiĝojn, kaj je la tria diris al la viro ke li eliru la vojon. "Venontfoje mi vokos la policon."

"Ujo de fiaĵoj," memfiere diris Arnold. "Neniel vi riskus! La fifamo vin ruinus, kaj vi tion scias, vi tion scias!"

Mario takse rigardis la viron pro scivolo. Memevidente li estis malsana. Lia spiraĵo malbonodoregis pro interna putriĝo. Sube de malstrikta grize bruna jako lia brusto estis kava, liaj ŝultroj situis puŝe antaŭen kiel ansoj de pordoj. Liaj okuloj koloris je kurioze reflekta nigro, tiom nigraj ke la pupiloj aspektis tiel kiel grandaj nigraj olivoj enpremitaj en du bovlojn el putre amara lakto.

"Jen policano nun," diris Arnold. "Voku lin, kotaĉ-nazulo, alvoku lin veni!"

Rapide Mario turniĝis, marŝis for, kaj la ridado de Arnold frapadis sonore kontraŭ la dorson.

Mario demandis al Kreanos pri Letja Arnold. "Kial mi ne risku ke li arestiĝu?"

Kaj Koreŭs turnis al li unu el siaj nun kutimaj, longe daŭraj pridemandaj esprim-rigardadoj. "Ĉu vi ne scias?"

Mario ekrememoris ke Koreŭs kredis ke li estas Eberi. Li frotis al si la frunton. "Mi estas forgesema, Luis. Diru al mi pri Letja Arnold."

"Li laboradis en la laboratorio nukleoradia, puzle eltrovis iun proceson fuelоŝparan. Nature ni havis rajton pri la patento." Koreŭs ridetis sardone. "Nature ni ne povis uzi tiun proceson, pro tio ke vi posedas akciojn de la korporacio Monda Aerpovo, kaj ankaŭ grandan blokon da akcioj de Nukleaĵo Lamar'. Arnold komencis uzi ĝin malpermesite. Ni procedis kontraŭ lin leĝe, venke akiris repagan sumon. Tio ekmetis Arnoldon en ŝuldegeco kaj li valoris je neniom ĉiam poste."

Mario diris kun subita energio, "Lasu min ekvidi tiun patenton, Luis."

Koreŭs parolis en kradon kaj minuton poste malferma koverto ekfalis el longatruo en ricevujon.

Koreŭs diris senvigle, "Miaopinie, Arnold estis aŭ freneza aŭ trompanto. Tiu ideo kiun li havis ne povus funkcii. Similis al eterna movforto."

Letja Arnold estis aŭtorinta mallongan enkondukon por la dokumenta tuto, tiu lasta estanta kolektaĵo el cirkvitoj kaj simboloj nekompreneblaj al Mario.

La enkonduko legiĝis:

> Rendimento de propulsado atingiĝas per elpeli ĉiam pli malgrandajn pezaĵojn je ĉiam pli altaj rapidecoj. La limo, unuakaze, estas elektrono. Elpeli ĝin je rapideco alproksimiĝanta tion de lumo, ni trovas ke ĝia maso pligrandiĝas laŭ la bone kontata efiko. Tiu ĉi propreco provizas al ni perfektan propulsan metodon, kapabla liberigi flugkapablon de ĝia dependeco sur pezaj ŝarĝoj de materialo por esti elpelataj je malalta rapideco. Unu elektronono magnete elpelita je rapideco preskaŭ-luma, aplikas tiom da antaŭen-direktata reago kiom multaj kilogramoj da ordinara fuelo …

Mario sciis kie renkonti je Letja Arnold. Tiu viro sidadis tagon post tago ĉe Placo Tangaro, sur benko apud la Pavilono Centjara. Mario haltiĝis antaŭ li, juna-maljuna viro kun esprimo emocie ekscitita.

Arnold suprenrigardis, levis sin avide, kvazaŭ li estus atakonta la korpon de Mario.

Mario per voĉo trankvila diris, "Arnold, atentu minuton. Vi pravas, mi malpravis."

La vizaĝo de Arnold ekfariĝis esprimo tiom malstrikta kiom akvosako. Atako bezonas rezisteco kontraŭ kio sin malmoligi. El ekmalforteco lia furiozo sin restarigis. Li malvolvigis sian nun-familiaran denuncegadon. Mario

aŭskultis minunton.

“Arnold, la proceso de vi inventita — ĉu vi ĝin provis praktike?”

“Certe, vi porko. Nature. Kompreneble. Kiel taksas vi min? Unu el viaj fanfaronemaj prostituitoj?”

“Ĝi funkcias, vi diras. Nun atentu, Arnold: ni nun laboras laŭ nova teorio ĉe Eberia Flugĉaro. Ni planas vendi valoron kontraŭ malalta prezo. Mi volas ke via proceso estu desegnata en la novan modelon. Se ĝi vere funkcias laŭ via diro. Kaj mi volas ke vi revenu labori por ni.”

Letja Arnold rikanis, lia tuta vizaĝo esprimanta gigantan ridmokon. “Metu tiun propuls-metodon en aerĉaron?? *Pah!* Uzu forĝ-martelilon por mortigi pulon? Kie la kapo via, kie la kapo? Ĝi estas kosmovehikla puŝilo; jen tie kien ni iros. En la kosmon!”

Jen okazo por ke Mario siavice estu retro-surprizita. “En la kosmon? Ĉu ĝi funkcios ene de l’ kosmo?” li demandis senforte.

“Funkcios? Jen plej perfekta ilo! Vi prenis la tuton de mia mono — vi!” La vortoj estis tiaj kiaj rostostangoj, gutantaj acidan venenon. “Se mi estus havanta mian monon nun, aŭ kun aŭ sen patento, mi estus jam nun en la kosmo. Mi estus veturinta ĉirkaŭ la steloj Centaŭro Alfa, Siriuso, Vego, Kapelo”

La viro estis pli ol duone freneza, pensis Mario. Li diris, “Oni ne povas iri pli rapide ol lumo.”

La voĉo de Letja Arnold fariĝis trankvila, ŝtele lerta. “Kiu diras ke mi ne povas? Vi ne scias pri tio kion mi scias, pork-aĉulo.”

Mario diris, “Ne, mi ne scias. Sed, ĉion ĉi flanke, mi estas ŝanĝita viro, Arnold. Mi volas ke vi forgesu ajnan maljuston kion mi al vi faris. Mi volas ke vi revenu labori ĉe Eberia Flugĉaro. Mi volas ke vi adaptigu la propulsilon por publika uzado.”

Refoje Arnold rikanis. “Kaj mortigi ĉion kio hazarde malantaŭus la vehiklon? Ĉiu elektrono pelita el la reaktoro estus kvazaŭa meteoro; okazus pafegoj de inkandeska aero; alfrapus tiel kiel kanona ferpilko. Ne, ne — enkosme. Jen tien kien la propulsilo destiniĝas …”

“Dungiĝas vi, se vi tion deziras,” diris Mario pacience. “La laboratorio atendas vin. Mi volas ke vi prilaboru tiun adapton. Necesas ke ekzistu iu speco de ŝirmilo.” Notante la striktan kunpremon de la buŝo de Arnold, li diris haste, “Se vi kredas ke vi povas rapidi supere ol lumo, bonege! Konstruu ŝipon kosmokapablan kaj mi mem ĝin prov-flugos. Sed elspezu la plejan parton de viaj laboroj por adapti ĝin adapti al publika uzado, jen ĉio kion mi petas.”

Arnold, pli malkoleriĝanta minuton post minuto, nun ekmontris la saman tipon de sardona malkredo kiun Mario notis je Koreŭs. “Frapu min, sed vi ja ŝanĝis al vi la kanton, Eberi. Antaŭe je vi estis mono, mono, mono. Se io ne al vi gajnus monon, ĝin vi plugus sube de l’ tero. Kio okazis al vi?”

“La Domo de l’ Se,” diris Mario. “Se vi alte taksas la mensan sanon, ne iru tien. Tamen, Dio scias,” kaj li rigardis la eluzitan korpon de Arnold, “apenaŭ vi povus pli malbone tiel sukcesi ol vi ĝis nun faradis.”

“Se min ĝi estus ŝanĝonta tiom multe kiom vin, mi ĝin preterpasos ja larĝadistance. Frapu min, sed vi estas preskaŭ homa.”

“Mi estas ŝanĝita viro,” diris Mario. “Nun, iru al Koreŭs, akiru antaŭpagon, vizitu kuraciston.”

Laŭvoje al la konstruaĵo Rotenburgo kaj la Grupo Kubal scivolo leviĝis pri la maniero laŭ kio Eberi uzadis la korpon propra al Mario. Ene de lia oficejo, li trastudis liston de agentejoj de enketado, decidis favore al Enketistaro Brannan, ilin telefonvokis, dungis ilin.

# 8

Enketisto Muris Slejd, kiu dungiĝis, estis malalta dik-muskola viro kun mallarĝa kapo. Du tagojn post kiam Mario vokis la agentejon Brenan-an, tiu alfrapis sin anoncante ĉe la laborejo de Grupo Kubal.

Mario trarigardis la kradon de la ŝlosita pordo, lasis eniri la enketiston, kiu diris sen antaŭekspliko, “Mi trovis la viron.”

“Bone,” diris Mario, reirante al sia seĝo. “Kion li faras?”

Slejd diris, per kvieta senakcenta voĉo, “Nenia mistero aŭ sekreto envolviĝas. Li ŝajne ŝanĝis la vivmodon dum ĉi pasintaj monatoj. Oni komprenigis min ke li antaŭe estis afabla bonulo, iom multe ŝatita, sen multo aparte notinda. Unu el la nevigla riĉularo. Nun li estas ulo aĉe vigla, virin-ĉasisto, kaj lin elĵetis ĉiu taverno en la urbo.”

Kompatinda korpo mia, pensis Mario. Laŭte: “Kie li vivas?”

“Li prenis al si apartamenton ĉe la Atlantika-Imperio, modere luksa establo. Estas mistero, kie akiris li sian monon.”

La Atlantika Imperio ŝajne fariĝis kutima rendevuejo de membroj de la Domo de l’ Se, pensis Mario. Li diris, “Mi deziras raportojn po semajno pri tiu ĉi viro. Nenio kompleksa — nur resumo pri tio, kie li spezas sian tempon. Nu, jen plua laboro por vi …”

La enketisto raportis pri la dua afero post semajno.

“Mervin Alen estas alinomaĵo. La viro naskiĝis nomata Lojd Paren, en Vieno. La virino estas lia fratino, Tejn Paren. Originale li estis pozisto vestomontra por fotistoj, ia grado de amoremulo — ĝis kelke da jaroj antaŭe. Tiam ekakiris li grandan sumon da mono. Nun, kiel probable vi scias, li estras la Domon de l’ Se. Mi malsukcesas eltrovi ion ajn pri tio. Ekzistas onidiroj, sed homoj prisciaj rifuzas paroli. La onidiroj ne agordas kun la historio de Paren, kio restas malkaŝata — nenia medikamentista aŭ psikosomatista pristudado. La virino originale estis studentino pri muziko, specialisto pri primativa muziko. Tiam, kiam Paren forlasis Vienon, ŝi kuniris. Paren loĝas ĉe 5600 Avenuo Eksmor’ — kio estas la Domo de l’ Se. Tejn Paren loĝas en apartamento domblokon for de li, kun maljuna viro, nenia parenco. Neniu el ili ŝajne havas intimajn amikojn, ili gastigas neniun, invitas neniun por interamuzi, neniam festas. Malmulto tie okazas.”

Mario pensadis kelkajn minutojn, sombre elrigardanta fenestron dum Muris Slejd sidis senreage atendanta instrukciojn de Mario. Finfine diris Mario, “Daŭrigu tiele. Informiĝu pli pri la maljunulo kunloĝanta kun Tejn Paren.”

Iun tagon Koreŭs vokis Marion teleekrane. “Jen, la nova modelo estas preskaŭ plendesegnita.” Lia sinteno estis duone trankvilig-cela, duone defia, kontestema al Mario ke li malaprobu la laboron.

“Mi opinias ke ni faris bonan laboron,” diris Koreŭs. “Vi deziris fari al ĝi la finan kontrolon.”

“Mi venos tuj,” diris Mario.

La nova desegnaĵo estis mane konstruita ĉe la fabrikejo Donik’ Rivero kaj flugita al Lankestron kaŝita per kamuflilo. Koreŭs estris la montradon kvazaŭ Mario estus ebla aĉetonto, je kiu li volis instigi entuziasmon.

“Per tiu ĉi desegno — kiun mi dumtempe nomis la Aer-Veturanto — ni celas uzi materialojn ordinarajn kaj malmultkostajn — pri kio, miaopinie, la malo servis ruine al la Flugĉaro Eberia. La monon ŝparitan ni elspezis por neta inĝenierismo, plusa spaco, sekureco. Notu la levig-helicojn, ili estas entenataj, preskaŭ ne altuŝeblaj. Neniu drinkinto hazarde alpaŝos al ili. Tiuj púlsatoroj, ili situas alte, kaj la direktaj ĵetiloj lokiĝas en netuŝeba situo. La framo kaj fuzelaĝo estas muldita el solida planŝeno, la unua tiel desegnita aerĉaro en la tuta merkato.”

Mario aŭskultis, kapjesis apreze de tempo al tempo. Ŝajnis ke Koreŭs desegnis bone. Li demandis, “Diru pri tiu forgesita homo — ĉu Arnold? Ĉu li sukcesis pri io ajn utila?”

Koreŭs esprimis per buŝstrikte montri la dentojn, klaksonis per lango. “Tiu viro freneziĝis. Li estas marŝanta mortinto. Ĉio pri kio li pensas, pri kio parolas, estas liaj aĉegaj elektronoj, tio kion li nomas efiko blovega. Mi spektis

provmontron, kaj mi kredas lin prava. Ni ne povas ĝin uzi en familia veturilo.”

“Kiel aspektas la jet-motoro?”

Koreŭs ŝultrolevis. “Nenio multe signifa. Generatoro — potencigita per céntauriumo — miniatura sinkrotrono. Tre simpla. Li enigas solan elektronon en la tubon, akceligas ĝin ĝis preskaŭluma rapido, kaj ĝi muĝ-laŭte eliras kiel ŝprucego tiom dika kiom homa brako.”

Mario malridetis. “Provu stiri lin reen al io utila. Li havas boncerbon. Ĉu li estas vizitinta kuraciston?”

“Nur al Stap, la doktoro asekura. Stap diras ke estas miro ke li plu vivas eĉ nun. Galope rapida nefrito aŭ nekrozo — io simila.” Koreŭs parolis sen intereso. Liaj okuloj neniam forlasis sian novan Aero-Veturanton. Li diris per pli viva voĉo, “Enrigardu la internon, notu la larĝan vidkampon; pluse la modulantan filtron kontraŭan al troa brileco. Alrigardu rekte la sunon, tiom longe kiom vi volas. Notu la altometron, ĝi havas pozitivan kanal-indikilon, tion vi povas ĝustigi por ajna loko. Krome estas la aerprema regilo, tio situas sube de malantaŭa seĝo — ĉu vi vidas? — konservas ĉirkaŭ dudek dolarojn pli ol la sistemo antaŭa. Anstataŭ remburi, mi instigis ke la tuto de la seĝo-surfaco estu kovrata per surŝprucita springufloso*.”

“Vi faris bonan laboron, Luis,” diris Mario. “Antaŭeniru pri via projekto.”

Koreŭs enprenis profundan spiron, ellasis ĝin, balancis la kapon. “Mi estu duoble damnita!”

“Kio estas la problemo?”

“Vin mi komprenas neniom,” diris Koreŭs, fiksrigardante Marion kvazaŭ li estus nekonatulo. “Se mi ne konus vin de pruo ĝis pobo, mi dirus ke vi estas malsama viro. Tri monantojn antaŭe, se mi provus meti ion nete desegnitan antaŭ vi, vi eksplodus tiel kiel unu el la elektronoj de Arnold. Vi nomus tiun ĉi modelon fluganta panoskatolo. Vi estus ĝin ornaminta per anĝeloflugiloj sur la tutan eksteron, la kontrol-indikilojn redesegninta tro molaforme, aldoninta al ĝi du aŭ tri libroskatolojn laŭ la modo Ludoviko la 15-a. Mi ne scias kiom tute. Se vi ne aspektus tiom korpe bonforma, mi suspektus vin malsana.”

Mario diris ŝajniganta esprimon de saĝula pripensado, “La firmao Eberia Flugĉaro estas preninta multon da mono el la publiko. La malnova Eberiaĵo sukcesis teni sin mem en la aero, sed kostis tro multe kaj aspekis tiel, kiel pagodo kun planeoj. Nun ni komencos oferti kvaliton al la publiko. Eble ili tion rifuzos.”

Koreŭs ridis ĝojege. “Se ni ne povos vendi dek milionojn da tiuj ĉi, mi flugigos unu el ili ĝis ĝia altlimo kaj elsaltos.”

“Decas, tial, ke vi ekvendadu.”

“Mi esperas, ke vi ne suferos recidivon,” diris Koreŭs, “kaj mendu multon da ornamaĵoj.”

“Ne,” diris Mario milde. “Ĝi eliros ĝuste tiel kiel ĝi nun estas, tiom longe kiom mi rajtas regi aferojn.”

Koreŭs alfrapis la eksteron de la Aero-Veturanto aprobe, turnis demandan esprimon al Mario. “Via edzino estis provanta kontakti vin. Mi diris al ŝi ke mi ne scias kie vi estas. Decas ke vi ŝin kontaktu — se vi volas resti edzo. Ŝi paroladis pri eks-edziniĝo.”

Mario alrigardadis la distancon, malkomforte konscia pri avida atento fare de Koreŭs. “Mi diris al ŝi ke ŝi antaŭeniru pri tio. Estas la plej bona rezulto por ĉiuj koncernatoj. Plej egalece al ŝi, ĉionkonsiderate.”

Koreŭs balancis la kapon. “Vi estas stranga ulo, Eberi. Antaŭ unu jaro vi maldungus min jam dek du fojojn.”

“Eble mi grasigas vin cele al posta buĉo,” sugestis Mario.

“Eble,” diris Koreŭs. “Letja Arnold kaj mi povos starigi komercon por vendi elektron-potencajn elefant-pafilegojn.”

Ducent mil artistoj svarmis surtute la Turon, farbante, surfacigante murojn, ŝprucante, prilaborante tubojn, dratojn,

mozaikajn plankojn, betonon, planŝenon, enmetanta ŝrankojn, milon da diversaj ekipaĵoj. Muroj surfaciiĝis per paneloj el diversaj vaksitaj kaj poluritaj lignoj, la miriado da basenoj estis kahelitaj, ĝardenistoj skulptis la pendantajn parkojn, tiuj kiaj grandaj verdaj arbaretoj en la nuboj.

Ĉiusemajne Mervin Alen konsultis kun Taŭsig kaj maljunulo Kubal, aprobante, modifante, ŝanĝigante, pligrandigante. Laŭ registritaj kopioj de la intervjuoj Mario laboris, farante la ŝanĝojn, interplektanta ilin zorge inter desegneroj siaj propraj.

Pasis monatoj. Nun Mervin Alen eble ne rekonus tiun ĉi viron por esti Ralston Eberi. Ĉe la oficejo Eberia Flugĉaro en la bloko Etera, lia dungitaro esprimis miron, respekton. Jen tute nova Ralston Eberi — malgraŭ, certe, ili notis la samajn antaŭajn gestojn, parol- kaj paŝ-manierojn, pretervolajn esprimojn. Tiu ĉi nova Ralston Eberi forestigis dudek kilogramojn da oleo kaj pendanta haŭto. La suno jam tintis la blankan haŭton ĝis beba roz-koloro. La okuloj, iam pufaj, nun brilis el firm-haŭtaj vangoj; la krur-muskoloj firmis pro marŝado; la brusto plenis, la pulmoj pli fortaj pro duon-hora naĝado je la kvara horo ĉiun posttagmezon.

Kaj finfine la ducent mil artistoj ordigis siajn ilojn, kolektis siajn finpagojn. Bontenadistoj venis trakti aferojn. Laboristoj balais, purigis, poluris. La Turo Empirea estis kompleta — sonĝo solidigita, miraĵo de la mondo. Konstruaĵo supreniĝanta tiel kiel pinarbo, fleksebla kaj masiva, sinleviĝanta super la miniaturajn stratojn kaj placojn subajn. Konstruaĵego celigata ne por graco, sed efektiviganta gracon pere de ĝia sekura radiko, ĝiaj nekalkuleblaj kojnformoj, kavecoj, mil terasoj, mil taksi-haltejoj, bilionaj fenestroj.

La Turo Empirea plenkonstruiĝis. Mervin Alen transloĝigis sin tien je unu kvieta meznokto, kaj la sekvan tagon la Domo de l' Se ĉe 5600 Avenuo Eksmor', Herbokampo, estis malplena, havebla kontraŭ aĉeto aŭ luo-kontrakto.

La Domo de l' Se nun estis Nivelo 900, Turo Empirea. Kaj Roland Mario doloris pro avido, pro anksio, pro varma ĝojo intensa je preskaŭ volupteco. Li okupiĝis ordigi la benkon tiam kiam Taŭsig enŝovis sian kapon en la oficejon.

"Nu, kion vi planas poste fari?"

Mario inspektis al Taŭsig la kuriozan vizaĝon. "Ĉu iuj pluaj projektegoj?"

"Ne ĉi momente. Kaj ili ne probablas. Almenaŭ ne pere de maljunulo Kubal."

"Pro kio? Ĉu li pensiiĝis?"

"Pensiiĝis? Hmf, ne. Li freneziĝis. Skizoida."

Mario tamburis siajn fingrojn sur la labortablo. "Kiam okazis tio ĉi?"

"Nur hieraŭ. Ŝajnas ke fini la Empirean estis al li io troa. Policano trovis lin en la Placo Tangaro alparolantan la memon, alportis lin hejmen. Li ne konas la nevon, ne konas la dommastruminon. Insistas diri ke lia nomo estas Brej, io simile."

"Brej?" Mario levis sin stari, la frunto sulke kunpremiĝanta. Breŭ. "Ŝajnas esti sinila demenco," li diris abstrakte.

"Ĝuste tiel," Tausig respondis, ankoraŭ fiksrigardanta Marion per brilaj, scivolaj okuloj. "Do, kion vi faros ekde nun?"

"Mi rezignas," diris Mario, kun troigita svingo de brako. "Mi finis, mi estas tiel kiel maljunulo Kubal. La Turo Empirea trois al mi. Mi suferas senilan mens-putriĝon. Prenu longan rigardon, Taŭsig, min vi vidos neniam refoje." Li fermis la pordon tuj antaŭ la vizaĝo de Taŭsig. Li elpaŝis en la lifton, malsupreniris ĝis la dua nivelo, saltis sur la mov-strion plej rapidan irante al lia eta apartemento ĉe Domo Melburno. Li dikfingrumis la seruron, skanilo rekonis al li liajn kurbliniojn, la pordo glitis malferma. Mario eniris, fermis la pordon. Li malvestis la malnetan korpon de Eberi, volvis ĝin en robo, malleviĝis en seĝon apud granda malalta tablo.

La tablo subtenis kompleksan modelon konstruitan el ligno, metalo, plasto, malsamkoloraj fadenoj. Ĝi reprezentis Nivelon 900, Emperia Turo — la Domo de l' Se.

Mario konis ĝin parkere. Ĉiuj detaloj pri areo granda je duono de kilometro estis premita en lian cerbon.

Postnelonge, Mario vestis sin refoje, per kombineo el forta griza kepro. Li ŝarĝis la poŝojn per diversaj iloj kaj ekipaĵoj, prenis sian mansakon. Li rigardis sin per la spegulo, al la vizaĝo kiu estis Eberi ka ne tute Eberi. La torpora glaci-aspeko ne plu montriĝis ĉe la okuloj. La lipoj ne plu pufis, la vangoj ne plu pendis sake, lia vizaĝo estis firma bloko. Pensoplene Mario tiris ĉapelon kovri sian frunton, stude rigardis la efikon. Tiu viro ne rekoneblas. Li surgluis modecan tufon de falsa liphararo. Ralston Eberi ne plu ekzistis.

Mario eliris la apartementon. Li signalis taksion, flugis al Herbokampo. La Turo Empirea altis super la urbo kiel barilo-stango super kampo de kapo-brasikoj. Avert-lampo disigis ruĝajn radiojn de kolo-tordiga alteco. Miliono da lampoj de naŭcent niveloj lumis, intermiksis formi luksan laktecan skubriladon. Urbo en si mem, kie du miliono, tri miliono da viroj kaj virinoj povus elteni dumvive se oni tiel dezirus. Ĝi estis monumento al la enuo de unu viro, viro tro-sata je vivo. La plej grandioza konstruaĵo iam ajn konstruita, kaj konstruita pro la malplej konsekvenca el motivoj kiu iam ajn kauzis ke unu ŝtono estu metita sur alian. La Turo Empirea, konstruita el la kunmetitaj kapabloj de la pleja riĉaĵo de la planedo, estis giganta ludilo, tikilo, amuzilo.

Sed kiu scius tion ĉi? La 222-a nivelo enhavis la plej bonan hospitalon en la mondo. Ĝia kuracistaro legiĝis tiel kiel honorlisto de l’ Asocio Medicina. Nivelo 460 entenis marĉan arbaron kretacean. Dinosaŭroj plengrande laŭproporciaj manĝadis je arĥaikaj vegetaĵoj, Pterodaktiloj ŝvebis transen laŭ nevideblaj glitiloj, la aero entenis la sovaĝan odoregon de marĉo, nigra ŝlimkoto, putriĝantaj mituloj, kadavraĵoj.

Nivelo 416 enhavis la unuan homan urbon, Eriduo en Sumero, kompleta kun ĝiaj dek metrojn altaj brikaj muroj, la zigurata templo adorcela je Enlil la dio de l’ tero, la palaco de la reĝo, la krudaj kot-domoj de la kamparanoj. Nivelo 462 estis Insulo Helena el la epoko bronza, alondigita per blua salakvo. Templo de Kreto en oliva kulturarbareto kronis la supron, kaj alt-prua galeo flosis sur la akvo, kun sunlumo rebriliĝanta de bronzaj ŝirmiloj, lumiganta la purpuran velon.

Nivelo 463 estis ter-skulptaĵo pri imagita fantasta mondo desegnita de mistika artisto Dajer Lotajr. Kaj Nivelo 509 estis privata fea lando, malfermita al la publiko, magia ĝardeno kie loĝis sinkaŝemaj nimfoj.

Ekzistis niveloj por komercaj oficejoj, por loĝejoj, por laboratorioj. La kvara nivelo subtenis la plej grandan stadionon de la mondo. Niveloj 320 ĝis 323 entenis la Universitaton de l’ Mondo, kaj komenca enlistiĝo kostis kvardek du mil; 255 estis la plej granda biblioteko; 328 estis vasta galerio de artoj.

Estis montrejoj, vendejoj, restoracioj, kvietaj tavernoj, teatroj, televidaj studioj — estis kaptita kompleta modelo de la mondo, enfostigita en la aeron laŭ dezireto de Mervin Alen. Homa sopiro pri perdita juneco pagis ĝian prezon. Mervin Alen estis vendinta varon tiom valora ke apud ĝi ĉiu gramo de aŭro iam ajn elminita, ĉiu altege taksata posedaĵo, ĉiu ambicio kaj celo, estis kvazaŭ neniaĵoj. Eterna vivo, renovigita juneco — amo, fido, moralo, honoro trovis ilin majuste trofortaj kontraŭuloj.

# 9

Haste Mario elsaltis la flugtaksion ĉe la publika elstarejo ĉe la 52-a nivelo, la kunordiga centro de la turo. Inter la amasoj de vizitintoj, luintoj, dungitaranoj, li estis neelstara. Li surpaŝis piedstrion por gliti ĝis la centran tubegon, desuriĝis ĉe la lifto ekspresa kondukanta ĝis Nivelo 600. Li eniris unu el la etaj ĉaroj. La pordo memfrapis ferma, li sentis la ekmovon de akcelado, kaj preskaŭ samtempe la preskaŭ-senpezecon de la makcelado. La pordo eke malfermiĝis, li elpaŝis sur Nivelon 600-an, tri kilometrojn en la ĉielo.

Li estis en la atendejo de la Hotelo Paradizo, kompare al kiu la Atlantika-Imperio ŝajnis aĉe ordinara kaj konstriktita. Li movis inter ekskvizite vestitaj viroj kaj virinoj, personoj riĉaj, dignaj, potencaj. Mario estis malnotinda. Li povus esti purigisto, elektristo bontenantarana. Li marŝis kviete laŭ koridoro, haltis eventuale ĉe pordo markita *Privata*. Li dikfingrumis la seruron; ĝi malfermiĝis montri purigistan ŝrankĉambreton. Sed la purigistoj por la 600-a nivelo ĉiuj havis aliajn stokejojn. Neniu alia dikfingro povus malŝlosi tiun ĉi seruron. Laŭ okazo ke nivelo-mastrumanto eble malfermigus perforte la pordon, tiu trovus nur alian purigistan ŝrankĉambreton kiu estis perdita pro konfuzo.

Sed ĝi estis tre speciala ŝrankĉambreto. Ĉe la muro malantaŭa, Mario premis paron de elstraĵetoj, apartaj inter si je larĝa distanco, kaj la muro svingiĝis flanken. Mario eniris malluman interspaceton, premis ferme la muron. Nun li estis sola — pli sola ol se li estus meze en la Saharo. Sur dezerto li eble spioniĝus fare de aviadilo preterpasanta. Tie ĉi inter la senvivaj spacoj apud la ĉef-kolumnoj, inter la liftotuboj, li perdiĝis je ĉiu okulo. Se li mortus, neniu lin trovus. En la fora futuro, kiam la Turo Emperia eventuale malkonstruiĝos, tiam lia skeleto eble troviĝus. Ĝis tiam li estis malaperinta de homara scipovo.

Li antaŭen-celumis poŝlampan lumstrion, turniĝis alfronti la centran spinkordon de lifttuboj, tuboj tiaj kiaj fibroj en giganta vegetaĵo. Ĉi tie li trovis sian privatan lifton, tiel perdita inter aliaj kiel viro en homamaso. La meĥanistoj ĝin instalintaj ne povus rekoni ĝian kaŝcelon. Ĝi estus nur laboraĵo sur konstruplano, parto de la taglaboro, rapide forgesita. Al Mario ĝi estis konektilo al Nivelo 900, al la Domo de l' Se.

Li surpaŝis la tre etan platformon. La pordo frap-fermiĝis. Li ĵetiĝis supren, supren je pli ol kilometro. La liftĉambro haltis, li elpaŝis. Li estis en la Domo de l' Se — nevidebla, fantomo. Nevidata, ne aŭdata, potenco apartenis al li. Li povus ekataki el nenieco, neatendita, neimagita, mastro de la mastro de la Domo de l' Se.

Li enspiris la aeron, ĝojega, ĝojanta ĝis tremeti pro sia potenco. Jen la pleja ĉefmomento de lia vivo. Li ekŝaltis sian lampon, malgraŭ tio ke ne estis neceso. Li konis tiujn ĉi interspacojn kvazaŭ li estus inter ili naskita. La lumo simbolis sian absolutan aŭtoritatecon. Li neniel bezonis kaŝiri. Li estis en sia privata ŝirmloko, sekura, izola, fora je ĉio.

Mario haltis, ekrigardis la muron. Interdistance je tri metroj kaj duono lumis cirkloj de fluoreska farbo. Trans tiu ĉi muro lokiĝis la granda enirejo de la Domo de l' Se. Mario aliris al unu el la fluoreskaj cirkloj. Tiujn ĉi li mem estis farbinta por indiki la lokojn de spioniloj. Tiuj ĉi estis etaj makuloj apenaŭ pli grandaj ol kapo de pinglo, nevideblaj je distanco de metro. Mario, kaŝvestita kiel elektristo, mem ilin instalis, po paro je ĉiu vidloko, por binokula vidkapablo.

El sia poŝsako li prenis okulvitroj-similan video-montrilon, fiksis draton al elektrajn konektilojn de la spioniloj, metis antaŭ siaj okuloj la montrilon. Nun li vidis la internon de la enirejo tiel klare kvazaŭ li estus trarigardanta pordon.

Okazis la mezo de akcepta ceremonio — inaŭgura festo ĉe la Domo de l' Se. Viroj, maljunaj, junaj, eminentaj aŭ belaj aŭ nur surfacigita per lumo sukcesindikanta; virinoj samtempe serenaj kaj arogantaj, la modulinoj kaj montrindulinoj de la planedo. Mario vidis juvelojn, oron, la brilon kaj svingadon de mil-koloraj ŝtofoj, kaj je okula alteco, la kuriozan blank-bronz-brun-nigran miksaĵon, la koloro de multaj kapoj, multaj vizaĝoj — homamaso-koloro.

Mario rakonis kelke da tiuj ĉi homoj, vizaĝoj kaj nomoj konataj tut-monde. Artistoj, administristoj, ingenieroj, bonvivantoj, amoristinoj, filozofoj, ĉiuj plenpremigantaj la atendejon de a Domo de l' Se, venigitaj de la neesprimebla logo de aĵo nekonata, ekscitiga, malbonfama.

Jen staris Mervin Alen, vestita nigre. Li belis tiel kiel praa sun-heroo, alta, memfida, facil-maniera, sed humila kaj zorge gracia, kunmetanta la oficojn de proprietulo kaj gastiganto.

Tejn Paren nenie videblis.

Mario pluiris. Kiel ĉe 5600 Eksmoro, li trovis ĉambron kiu plenplenis de lumo sukcene-blanka, or-kolora, krispa

kiel celerio, kie kreskiĝis la larĝ-foliaj plantoj same strebis en sia nativa humo. La herbejo estis malplena, la plantoj elspiris sensentigan parfumon por sia propra mem-delektado.

Mario pluiris. Li enrigardis ĉambron malplenan kaj ne ornamitan, farada ĉambro. Kelke da kaŭĉuk-radaj tabloj situis laŭorde kontraŭ muro, ĉiu kun sia surpendaĵo el blanka fabriko. Balkano transĉambra subentis interplekton de meĥanismoj, tio el nigraj kurbaj brakoj, reflekta metalo, vitro. Sube pendiĝis paro de duontravideblaj sferoj, tiel pale blukoloraj kiel Rokforta fromaĝo. Mario rigardis detale. Jen la sferoj el golasmo.

Neniu okupis la ĉambron krom unu senmovanta formo sur unu el la rullitoj. La vizaĝo parte videblis. Mario, subite atenta, ŝanĝis sian vidlokon. Li vidis pezan blondan kapon, fortikajn malpintajn vizaĝerojn. Jen Janivero, jam drogita, preta por la interŝanĝo.

Mario elspiregis tiom forte ke la ŝvelventro Eberia skuiĝis. Zaer, Mario, Breŭ, kaj nun Janniver, logitaj en tiun ĉi ĉambron tiel kiel ŝafoj postsekvantaj Judas-kapron al buĉejo. Mario montris la dentojn en grimaco neniom rideta. Ekinundo el malhela furoro leviĝis en lia menso.

Li sintrankviligis. La grimaco moliĝis por formi la normale malstriktajn liniojn de la vizaĝo de Eberi. Kiu, ĉion konsiderante, estis senkulpa? Tejn Paren? Ne. Ŝi servis al Mervin Alen, spirito kaptinta la korpon de ŝia frato. Li mem, Roland Mario? Li estis povinta mortigi al Mervin Alen. Per akuzi sufiĉe laŭte al la ĝustaj aŭtoritatoj li estus haltiginta pluajn misojn ĉe la Domo de l' Se. Li sin detenis, pro timo ke li perdu la korpon propran. Pit Zaer? Li estis povinta agadi laŭ la spirito de sia kontrakto per averti siajn amikojn ĉe la Oksforda Teraso.

Ĉiuj aliaj viktimoj, kiuj simile detenis en si la furoron kaj ŝuldecon homaranisman? Ne, Ditmar simple estis homo, tiel malforta kaj nesindonema kiel ajna alia, kaj liaj pekoj nur estis tiuj de faro anstataŭ nefaro, kio karakterizis la aliajn.

Mario vagadis plu, rigardante en apartamento, ĉambro kaj halo. Blonda knabino, juna kaj dolĉa kiel Apalaĉia dianto, naĝis nuda en la longa, verde vitra baseno de Alen, poste sidiĝis ĉe la rando inter nubo el arĝentaj bobeloj. Mario malbenis la voluptajn respondojn de la korpo de Eberi, preteriris. Tejn Paren troveblis nenie.

Li reiris al la akceptejo. La festo estis finiĝanta, kun Mervin Alen adiaŭanta siajn gastojn, viroj kaj virinoj ruĝethaŭtaj pro lia manĝaĵo kaj drinkaĵo, ĉiuj afablaj, ĉiuj promesantaj refojan renkontiĝon je malpli formala okazo.

Mario rigardadis ĝis post eliris la lastaj — la lastaj krom unu, tiu estante nekredeble alta, maldika maljuna viro, vestita tro mode en perla grizo kaj blanko. Liaj manikoj estis tiaj kiaj tigoj de maizo, lia kapo estis tute krania. Li kliniĝis super la ŝultro de Alen, kanajla parfumata maljuna dando, vaksita, ruĵita, pomadita.

Nun Alen gentile demandis, kaj la maljunulo esprimis ekĝojon. Alen kondukis lin en etan flank-ĉambron, oficejo farbita per malhelaj grizo kaj verdo.

La maljunulo sidiĝis, skribis ĉekon. Alen lasis ĝin fali en teleekranan longatruon, kaj la du atendis, babilantaj pri aferoj nekonsekvencaj. La maljunulo ŝajne provadis elpreni informon, dum Alen gracie lin flanken-direktis. Le teleekrano rebriliĝis, eklume montris agordon de banko. Alen stariĝis. La maljunulo stariĝis. Alen prenis al si longan enspiron; ili enpaŝis la herboĉambron. La viro antaŭeniris tri paŝojn, ŝanceliĝis. Alen kaptis lin lerte, kuŝigis lin sur kaŝatan kaŭĉuk-radan kanapon, puŝis tion antaŭen, el tiu ĉambro en la laboratorion kie Janiver jam kuŝis preta.

Nun Mario rigardadis per plej atentaj okuloj, kaj li konektis pluan draton al la okulvitra montrilo, tiun ĉi kondukanta al video-regristrilon en sia poŝsako. Ĉio vidota estos dure registrita.

Sekvis malmulto observinda. Alen puŝis la rultablon de Janiver sub unu el la selakto-koloraj kavaj sferoj de golasmo, tiun de la maljunulo sub la alian. Li turnis anseton, pied-premis pedalon, fingre frapetis ŝaltilon, ekpaŝis malantaŭen por staradi atende. La tuta balkono malleviĝis. La sferoj ĉirkaŭis la du kapojn, pulsadis, ŝanĝiĝis laŭ formo. Aĵoj moviĝis ĉe la balkono, radoj turniĝis, brileco grade intensiĝis. La funkciado ŝajnis esti mem-kontrolita, aŭtomata.

Alen elektis sidiĝi, ekbruligis cigaredon, oscedis. Pasis kvin minutoj. La balkono leviĝis, la sferoj el golasmo svingiĝis laŭ akso, la balkono remalleviĝis. Pasis kvin minutoj pluaj. La balkono leviĝis. Alen paŝis antaŭen, malaktivigis la ŝaltilojn.

Alen injektis ambaŭ korpojn el sama injektilo, puŝis la rullitojn en apudan ĉambron, foriris sen malantaŭen rigardi.

Li iras al la naĝbaseno, pensis Mario. Lasu lin iri!

Je la naŭa horo en Placo Tanatro, taksio ellsis malfortan nebelan maljunulon, alta kaj tiel maldika kiel stango, kiu tuj celis sidiĝi ĉe benko.

Mario atendis ĝis la maljunulo montris signojn ke li atentas, rigardis ties subite kreskantan konsterniĝon, la ekscititan ekzamenadon de marasmitaj manoj, la ekkompreno pri kvindek jaroj ŝtelitaj. Mario alproksimiĝis, gvidis la maljunan viron al taksio, kondukis lin al propra apartamento. Estis mateno ege malbona.

Janniver dormadis, elĉerpita pro teruro, lamentado, malamo al sia knaranta maljuna korpo. Mario telefonis la agentejon Brenanan, petis paroli al Muris Slejd. La malalta peza viro kun mallarĝa kapo aperis ekrane, rigardadis tra tavoloj de polurita vitro al Mario.

“Saluton, Slejd," diris Mario. “Mi volas ke vi laboru ĉi nokte.”

Slejd alrigardis lin montranta esprimon de neskuebla singardo. “Ĉu ĝi kaŭzos al mi problemojn?”

“Ne.”

“Kio estas la laboro?”

“Tiu viro kiun vi estis observanta por mi, Roland Mario, ĉu vi scias pri kie mi lin povas trovi?”

“Li estas ĉe la Persa Teraso matenmanĝanta kun virino kun kiu li trapasis la nokton. Ŝia nomo estas Laŭra Lingtza; ŝi estas dancistino ĉe la Teatro Vedanto Epika.”

“Ne zorgu pri tio. Akiru pecon de papero, surskribu tion kion mi estos parolanta.”

“Komencu, mi pretas.”

“‘Renkontu min je la horo dek unua posttagmeze, ĉe la Kamboĝa Kolono, akceptejo de la Hotelo Paradizo, Nivelo Ses Cent, Turo Empirea. Gravegas. Venu sola. Bonvolu esti akurata, ĉar mi povas ŝpari al vi nur kelkajn minutojn. Mervin Alen, Domo de l’ Se.’”

Mario atendis momenton ĝis Slejd suprenrigardis de sia skribado. “Presu tion,” li diris. “Donu tion en la manojn de Roland Mario je ĉirkaŭ la naŭa horo kaj duono ĉi vespere.”

# 10

Kun malpacienco Mario repaŝadis laŭlonge la plankon, dikaj manoj malantaŭdorse intertenantaj. Hodiaŭnokte fruktiĝos tuta jaro da strebaj laboradoj fare de cerbo kaj imago. Hodiaŭnokte, se bonŝance, li forlasos la malamatan identecon de Ralston Eberi. Li ekpensis pri Luis Koreŭs. Kompatinda Luis, kaj Mario balancis la kapon. Kio okazos pri la Aer-Veturanto de Luis? Kaj Letja Arnod? Ĉu lin oni reirigus al Placon Tanagron por refoje embuski kaj sibli insultojn tiam kiam Ralston Eberi pompe preterpromenos?

Li vokis ekrane la Blokon Eteran, atingis al Luis Koreŭs. “Kiel aferoj fartas, Luis?”

“Bonege. Niaj preparoj kompletas, ni komencos fabrikadi venontan semajnon.”

“Kiel fartas Arnold?”

Koreŭs todigis sian esprimon. “Eberi, vi estos juĝanta min tiom freneza kiom Arnold. Sed li flugas ja pli rapide ol lumo.”

“Kio?”

“Ĵaŭdon ĵus pasintan li vagis en la oficejon. Li kondutis mistere, diris ke mi lin sekvu. Mi sekvis. Li kondukis min supren al lia observatorio — nur fenestro ĉielon-frotanta kie li havas grandigoskopon protonan. Li diris, ke mi rigardu. Mi rigardis, vidis diskon — nebrilan diskon tiom granda kiom la luno dum plena. ‘Pluto,’ diris Arnold. ‘Post ĉirkaŭ dek minutoj, okazos eta ekbrilo ĉe maldekstra flanko.’ ‘Kiel vi scias?’ ‘Iom pli ol ses horojn pasinte mi ekbruligis torĉon. La lumo estas atingonta tiun ĉi lokon ĉirkaŭ nuntempe.’

“Mi rigardis lin kun miro, sed tenis okulon kvazaŭ gluite al la vidaĵo, kaj ja okazis — mi ĝin ja vidis, eta ŝpruco de blanka lumo. ‘Nun rigardu,’ diris li, ‘sekvos iu ruĝa.’ Kaj li pravis. Sekvis lumo ruĝa.” Koreŭs balancis sian grandan sablokoloran kapon. “Eberi, mi konvinkiĝis. Li sukcesis ke mi lin kredu.”

Mario diris per voĉo mankanta tonon, “Venigu lin, ke li parolu, Luis, se vi povas lin trovi.”

Post minuto aŭ iom pli la vizaĝo de Letja Arnold elrigardis la ekranon. Mario demandis per plumbe peza voĉo, “Ĉu vere, Arnold? Vi povas flugi je rapido translumа?”

Arnold diris agacite, “Ja certe veras. Kial oni pensu ke ne estas vere?”

“Kiel vi tion faris?”

“Mi nur muntis paron da elektron-puŝiloj sur unu el viaj veturiloj alt-altitudaj. Nenio pli. Mi nur ŝaltis la potencon. La interkonektaĵo ekrapidas flame furore eksteriranta la normalan universon. Estas nek akcelo, nek inercio, nenio. Nur rapido, rapido, rapido. Rezulte la steloj atingeblas post nur kelktaga irado, tiel mi jam delonge vin diris, kaj vi diris ke mi frenezas.” Lia vizaĝo tordiĝis, galo acide brulis al li la langon. “Mi neniam ilin vidos, Eberi, kaj vi mem kulpas pro tio. Mi estas mortonto. Mi vidis Pluton, mi skribis la nomon propran en ĝian glacion, kaj jen tio pro kio mi estos konata.”

Li malaperis el la ekrano. Koreŭs revenis. “Li baldaŭ mortos,” diris Koreŭs raŭke. “Li suferis hemoragion hieraŭnokte. Li spertos nur unu sekvan — sian lastan.”

Mario diris per voĉo distrita, “Prizorgu lin, Luis. Ĉar mi timas ke morgaŭe ĉiuj aferoj malsamos.”

“Kion vi volas diri, ke ĉio malsamos?”

“La sinteno de Ralston Eberi eble suferos recidivon.”

“Dio malpermesu.”

Mario rompis la interparolon, rekomencis paŝadi tien-reen, sed nun li paŝadis malpli rapide, kaj liaj okouloj perceptadis nenion el tio kien li paŝis…

Mario alvokis grumon. “Ĉu vi vidas tiun junulon en bruneta jako apud la Kamboĝa Kolumno?”

“Jes, sinjoro.”

“Donu al li tiun ĉi noton.”

“Jes, sinjoro.”

Ralston Eberi estis mistraktinta la korpon de Mario tiel, ke ĝi akiris malstriktan haŭton. Sakformaj haŭtaĵoj pendis sube de la okuloj, la buŝo malstriktis, malsekis. Mario ŝvitis en subita varmiĝo el pura kolero. La porko, ke li diboĉe traktis korpon sanegan, korpon neniom alkutimiĝintan je malpuraĵoj tiaj kiajn povis inventi la cerbo de Eberi!

Eberi legis la noton, ekrigardis tien kaj reen laŭ la akceptejo. Mario estis jam foririnta. Eberi, sekvante la instrukciojn, turniĝis por laŭiri la koridorn ĝis la aer-duŝejoj, movante malrapide, sendecide.

Li proksimiĝis al pordo sur kiu ŝildo legiĝis *Privata,* kiu restis parte malfermita. Li alfrapis.

“Alen, ĉu vi estas tie? Pri kio tiu ĉi temas?”

“Envenu,” diris Mario.

Eberi singarde puŝis la kapon tra la pordtruo. Mario tiregis lin plu antaŭen, frapis al li la kolon per injektilo. Eberi baraktis, piedumis, tremblis, malstreĉiĝis. Mario fermis la pordon.

“Stariĝu,” ordonis Mario. Eberi stariĝis, obeema, glaci-okula. Mario kondukis lin tra pordo malantaŭa, supren per lifto, ĝis Nivelo 900, la Domo de l’ Se.

“Sidiĝu, ne movu,” diris Mario. Eberi sidis tiel kiel barnaklo Mario faris zorgan skolt-esploron. Je ĉi tiu tempo de nokto, decas ke Mervin Alen jam finplenumis la farendaĵojn.

Alen estis ĵus plenuminta interŝanĝon. Mario rigardis dum li puŝis la du kuŝantajn korpojn en apudan atendejon, kaj poste li sekvis Alen al ties loĝa ĉambraro, rigardis dum li deprenis la vestojn, surmetis silkan jakon, preta por malstreĉi aŭ por amindumi kun sia flore-bela blondulino.

Estis sekure ke li plufaru. Mario reiris tien kie sidadis Eberi.

“Stariĝu, kaj sekvu min.”

Ree malsupren laŭ la koridoroj sekretaj inter la venumil-tuboj, kaj nun la laboratorio estis senhoma. Mario levis klinkon, tiris flanken unu el la presitaj lignaj muro-paneloj.

“Eniru,” li diris. “Kuŝiĝu sur tiun rul-kanapon.” Eberi obeis.

Mario puŝis lin trans la ĉambro al la griz-flav-koloraj cerbo-muldiloj, tien puŝis rul-kanapon ankaŭ por si mem. Li tenis al si la menson laŭ rigida pens-kanalo, lasante ke li pripensu nenion krom la interŝanĝo.

Li ĝustigis la ansojn, piedumis la pedalon, tiel kiel faris Alen. Nun la tempo por surgrimpi la kanapon, premu unu butonon pluan. Li staris alrigardanta la kuŝantan figuron. Jen la tempo. Faru. Estos facile; nur surgrimpu la kanapon, etendu brakon, premu butonon. Sed Mario staradis rigardade, ŝanceliĝanta iomete tien kaj reen.

Aŭdiĝis soneto de malantaŭe. Li ekturniĝis. Tejn Paren lin rigardis kun netruda amuzo. Ŝi faris nek movon ataŭen, nek eskapan, nek ekkrian por voki helpon. Ŝi rigardis kun esprimo — scivola, nehoma. Mario scivolis, kiel povus beleco esti tiom alte fajnigita, kaj ankoraŭ esti tiom malvarma kaj senamika? Se ŝi estus vundita, ĉu ŝi sangus? Nun, je ĉi momento, ĉu ŝi forkuros, ĉu ŝi alarmos? Se ŝi ekmovus, li ŝin mortigus.

“Vi faru,” diris Tejn. “Kio vin haltigis? Mi ne trudos.”

Mario iel tiun ĉi prognozis. Li rigardis malsupren al sia malstrikta korpo. Li malridetis.

“Ĉu vi malŝatas ĝian aspekton?” demandis Tejn. “Ne tiel ĉi vi rememoras vin mem? Vi ĉiuj samas, fiere marŝantaj, fanfaronaj bestoj.”

“Ne,” diris Mario malrapide, “Mi kredis ke ĉio, por tio mi strebis, estis nur regajni la korpon propran. Nun mi ne certas. Nun mi pensas ke ĝin mi ne plu deziras. Mi estas Eberi la industriisto. Li estas Mario la neserioza nenionfaranto.”

“Nu,” diris Tejn, kun leviĝo de lumaj brovoj, “vi ŝatas la monon, la potencon.”

Mario ridis, malforta vundita rido. “Vi kutimiĝis al tiuj ideoj tro longe. Ili jam infektis la kapon. Ekzistas aliaj aferoj. La steloj esplorindas. La galaksio — kvazaŭa herbejo el belegaj juveloj… Kiel Eberi, mi povus foriri cele al la steloj je venonta semajno. Kiel Mario, mi iros reen al la Oksforda Teraso, ludos manpilkon.”

Ŝi paŝis unu paŝon antaŭen. “Ĉu vi —”

Li diris, “Ĵus ĉi pasintan semajnon fizikisto rompis tiujn ligilojn kiuj tenas ĉion kunkaptita. Li atingis plutonon post dek kvin minutoj. Eberi lin rifuzis aŭskulti. Li tiom proksimas al morto nun ke oni apenaŭ povas distingi la diferencon. Eberi dirus ke li nur frenezas, forprenus de li la tutan projekton. Ĉar ne ekzistas ajnan provon krom la diraĵoj de du viroj.”

“Nu, do?” demandis Tejn. “Kion vi faros?”

“Mi deziras la korpon propran,” diris Mario malrapide. “Mi malamas tiun ĉi korpaĉon de porko pli multe ol mi malamas morton. Sed pli ol eĉ tio, mi volas aliri la stelojn.”

Ŝi alproksimiĝis iomete. Ŝiaj okuloj brilis tiel kiel la steloj Vego kaj Spiko dum varmeta somera nokto. Pro kio li pensis ŝin malvarmega? Ŝi estis lerta, varmega, plena ĝis-kreve pro vervo, pasio, imago. “Ankaŭ mi volas tien iri.”

“Kie estas tiu ĉi loko kien ĉiuj volas aliri?” demandis malpeza baritona voĉo, facila je la surfaco, tamen plena de furioza subfluado. Mervin Alen rapide transiris la ĉambron. Li svingis siajn grandajn sportistajn brakojn malstreĉe laŭ la ŝultroj, kroĉante kaj malkroĉante la manojn. “Kien vi volas vojaĝi?” Li alparolis Marion. “Ĉu al infero? Inferen vi iru.” Li ekis rame antaŭen la pugnon.

Mario falpaŝis malantaŭen, poste antaŭen refoje. La korpo de Eberi ne estis batala maŝino. Ĝi estis pulpa, piro-forma, kaj malgraŭ lia nove asketa vivstilo la ŝvelventro de Eberi ankoraŭ bobele sonis, ŝvingiĝadis tien kaj reen tiel kiel malseka spongo. Li tamen batalis. Li batalis kun ruĝa furoro kiu sukcesis kontraŭi la rapidon kaj forton de Alen dum duono da minuto. Post nelonge liaj krurorj fariĝis kolonoj pulpecaj, liaj brakoj ŝajne ne povis moviĝi. Li vidis Alen paŝi antaŭen, svingi grandege masivan baton kiu dispreme rompus al li la mandiblon tiel kiel paperan skatolon, disbatus, skuigus al li la dentojn.

*Krak!* Alen kriegis, ulula falseta kriaĉo, malstreĉiĝis, falis laŭ grada velka moviĝo.

Tein staris rigardanta la korpon, tenanta pistolon.

“Tio estas via frato,” anhele diris Mario, pli teruriĝita pro la esprimo de Tejn ol pro la viv-batalo kontraŭ Alen.

“Estas la korpo de mia frato. Mia frato mortis ĉi matene. Frue je sunleviĝo. Alen estis promesinta ke li ne permesus ke mia frato mortu, ke li donus al li korpon… Kaj mia frato mortis ĉi tiun matenon.”

Ŝi rigardis malsupren al la masivulo. “Kiam li estis juna, li tiam estis tiel bonkvalita. Nun lia cerbo estas mortinta kaj ankaŭ lia korpo estas mortinta.”

Ŝi surtabligis la pafilon. “Sed mi prognozis ke ĉi tiu okazos. Mi naŭzas pri tio. Ne plu tiele. Nun ni aliros la stelojn. Vi kaj mi, se min vi alportos. Pro kio mi zorgu ke via korpo estas malloga? La cerbo estas vi.”

“Alen estas mortinta,” diris Mario kvazaŭ li sonĝus. “Ekzistas neniu kiu povas trudi. La Domo de l’ Se apartenas al ni.”

Lin ŝi alrigardis kun dubo, la lipo duone kurbita. “Do?”

“Kie troviĝas la teleekrano?”

La ĉambro subite ŝajnis plena de homoj. Mario eknotis la fakton kun surprizo. Li estis notinta nenion; li plene okupiĝis. Pri tio li finis.

Sidante anestezitaj flank-al-flanke estis kvar maljunaj viroj, enrigardantaj la spacon per okuloj kiuj poste esprimos naŭzan angoron pro havi junecon kaj vivon preskaŭ reatingeblaj sed perditaj.

Starantaj transĉambre, palaj, nervozj, kvietaj, estis Zaer, Breŭ, Janiver. Kaj la korpo de Ralston Eberi. Sed la korpo parolis laŭ la rapida fluego da pensoj apartenanta al Letja Arnold.

Kaj en la elspezita korpo de Letja Arnold, ankoraŭ nekonscia, loĝis la menso de Ralston Eberi.

Mario marŝis en korpo propra, provante la plankon per siaj propraj piedoj, svinganta siajn brakojn, palpebrante al si la vizaĝon. Tejn Paren staris lin rigardanta per okuloj atentegaj, kvazaŭ ŝi estus vidanta lumon, formon, koloron por la unua fojo, kvazaŭ Roland Mario estis la sola estaĵo kion vivo povis por ŝi enteni.

Neniu alia estis en la ĉambro. Muris Slejd, kiu logis, subaĉetis, minacis, timigis tiujn jam nun en la ĉambro al la Domo de l’ Se, estis mem enveninta ĝis nur la vestiblo.

Mario alparolis al Janiver, Zaer, Breŭ. “Vi tri, nun, vi prenos la respondecon?”

Ili turnis al li siajn larĝe pro miro malfermegitajn okulojn, ankoraŭ ne tute retrankviliĝintaj de la posttimo, la ĝojo pro regajni siajn vivojn. “Jes.” … “Jes.” … “Jes.”

“Kelkaj el la interŝanĝitaj preteras ajnan helpon. Kelkaj aŭ mortis aŭ frenezas. Helpi tiujn ne eblas. Sed tiuj kiujn vi povas remeti en korpojn proprajn — je ili restas via respondeco.”

“Ni rompu la malbenitan maŝinon en la plej ete eblajn pecetojn,” diris Breŭ. “Kaj la Domo de l’ Se estu io pri kio oni nur flustru, io pri kiu maljunuloj ne pli ol sonĝu.”

Mario ridetis. “Ĉu vi rememoras la reklamon? ‘Trosata? Enua? Provu la Domon de l’ Se.’”

“Mi ne plu sentas trosaton, ne plu enuon,” suspiris Zaer.

“Ni gajnis la tutan valoron el nia mono,” diris Janiver perverse amuzita.

Mario malridetis. “Kie estas Ditmar?”

Tejn diris, “Li rendevuos je la deka horo morgaŭ matene. Li venos akiri la novan korpon kiun li meritas.”

Breŭ diris kun kvieta kontento, “Ni ĉeestos por lin bonvenigi.”

“Li estos surprizita,” diris Janiver.

“Kial li ne surpriziĝu” demandis Zaer. “Preter ĉio, jen la Domo de l’ Se.”

**adolesk/i** (ntr) Esti en tiu vivperiodo, kiu venas post la infanaĝo, kaj estas karakterizita per la ekfunkciado de la seksaj glandoj. **~anteco** Periodo inter infanaĝo kaj plenkreskeco.

**adrenalin/o** Hormono el la surrenaj glandoj, uzata en medicino pro la angio-mal-larĝiga efiko.

**afekt/i** (tr) **1** Ŝajnigi ion per nenaturaj, nesimplaj manieroj. **2** (ntr) Montradi nesimplan, pretendeman, atentovekan sintenadon.

**agat/o** Amfora speco de kalcedono, demetiĝinta en geodojn laŭ paralelaj tavoloj, prezentanta variajn, ordinare diafanajn koloraĵojn kaj briliĝanta per polurado.

**agent/o** Persono, komisiita de iu, por konstante fari ion.

**akci/o** **1** Frakcio de la kapitalo de financa societo aŭ industria entrepreno, kies posedo rajtigas partopreni en ĝiaj proprietaĵoj kaj en ĝiaj profitoj. **2** Atesto pri tia partopreno, valorpapero.

**altern/i** (tr) Sin sekvi laŭvice, kun pli-malpli da reguleco.

**alud/i** (tr) Paroli pri iu aŭ io, ne uzante la propran nomon aŭ vorton, sed tamen iel komprenigante, pri kiu aŭ kio temas.

**ambigu/a** Tia, ke ĝia signifo estas duba, aŭ ke ĝi povas havi du malsamajn sencojn.

**amnezi/o** Tuta aŭ parta perdo de la memoro.

**amor/o** Seksa pasio kaj volupta inklino al iu. **~i** Sekse ami.

**ampleks/o** **1** La grado de volumena grandeco, konsiderata rilate al tio, kion ĝi enhavas. **2** Grado de metafora vasteco, en rilato kun la entenataj detaloj aŭ cirkonstancoj.

**anestez/i** Senigi je la sentokapablo helpe de specialaj substancoj

**anhel/i** (ntr) Malfacile kaj brue spiri.

**anksi/a** Sentanta aŭ prezentanta staton de intelekta perturbo kaj agitiĝo kun sento de antaŭkora premateco.

**antarkt/o** La kontinento ĉe la suda poluso. *–EB 15/18*

**antaŭ-halo**Enirejo de hotelo, kie loĝantoj povas pasigi liberan tempon. *–EB 259/22*

**arbitr/a** Tia, ke ĝi dependas de la sola volo, emo aŭ kaprico de iu.

**aritmetik/o** Subkampo de matematiko. La scienco pri la nombroj kaj la kalkulado per ili.

**as/o** Ludkarto, ĵetkubo aŭ domenpeco kun unu sola punkto. *–EB 265/29*

**Astarta** Prasemida diino de la amo; = Aŝtar

**aventurin/o** Speco de kvarco, entenanta malgrandajn brilajn pecetojn el glimo.

**Aztek/o** Ano de indiĝena popolo iam loĝinta en Meksiko.

**balbut/i** **1** Havi tian difekton, ke oni parolas nur hakante kaj ofte ripetante la silabojn. **2** Malfacile aŭ nedistingeble paroli.

**balet/o** **1** Teatra senparola akto, en kiu pluraj aktoroj dancas kaj mimikas. **2** Muzika komponaĵo por tia akto.

**balkon/o** **1** Plata elstaraĵo ĉe la fasado de domo, ĉirkaŭita per balustrado aŭ krado kaj komunikiĝanta kun la interno. **2** En teatro, ĉiu el la etaĝoj kun sidlokoj, inter la partero kaj la galerio. *–EB 296/17,18 39/69 252/93 10/12*

**balt/o** Ano de blanka subraso, kies triboj inter la 5-a kaj la 7-a jarcentoj okupis la regionojn sude de la ~a maro.

**barnakl/o** Genro de maraj krustacoj el la subklaso de ciripedoj, kovritaj de konkosimila kalkplataro, sen tigo, alkreskintaj al roko, boato kaj simile. *Sinonimoj: balano, mar-glano.* (Mi tradukis per *barnaklo* malgraŭ ĝia ne-PIV-eco dukiale: por eviti konfuzon pri "bal-ano", kiu ridindas ĉisence; kaj pro tio ke vera, tera glano estas planto anstataŭ besto. Post demandi sur Fejsbuka grupo *Esperanto*, iu sugestis "barnaklo". Tuj aliaj voĉdonis favore al tio. Iu ĉe raportis ke laŭ la "English-Esperanto Dictionary" de Joseph Rhodes, la besteto jam delonge nomiĝas "barnaklo".)

**bing/o** Vetludo sur karteto havanta matricon el 75 nombroj aranĝitaj laŭ kvadrato kun la centra spaco malplena. Registo elvokas nombrojn laŭ bonŝanc-aparato. Ludantoj esperas fari specifajn desegnojn el markitaj spacoj: streko, ikso, ktp.

**bis** Interjekcio uzata por aprobi kaj peti pri ripeto. **~o** Ripeto de io ĵus finita laŭ la peto de ricevinto.

**boks/i** (ntr) Batali uzante nur la pugnojn, aŭ nudajn aŭ gantitajn, kaj plejofte kiel sporto. *–EB 281/32*

**bordel/o** Domo, kie la prostituitinoj akceptas la klientojn.

**brasik/o** Genro el dujaraj herboj, kies floroj havas rondforman stiluson, kaj kies rondaj semoj estas entenataj en longa silikvo. **kapo~o** Iu ajn vario de ~o kun granda globforma, firma burĝonego utiligata kiel legomo. *–EB 59/30-33*

**buked/o** Kunligaĵo de deŝiritaj floroj.

**bulvard/o** **1** Cirkla promenejo sur la loko de detruitaj remparoj. **2** Larĝa strato, borderita de arboj, en vivplena, komerca parto de urbo.

**celeri/o** Dujara herbo, multe uzata kiel legomo. *–EB 59/27*

**cend/o** Monero, centono de dolaro, de guldeno.

**cerebel/o** ❤ (latinlingve: cerebellum) Parto de encefalo, konsistanta el tri loboj (vermiso kaj du cerebelaj hemisferoj) kaj situanta post kaj sub la cerbaj hemisferoj. Sin. cerbeto.

**cian/o** Radikalo, senkolora, tre venena gaso, konsistanta el karbono kaj nitrogeno, CN. **~ido** Ĥemiaĵo, salo farita per agado de ciana acido (HCN) sur metalo, aŭ sur metala hidroksido.

**cikatr/o** Postsigno retanta de resaniĝinta vundo sur la haŭto de homo aŭ besto, aŭ sur la ŝelo de planto.

**cinabr/o** Ruĝa sulfido de hidrargo, uzata kiel kolorilo, HgS.

**cipres/o** Genro de malhelverdaj daŭrafoliaj, relative altaj arboj kun globformaj konusoj, kiuj havas dikajn, lignecajn, ŝildoformajn konusskvamojn. *–EB 356/58*

**cirkvit/o** La vojo, laŭ kiu elektra kurento povas cirkuli.

**ciroz/o** Kronika inflamo de la interlobeta histo de organo: hepata, atrofia, vejna, ktp.

**dand/o** Viro, kies precipa zorgo estas elegante observi modon.

**defi/i** (tr) **1** Aserti al iu, ke li ne kapablas superi la asertanton en konkurso, ludo ktp. **2** Prezenti nesupereblan obstaklon.

**defraŭd/i** (tr) Trompe kaj malhoneste senigi je mono aŭ alia valoraĵo, pri kiu iu persono havas rajton.

**delekt/i** (tr) Tre plezurigi.

**demenc/o** Simptomaro, karakterizita per la kompleta kaj definitiva ruiniĝo de la psikaj kapabloj.

**diafan/a** Trairebla per lumradioj, sed ne travidebla.

**diant/o** Genro de du- kaj plurjaraj herboj kun 5-petala kaliko kaj brandaj, liberaj, ofte brilkoloraj petaloj. *–EB 62/6*

**diboĉ/i** (ntr) Malmodere manĝi, trinki, seksumi.

**diet/o** Nutromaniero, obeanta difinitan regularon.

**dig/o** **1** Remparo, starigita por ŝirmi lokon kontraŭ inundo de rivero aŭ maro. **2** Transversa muro, konstruita en rivero, por provizore haltigi, aŭ malakceli, la fluon, aŭ reguligi la nivelon. *–EB 212*

**dinosaŭr/o** Kolektiva nomo de du ordoj mezozoikaj, ofte tre grandaj, rampuloj.

**dorlot/i** (tr) Agi kun iu tro kareseme kaj tro indulge. **~o-besto** Besto (plej ofte hundo aŭ kato) traktata kvazaŭ plena membro de homa hejmo.

**driv/i** (ntr) Flosi laŭ la puŝo de la fluo aŭ de la vento.

**ebri/a** Trinkinte tiom da alkoholaĵoj, ke la cerbo kaj muskoloj ne plu normale funkcias. **post~o** Kapdoloro, okazanta post la ~o.

**efelid/o** Brunaj makuleroj, observeblaj sur la nekovritaj partoj de la haŭto kaj kaŭzitaj de la efiko de suno kaj aero.

**ekip/i** (tr) Provizi iun aŭ ion per ĉio necesa por la difinita funkcio.

**ekran/o** **1** Mebleto uzata por ŝirmi sin kontraŭ ardo de fajro. **2** Lumbilda plato, uzata en instrumentoj kiaj televido, komputilo, radaro ktp. *–EB 29/41 kaj 230/50* Tie ĉi temas pri kombine telefon/televida aparato.

**ekskluziv/a** Tia ke ĝi ne akceptas ĉion aŭ ĉiun alian pro neakordigeblo.

**ekskvizit/a** **1** Tre malfacile trovebla pro havi ege purajn altkvalitojn. **2** Zorge elektita, genie desegnita, distingebla disde aliaj per senerara ellaboro aŭ per bela, genia, delikata aŭ komplika prilaboro.

**ekzalt/i** (tr) Tre eksciti, levante la sentojn ĝis alta grado de intenseco. **~iĝo** Ekstato de iu ~ita.

**empire/o** Ĉe la Helenoj, plej alta parto de la ĉielo, kiun ili kredis fajra sfero, loĝejo de la dioj.

**encefal/o** La tuto de la organoj, kiujn enfermas la kranio de la vertebruloj. **~grafa sensilo** Aparato por sensi la magnetajn kaj elektrajn kampojn kiuj estiĝas ĉe la cerbo dum oni sentas, pensas, emocias.

**enket/o** **1** Juĝa aŭ oficiala esploro. **2** Metoda esploro pri la okazaĵo aŭ opinio. **~i** ntr Fari ~on pri.

**enorm/a** Supermezure, eksternorme granda

**entrepren/i** (tr) **1** Komenci la plenumadon de grava tasko, kiun oni prenis sur sin. **2** Afero ~ita.

**eskal-ator/o** Meĥanika ŝtuparo memmoviĝanta. *–EB 256/22*

**faden/o** **1** Maldika, multege pli longa ol dika produktaĵo el kuntorditaj fibroj, uzata por kudrado, trikado aŭ teksado. *–EB 157/53* **2** Drato. **3** Sinsekva interligeco.

**faks/o** Mallongigo. Faksimilio: ekzakta reproduktaĵo de skribo, desegno. Tie ĉi temas pri ĵurnalo distribuata per telekomunika reprodukto.

**fantazi/o** **1** Krea imagipovo. **2** Kaprica sendirekta kaj senregula vagado de la imago.

**fazeol/o** Genro el herboj, el kiuj plej grava estas specio multe utiligata kiel legomo. *–EB 59/8*

**fe/o** Fabela estaĵo de malsupera rango, dotita per supernaturaj povoj. **~lando** Tie ĉi: kreaĵo el la imagkapablo.

**fenomen/o** **1** Tio, kion la senso aŭ menso rekte ekkonas, senpera objekto de percepto. **2** Natura aŭ eksperimenta okazaĵo, aparte rimarkita kaj klasigita.

**fetor/o** Tre malagrabla, naŭza odoro, kiel de putro kaj simile.

**filantropi/o** Amo al la homoj, bazita nek sur religia nek sur politika principo, kaj efektiviĝanta en praktika helpado.

**filik/o** Plurjaraj herboj kun rizomo kaj plej ofte kun tre dividitaj folioj. *–EB 361/16*

**filtr/i** (tr) Pasigi ion (likvon, gason, sonon ktp) tra penetrebla tavolo de dividiga materialo por eligi ion (plej ofte malpuraĵon) de ĝia enhavo.

**financ/o** Monaj rimedoj, pri kiuj dipsponas iu. **~i** (tr) ~e subteni.

**fiziolog/o** Sciencisto pri ~io. **~io** Scienco pri la normalaj funkcioj kaj ecoj de la organoj kaj histoj de la vivantaj estaĵoj.

**flagr/i** (ntr) Eligi lumon kun malstabila brileco, pro moviĝado.

**fojn/o** Matura herbo, kiun oni falĉas kaj sekigas ĉe la suno, por ĝin konservi kiel nutraĵon por la brutoj. **~kolora** Pale, hele flava. *–EB 65/35-43*

**fon/o** Efektive ebena aŭ pro malproksimeco ŝajne ebena parto, el kiu io elrelifiĝas aŭ elkontrastas.

**fontan/o** Konstruo kun speciala tubaranĝo, por alten ŝprucigi la akvon kaj tiel ornami placon, parkon, kaj simile. *–EB 257/21*

**forĝ-martel/i** (tr) Formi solidan metalon per ĝin frapi aŭtomate per martelego. *–EB 133/35*

**formul/o** Resuma simbola skribformo, esprimanta rezulton de algebra kalkulo aŭ scienca leĝo. **~aro 1** Kolekto da ~oj. **2** Presita unu- aŭ plurpaĝa dokumento, kiun la interesato devas mem plenigi, respondante al la demandoj tie ~itaj.

**fuzelaĝ/o** Ĉefa struktura korpo de aviadilo, al kiu adaptiĝas la aloj, empenoj, ktp. *–EB 225/47*

**gagat/o** Speco de nigra lignito uzata por juveloj.

**gal/o** Amara, verde flava likvaĵo, kontinue sekreciata de la hepato, kolektiĝanta en la ~a veziko.

**gardeni/o** Genro de tropikaj arbustoj kaj arboj plej ofte daŭrafoliaj, kun okulfrapaj, bonodoraj, blankaj aŭ flave blankaj dikpetalaj floroj; ŝatata butontrufloro.

**genetik/o** Scienco pri ĉiuj fenomenoj kaj problemoj rilataj al heredeco, ĉu normala, ĉu patologia.

**glace/a** Ricevinta apartan brilan aspekton per polurado aŭ glatigado.

**gland/o** Organo, kies funkcio estas produkti sekrecion, hormonojn, ktp.

**gong/o** Sonorilo el vertikale pendanta metala disko, kiu forte resonas sub frapoj. *PIV XXV/8*

**graci/a** Plaĉa pro ia diskreta, senpena kaj senpeza harmonio en la movoj, gestoj aŭ sinteno.

**greft/i** (tr) **1** Enigi vivantan parton de planto en alian planton, por ke ĝi fiksiĝu kaj daŭrigu sian kreskadon tie. **2** Enplanti sur individuon pecon el histo aŭ organo deprenitan aŭ de la sama individuo, aŭ de alia.

**grimac/o** Vola aŭ nevola streĉo de la vizaĝaj muskoloj, kiu misformas la trajtojn, donante al ili neordinaran kaj ofte ridindan aspekton.

**grum/o** **1** Ĉevalzorganta servisto. **2** Lakeeto, precipe en kafejoj.

**hant/i** (tr) Fantomi. En formo de fantomo, obsede vizitadi specifan lokon, plejofte tiun kie oni aŭ dumvive loĝadis aŭ murdiĝis.

**helikopter/o** Flugaparato, kiu ŝvebas kaj movas sin en la aero pere de rotoro. *–EB 83/47*

**hemoragi/o** Pli-malpli abunda sangelfulo pro vundo aŭ rompiĝo de sanga vaskulo.

**hepat/o** Grava organo de la vertebruloj, situanta ĉe la homo dekstre sub la diafragmo, rigardebla kiel la ĥemia laboratorio de la organismo. *–EB 22/10 PIV XVI D 7*

**hipotek/o** Garantia rajto, starigita laŭleĝe, super nemovebla havo kaj asimilitaj, por sekurigi al kreditoro repagon de sumo ŝuldata de la posedanto de tiu havo.

**his/i** Suprentiri per ŝnuro.

**horor/o** Sento de teruro miksita kun abomeno kaj signata de tremego aŭ elstariĝo de la haŭtharoj. **~a** Kaŭzanta ~on.

**hum/o** Plej supra, nigra aŭ bruna tavolo de tero, konsistanta el pli-malpli malkomponiĝintaj vegetaĵoj.

**iluzi/o** Eraro de sensoj, pro kiu oni rigardas falsajn ŝajnojn kiel realajn.

**implik/i** (tr) **1** Malfaciligi aŭ malhelpi la movojn de iu aŭ io, senorde ĉirkaŭvolvante fadenojn aŭ ĉirkaŭplektante malliberigilojn. **2** Malfaciligi, malhelpi la agadon de iu aŭ la efikon aŭ solvon de io per komplikaĵoj, senordaĵoj kaj konfuzaĵoj.

**inciz/i** (tr) Fari ~on en. **~o, ~ado** Metoda divido de molaj partoj per tranĉa instrumento; entranĉo.

**indig/o** Malhelblua koloraĵo, antaŭe ekstraktita el indigujo, nuntempe sinteze preparita.

**inerci/o** Eco de materio, pro kiu ĝi emas, kiam senmova, resti senŝanĝe tia, kaj, kiam moviĝanta, daŭrigi senŝanĝe sian movon.

**inĝenier/o** Homo, kiu per helpo de sciencaj metodoj kondukas kaj direktas teĥnikajn laborojn.

**inkandesk/a** Varmiĝinta ĝis blankarda stato.

**intervju/o** Interparolo, kiun ĵurnalisto havas kun bone konata persono, por demandi lin pri lia vivo, agadoj aŭ opinioj kaj raporti en gazeto.

**invent/i** (tr) krei, elpensi ion novan per la forto de la spirito.

**jad/o** Mineralo. Densa, polurebla variaĵo de amfibolo aŭ pirokseno, kun koloro varianta de la hela grizverdo ĝis la blanko, uzata en Oriento por etaj art-objektoj.

**ĵet-kub/o** Kubo kun aro da punktoj sur ĉiu flanko por monludi. *–EB 265/29*

**kaĉ/o** **1** Manĝaĵo, havanta aspekton de mola pasto kaj farita precipe el faruno miksita kun lakto aŭ el legomoj longe kuiritaj kaj duonlikvigitaj per akvo. **2** Malbone preparita manĝaĵo.

**kahel/o** Plato el bakita kaj glazurita argilo aŭ simila materialo, uzata por pavimi aŭ tegi. *–EB 260/35 & 41/51*

**kamera/o** Fotoaparato, kapabla sendi kaj/aŭ registri sinsekvajn bildojn, laŭ difinita ritmo, uzata por kinematografio, televido aŭ videoregistrado. *–EB 237/1*

**kamufl/i** (tr) **1** Maski militobjekton, donante al ĝi nerimarkindan aspekton. **2** Kaŝmaski.

**kanap/o** Salonmeblo, longa seĝo por pluraj personoj, kun dorsapogilo kaj remburita sidloko. *–EB 124/21*

**kanu/o** **1** Indiana pintfina, mallarĝa boato el arboŝelo, pelata per pagajo. **2** Simila boato el ligno aŭ metalo, uzata de sportuloj. *–EB 269/3*

**kapitulac/i** (ntr) Venkite transdoni sin kaj sian armeon aŭ fortikaĵon al la malamiko, sub precizaj kondiĉoj fiksitaj kune kun li.

**kapol/o** Multekosta konveksforma ŝtono, polurita, sed ne facetita.

**karot/o** **1** Dujara herbo kun multope dividitaj folioj havantaj lancetformajn pintajn lobetojn kun semoj surhavantaj rigidajn haregojn. **2** La manĝebla radiko de ~o. *–EB 59/17*

**katedral/o** **1** Episkopa preĝejo en diocezo aŭ eparkio. **2** Granda kristana preĝejo konstruita laŭ ia mezepoka stilo. *–EB 252/37; 317/1,22,42*

**kelt/o** Ano de antikva hind-eŭropa gento, kiu invadis la tutan Eŭropon, kaj fiksiĝis precipe en Gallujo, Kimruo kaj Irlando.

**kepr/o** Speco de ŝtofo, en kiu la veftofadenoj interkruciĝas oblikve kun la varpofadenoj.

**kermes/o** **1** Granda, publika, jara festo ĉe la datreveno de la konsekro de la loka preĝejo. **2** Simile granda kaj spektakla festego. **3** Granda parko enhavanta multajn diversajn amuzejojn. *–EB 291/1-67*

**kimr/o** Ano de ĉefgento loĝanta en Kimrujo, regiono en la okcidenta Britujo.

**klink/o** Tiu movebla peco de pordfermilo, kiu konsistas el metala dika lameno pivotfiksita ĉe unu fino.

**kned/i** **1** Premante kaj kirlante, miksi per la manoj ion por fari paston. **2** Premadi kaj prilabori per la manoj pastecan substancon, por doni al ĝi ian formon.

**kokos/o** Frukto de kokosujo. Genro de arboj, el kiuj la ĉefa specio estas arbo kun drupoj 1 kg pezaj enhavantaj grandan nukson, kiu utiliĝas kiel nutraĵo kaj produktas oleon, kaj kies interna kavo enhavas dolĉan sukon. *–EB 367/53*

**koktel/o** Miksaĵo el alkoholaj trinkaĵoj, siropoj, glacio ktp.

**kombine/o** **1** Virina subvesto, kombinita el ĉemizo kaj pantaloneto. **2** Vesto por aviadilisto, teknikisto, ktp, konsistanta el kombinitaj bluzo kaj pantalono.

**komiz/o** Helpa salajrulo, kiu prizorgas la vendadon en komercfirmao, al la kontoraferojn en banko.

**koncept/o** Abstrakta kaj ĝenerala ideo. **~i** (tr) Formi ~on.

**koncesi/o** Privilegia rajto, donita de ŝtato al alia ŝtato, al kompanio aŭ al privata persono, ekspluati teritorion, komercan entreprenon, kaj simile. **2** Kontrakto inter du kompanioj ke la dua ekspluatu teritorion per vendi varojn de la dua sub ties nomo kiel ties sola representanto. **3** Koncedo.

**konstrikt/i** (tr) Malplilarĝigi orificon aŭ kavaĵon de organo; malpligrandigi la kalibron de dukto aŭ de angio.

**kont/o** Komerca skriba kalkulo pri ŝuldoj aŭ havoj de aparta persono.

**kontrakt/i** (ntr) Interkonsenti per interŝanĝo de samcelaj deklaroj, por krei jurajn sekvojn. **~o** Tia interŝanĝo, kun kreo de juraj sekvoj.

**kontraŭ-valoroperda konto** Aparta konto de fabriko, rezervita kontraŭ tio ke la ekipaĵoj grade perdas sian valoron pro maljuniĝado ĝis eventuala tempo kiam ili devas esti anstataŭigitaj per iuj pli novaj.

**kor/o** **1** Korpa organo pumpanta la sangon. **2** La plej interna parto de io.

**kretace/o** La tria kaj lasta epoko de la mezozoika epoko.

**kvarc/o** Tre ofta mineralo, amorfa aŭ kristaliĝinta en heksagonaj prismoj, kaj konsistanta el pura silicia oksido $SiO_2$.

**lake/o** **1** Hejma servisto ĉe riĉuloj, ordinare portanta livreon. 2. Humilaĉa homo sen memestimo.

**laktuk/o** Genro de unu-, du-, kaj plujaraj herboj, el kiuj pluraj specioj estas gravaj salatplantoj. *–EB 59/36,37*

**lard/o** Grasa substanco, entenata en la subhaŭta histo de la dorso aŭ flanko de porko, uzata en kuirado kaj farmacio. Tie ĉi: insulta moknomo pri homa graso.

**cerebr/o** ❤ (latinlingve: cerebrum) La supra parto de la encefalo, kun siaj hemisferoj kaj pedunkloj: la cerebro estas la centro de la sensado, de la volaj movoj kaj de la psika aktiveco. Sin. cerbo.

**laŭr/o** Ornama arbo kun ledecaj, larĝe lancetformaj folioj, spice odoraj, sur mallongaj, ruĝecaj petioloj, kaj kun flavblankaj floroj monoikaj. *–EB 312/60*

**magi/o** Tuto de la procedoj kaj ritoj, per kiuj la operacianto kredas povi efiki sur la okultajn fortojn de la mondo kaj obeigi ilin al la homaj deziroj.

**magnezi/o** Elemento, atomnumero 12, atompezo 24,3; blanka, malpeza metalo, kiu inkandeske brulas en aero,

kombiniĝante kun oksigeno, Mg.

**magnoli/o** Genro de arboj kaj arbedoj, kun elipsformaj, ebenrandaj, ofte ledecaj grandaj folioj kaj eksterordinare grandaj, unuopaj, blankaj, rozkoloraj aŭ purpuraj floroj. *–EB 357/15,16*

**makabr/a** Terurelvoka, mortrikana.

**malakit/o** Kupra hidrokarbonato, konsistiganta belan verdan polureblan ŝtonon, uzatan por fari juvelojn, ornamajn vazojn, ktp. $(CuOH)_2CO_3$

**mani/o** Fortega nenormala konstanta inklino al io.

**manpilkad/o** Europa ludo, iom simila al la futbalo, sed ludata per la manoj. Alia popoluara nomo: handbalo. – *EB 275/18*

**marasm/o** Malsaneca ekstrema malgraseco kaj senvigleco.

**marĉand/i** (ntr) Diskuti pri la prezo de io, por aĉeti ĝin pli malkare.

**marmor/o** Kristaliĝinta polurebla kalkŝtono, ofte enhavanta kolorajn vejnojn, uzata en konstruado kaj skulpturo. – *EB 261/12* **~floro** fikciaĵo.

**masiv/a** **1** Konsistanta el densa, senintermanka materio; ne havanta malplenaĵojn. **2** Peza pro sia denseco, kompakteco.

**medol/o** **1** ❤ (medulla) Pulpeca mola substanco, pli-malpli grasa, pli-malpli sangabunda, entenata en ĉiuj kavaĵoj de la osta histo. ☞ kerno, suko.
**2** (evi) = mjelo.
**3** Interna parto de organo, kontraste al ĝia kortiko: medola substanco de la surrena glando. Pri la cerbo, tiu parto latinlingve nomata 'medulla oblongata'.

**membran/o** Maldika hista lameno, teganta iujn vegetalajn aŭ animalajn organojn. *–EB 75/53*

**ment/o** Genro de plurjaraj herboj kun duope kontraŭesidantaj folioj, malgrandaj, violkoloraj floroj havantaj kvar longajn stamenojn; kun akra, spica bonodoro; la eteraj oleoj estas utiligitaj por produktado de diversaj farmaciaĵoj, likvoroj kaj aliaj. *–EB 364/3*

**metafizik/o** Parto de la filozofio, kiu studas la unuajn kaŭzojn kaj principojn de ĉio, kiuj estas neesploreblaj per la metodoj de la pozitivaj sciencoj.

**meteor/o** Malgranda maso da materio, rapide envenanta el la ĉielaj spacoj, fariĝinte luma pro la rekonto kun la tera atmosfero.

**mien/o** Esprima aspekto de la vizaĝo kaj de la sinteno.

**mimoz/o** Genro de herboj, arbustoj, arbedoj kaj arboj el varmaj regionoj, kun ordinare duoble pinataj folioj kaj globformaj kapoj el malgrandaj, blankaj aŭ helruĝaj floroj.

**miniatur/o** Tre malgranda ekzemplero de arta objekto, delikate prilaborita.

**miriad/o** Grandega, nedifinita nombro.

**mitul/o** Genro de malgrandaj moluskoj el la klaso de lamenbrankuloj, kun blua, ungopinta konko, kies ordinara specio estas manĝebla. *–PIV XIV/26*

**modif/i** (tr) Ŝanĝi la formon, unu el la ecoj de io, ne tuŝante la esencon.

**modul/i** (tr) **1** Variigi, nuanci la voĉon. **2** Infuli altfrekvencan oscilon aŭ kurenton.

**moroz/a** Malgajhumora.

**mozaik/o** Desegnaĵo aŭ pentraĵo, kunmetita el diverskoloraj formtranĉitaj ŝtonetoj aŭ lignaj pecetoj, por ornami.

**muld/i** (tr) Reprodukti objekton, enpremante moligitan materialon en ujon, kiu havas la deziratan formon. *–EB 154/15*

**musk/o** Klaso de herboj kun malgrandaj, foliecaj, ofte tufiĝantaj tigoj, mallarĝaj folioj dense sidantaj, kaj sur la pintoj de la ŝosoj kun krucformaj sporujoj. Ofte trovata ĉe subo de arbo, sur la flanko for de l' suno. *–EB 361/17*

**narkot/i** (tr) Meti en staton de ĝenerala anestezo, tio estas de artefarita dormo kun malpliiĝo de unu aŭ pluraj funkciaj aktivecoj. **~a** Estiganta tian dormon.

**naŭz/i** (tr) **1** Kaŭzi vomenon. **~o** Malagrabla sento de l' vomonto.

**nav/o** Tiu parto de preĝejo, kiu etendiĝas de la pordego ĝis la ĥorejo, inter du paralelaj muroj aŭ kolonaroj. *–EB 316/62*

**nefr/o** Grekdevena scienca vorto, signifanta: reno **~ito** Rena inflamo.

**nekroz/o** Morto de iu histo.

**nom-um/i** (tr) Difini por iu posteno, ofico, rango.

**obsed/i** (tr) Premokupi la spiriton; trude ekkapti la atenton (precipe pri fiksita ideo).

**odor-sal/o** Karbonato de amonio. Ellasata de eta ampolo rompita sub la nazo de ĵus malkonsciiĝinta homo, la ege pika amonia odoro havas tuje revekan efikon.

**opal/o** Variaĵo de kvarco kun iom da akvo, lakteblanka aŭ blueta kun ŝanĝkoloraj rebriloj, kaj tial uzata kiel juvelŝtono.

**organik/a** Rilata al la karbonkombinaĵoj. La ĥemio de vivantaj sistemoj.

**palm/o** Iu ajn ~aco. **~acoj** Familio el unukotiledonaj plantoj, de arboj ĉefe tropikaj kaj subtropikaj, kiuj sur pli-malpli alta senbranĉa trunko portas aron da grandegaj mane aŭ plume dividitaj folioj. *–EB 367/48,54 368/1*

**parazit/o** **1** Tiu, kiu kvazaŭ profesie manĝas konstante ĉe fremda tablo, flatante aŭ distrante la gastiganton. **2** Nenionfaranto, kiu ekspluatas la laboron de aliaj.

**pasiv/a** **1** Montranta ke la subjekto ricevas la efikon de la ago, kiu estas signifata de la verbo kaj farata de iu aŭ io alia ol la subjekto. **2** Montranta nenian iniciatemon, interesiĝon. **3** Uzanta, por atingi sian celon, nenian kontraŭagon aŭ rebaton.

**pat/o** Malprofunda senkovrila kaserolo kun longa tenilo, servanta por friti. *–EB 42/41*

**pavilon/o** **1** Granda, luksa tendo. **2** Izola konstruo sur tereno, ĝardeno aŭ korto, dependanta de pli granda kaj ĉefa. *–EB 54/2; 55/14*

**pervers/a** Inklina al malbonfarado. **~eco** Psika perturbo de la morala sento, konsistanta en la plezuro malbonfari kaj en la ĝojo malutili kaj malami.

**per-forta** Trudata per forto.

**pigr/a** Mallaborema, malpenema.

**pilastr/o** Prisma kolono, plejofte enigita en muro. *–EB 317/46*

**plaĉ-um/i** Plenumi peton, aŭ ŝajnigi konsenton, kontraŭ propra malsamvolo por eviti malbonreagon, malŝparon de laboro, nekonvenan tempoprenon.

**plane/o** Tiu aloforma parto de aviadilo, kies funkcio estas produkti levadon aŭ ŝvebadon

**poker/o** Usondevena hazarda monludo per kartoj aŭ per kubetoj.

**pomad/o** Medikamenta aŭ kosmetika ŝmiraĵo. *Tie ĉi, temas pri harar-ordiga ŝmiraĵo.*

**porfir/o** Rokspeco, havanta plimalpli grandajn kristalojn en etgrajna maso.

**portik/o** Galerio, kiu malfermiĝas, almenaŭ unuflanke, per kolonaro. *–EB 316/50,56*

**potencial/o** **1** = tensio, tensifalo. **2** Skalara grando, kies rilatumo de ŝanĝo en difinitaj direktoj (kun kontraŭa antaŭsigno) destinas la komponentojn de la kampo en la koncerna direkto.

**poz/i** Preni kaj teni specialan teniĝon, por esti desegnata, pentrata, fotografata. **2** Alpreni, pli-malpli konscie, tian teniĝon, piu povas impresi la homojn.

**precedent/o** Pasinta fakto, kiu pravigas analogan okazan fakton.

**prevent/i** (tr) Antaŭmalhelpi.

**proced/i** (ntr) Uzi difinitajn rimedojn por efektivigi ion. **~o** Agmaniero, aplikota por atingi difinitan rezulton.

**projekci/o** **1** Ĉiu el la diversaj metodoj, uzataj por prezenti sur ebena surfaco parton aŭ tuton de la tera aŭ ĉiela sfero. **2** Luma bildo, sendata sur pli-malpli proksiman ekranon per speciala lanterno. *–EB 295/1-25*

**promoci/i** (tr) Altigi al iu pli alta grado, ofico.

**propuls/i** (tr) Antaŭen-peli.

**psik/o** Tuto de la konsciaj kaj nekonsciaj spiritaj fenomenoj, rigardata kiel objekto de scienca esploro, t.e. sen ia hipotezo pri ties esenco. **~manka** Tie ĉi: cerbo tia, kia komputilo sen programoj.

**psikiatr/o** Kuracisto de la mensaj malsanoj. **~io** Parto de la medicino pri la mensaj malsanoj kaj ilia kuracado. **~ia** Rilata al ~io.

**psikosomat/a** Rilata al la interagado de la menso kaj emocioj kaj la korpo.

**psikoz/o** Mensa malsano, karakterizita de la perturbo de la tuta personeco, kies rilatoj al la realaĵoj estas plene konfuzitaj. Tie ĉi: tia kredo de ŭlo, ke li regu la universon.

**pterodaktil/o** Genro de relative malgrandaj, mallongvostaj flugsaŭroj el malfrua ĵurasio, eltrovitaj en Eŭropo. pteranodonto, ramforinko. *–PIV I/40*

**pugn/o** Mano kun fleksitaj kaj kunmetitaj fingroj. Tie ĉi temas pri la elstaraj partoj de l' artikoj, per kies suproj oni batas. **latuna ŭmo** Unupeca batilo muldita el metalo (plej ofte latuno) kun kvar truoj tra kiuj oni enmetas la fingrojn.

**pul/o** Malgranda insekto, senflugila, salteganta, suĉanta sangon. *–EB 341/30*

**pulp/o** **1** La mola, sukoplena parto de fruktoj kaj radikoj kaj la medolo de iaj tigoj. **2** Kunteniĝanta maso de mola, nesolvita, planta materio, precipe tia materio post elpremado de la akvo. **3** Mola aŭ duonmola histo, el kiu konsistas kelkaj organoj.

**puls/o** Batado de la arterioj, kaŭzata de la sangofluo.

**pupil/o** Aperturo en mezo de iriso, tra kiu la lumradioj penetras en la okulon. *–EB 21/43*

**raket/o** **1** Arta fajraĵo, kiu pafiĝas per fuzaĵo en la aeron kaj tie eksplodas. **2** Spacpafaĵo, uzanta fuzaĵon kiel pelrimedon. **~boato** Veturilo trapasanta la kosmon per raketa motoro. *EB 229/144*

**rankor/o** Obstina malpardonemo, venĝema resento.

**reaktor/o** Aparato produktanta la antaŭenmovon de aviadilo, sen helpo de helico, per senpera reakcio. *–EB 3/12*

**recidiv/o** Reapero de la sama malsano ĉe unu indiduo.

**refleks/o** Movo, sendependa de la volo, estigata kiel nevola respondo al nervostimulo. Ekzemple: la genuo refleksas je

frapo de kuracista marteleto..

**rego-disk/o** Diskforma plato, ofte kun eta elstara anso en meze, kaj gravurita ĉirkaŭ ĝia rando per aŭ ciferoj aŭ streketoj, kaj turnata fingre por regi aparaton.

**rendiment/o** Raporto inter la utila laboro ricevita de maŝino kaj la energikvanto elspezita.

**rikan/i** (ntr) Ridaĉi kun malico.

**rokok/o** Franca arĥitektura kaj ornama stilo, kiun karakterizas kapricaj volutoj kaj densaj delikataj ornamaĵoj. – *EB 318/13*

**ruĵ/o** ruĝiga ŝminko.

**safir/o** Blua diafana variaĵo de korundo, uzata kiel juvelŝtono, $Al_2O_3$.

**salat/o** Manĝaĵo konsistanta el freŝaj aŭ boligitaj herboj aŭ legomoj spicitaj per salo, vinagro kaj oleo.

**sardon/a** Epiteto de speciala rido. **1** Ŝajna rido de iu kies vizaĝaj muskoloj estas kuntiritaj. **2** Amara, sarkasma rido. **3** Esprimanta mienon de sarkasma amuzo.

**scintil/i** (ntr) Brili, lumetante de tempeto al tempeto kiel stelo tra la atmosfero.

**sek/a** **1** Enhavanta neniom aŭ malmulte da akvo. **2** Perdinta sian naturan akvon. **3** Senkompata, nesimpatia, sensenta, malvarma.

**selakt/o** Verdeta acideta likvaĵo, restanta el la lakto post apartigo de kremo.

**senil/a** Debila pro maljuneco.

**seps/a** Tia, ke ĝi povas kaŭzi inflamon, infekton aŭ putriĝon. anti~o Metodo, laŭ kiu oni detruas la infektantajn mikrobojn per ĥemiaj substancoj.

**servil/a** Aĉe servema, sklave komplezema. **~isto** (ĵargonaĵo, iom insulta) servila sublaboristo.

**silk/o** **1** Delikata kaj brila fadeno, sekreciita de la raŭpo de bombikso. **2** Teksaĵo, farita el tiuj fadenoj. – *EB 33/32, 34/54, 342/50*

**sinkrotron/o** Maŝino simila al ciklotrono, sed kun sekciigita kava ringo, anstataŭ du D-formaj partoj, kaj kun variigata magneta kampo. –*EB 2/49*

**sintez/o** **1** Operacio, per kiu multeco estas reduktita al unueco, per kombinado aŭ kunigo. **2** Operacio, per kiu, kombinante elementajn komponantojn, oni ricevas novaspecan produkton, kun apartaj ecoj.

**skan/i** (tr) Sisteme kaj tute ekzameni. Esplori per aparato elsendanta energion kaj mezuranta la ŝanĝetojn en ĝia kampo. Ekzemple: fari mapon per radaro aŭ sonaro. Tie ĉi: fari tridimensian mapon de nervosistemo per elektromagneta aparato.

**smerald/o** Ĝemo el duobla aluminia kaj berilia silikato, kies koloro varias de la bluo al la herboverdo. **~kolora** Plejofte signifas pri profunde brila verdeco.

**solen/a** **1** Farata laŭ ĉiuj sanktaj ritoj aŭ ĉiuj etiketaj reguloj. **2** Serioze impresanta, efekte malrapida en sia movo aŭ ago.

**solipsism/o** Doktrino, laŭ kiu la unu sola ekzistanta realo estas konscio de la ekkonanta homo.

**soliv/o** Trabo, kies ekstremoj kuŝas sur la muroj, kaj kiu servas por porti la plankon de supera etaĝo. –*EB 115/38*

**sombr/a** Donanta la impreson de profunda melankolio.

**sorĉ/i** (tr) **1** Ĵeti ~on sur. **2** Ravi per ia neracia, nerezistebla logo.

**spasm/o** **1** Nevola kontrahiĝo de muskolo aŭ muskolgrupo. **2** Konvulsia kontrahiĝo de la visceraj muskoloj. **~a** Prezentanta ~ojn. Tie ĉi: havanta la samajn kvalitojn de nevoleco kaj neprognozebla subiteco kiel spasmoj.

**spontane/a** **1** Fariĝanta, okazanta sen ia ekstera videbla kaŭzo. **2** Meminicianta, sen ekstera instigo.

**strab/i** (ntr) **1** Ne povi direkti ambaŭ okulojn al unu sama punkto. **2** Rigardi de flanke, kun malica aŭ envia intenco. **3** Rigardi kun la palpebroj mallarĝigitaj (dum cerbumi) al imagbildo anstataŭ al la vera mondo.

**strangol/i** (tr) Sufokpremi al iu la gorĝon.

**studi/o** Tuto de la laborejoj necesaj por produkti filmon, televidaĵon, ktp, konstruitaj en unu difinita loko kaj apartenantaj al unu sama firmao. *–EB 237/111*

**sukcen/o** Malmola flava diafana fosila rezino, en kiu foje troviĝas praa insekto kaj el kio oni faras ornamaĵojn.

**surf/o** Ŝaŭmo kaj tumulto de maraj ondoj, kiuj rompiĝas sur borda sablaĵo aŭ rifo kaj fortege retroiras.

**svarm/i** (ntr) **1** Grandamase interpuŝe movetiĝi kaj skuetiĝi ĉiuflanken. **2** Esti tre multnombra. Ekzemple: kiel abeloj atakantaj enrompinton de sia nesto.

**svelt/a** Harmonie aŭ elegante maldika.

**ŝlos/i** (tr) Fermi per seruro. **~ilo** **1** Metala peco servanta por formi kaj malfermi seruron. **2** Malhelpi ies eliron. **3** La plej supera ŝtono en arĥo. **4** Tio, kio ebligas kompreni ion kaŝitan aŭ malklaran.

**ŝmir/i** (tr) **1** Froti sur ion maldikan tavolon da grasa aŭ algluiĝanta substanco. **2** Faciligi glitadon de ilo, funkciadon de maŝino, surmetante grasan substancon. **3** Kaŝe aĉeti informon, servicon, kaj simile, per sekreta pago.

**ŝpin/i** (tr) Tiri fibrojn el fibro-amaso kaj kuntordi ilin en fadenon.

**tambur/o** Muzika instrumento, konsistanta el malplena cilindro, kies ambaŭ bazaj flankoj estas fermitaj per du maldikaj streĉitaj folioj el ledo, kiujn oni frapas. *–EB 303/47-49,55,58*

**tantal/o** Elemento, rara metalo, kun atompezo 180,88 kaj atomnumero 73, Ta.

**tenden/o** Blankeca, fibreca muskolekstremaĵo, kiu alligas la muskolon plej ofte al osto. *–EB 20/48*

**teras/o** Alta ebena teramaso, subtenata per masonaĵo kaj aranĝita en ĝardeno por ĝuigi belvidon aŭ faciligi promenadon.

**toast/o** Rostita pantranĉo.

**tonal/o** Skalo, akordoj kaj tonrilatoj, grupiĝantaj ĉirkaŭ toniko kiel bazo de muzikaĵo.

**trakt/i** **1** Diskuti pri la kondiĉoj de iu afero, por finveni al interkonsento. **2** Tia- aŭ alimaniere agi, konduti kontraŭ iu aŭ io.

**transform-ator/o** Ilo por interŝanĝi altecon de elektra tensio kontraŭ relativa kurento, ordinare per paro de malsamlongaj dratoj multe volvitaj ĉirkaŭ komuna akso el feraj lamenoj. *–EB 146/39*

**turnir/o** **1** En mezepoko, kavalira festo, en kiu du kirasitaj rajdantoj vetbatalis per malakrigitaj armiloj. **2** Ĉia amika konkurso pri lerteco, kiu ne donas okazon al atribuo de titolo.

**ulul/i** (ntr) Bleki kiel noktaj rabobirdoj.

**unik/a** Sola laŭ sia kvalito: ne havanta alian egalan aŭ similan.

**vad/i** (ntr) Paŝi en akvo aŭ en mola substanco, koto, neĝo, sablo ktp. *–EB 258/10*

**vaks/o** Palflava substanco, algluiĝema kaj knedebla, sekreciata de abeloj kiel materialo de iliaj ĉeloj. **~i** (tr) Ŝmiri per ~o.

**Valenten/o** Sanktulo, kies feston (la 14-a de februaro) celebras geamantoj per sendi ĉokoladojn, kaj kartetojn por deklari la amon.

**valv/o** Ĉia movebla peco, destinita enlasi likvon, vaporon, aŭ gason en tubon, ujon kaj similajn, aŭ por reguli la kvanton aŭ direkton de ĝia tralasiĝo. *–EB 40/73*

**veld/i** (tr) Kunfiksi du metalajn pecojn, ardigante ilin tiel, ke la junto fariĝas flueca, kaj poste kunforĝante ilin kiel unun, aŭ samtempe almetante fanditan metalon en la junton. *–EB 135/128*

**ventol/i** (tr) Refreŝigi la aeron en fermita spaco, produktante aerondon aŭ enblovigante eksteran aerfluon. *–EB 112/17*

**verŝ-tablo** Ĉe taverno, tablo por prepari drinkaĵojn. *–EB 260/1-11*

**verv/o** Inspira, fervora, vigla maniero de verkado, parolado, pentrado, komponado.

**vestibl/o** Enira parto de domo, konstruo kaj cetere, tra kiu oni atingas la ĉambrojn. *–EB 259/1-26*

**vivisekci/o** Operacio, praktikata sur vivanta animalo por studi la fiziologiajn fenomenojn.

**volut/o** Spiralforma ornamaĵo.

**volv/i** (tr) Plurfoje rondmeti ion flekseblan ĉirkaŭ io alia. **dis~i 1** Etendi plata ion ~itan. **2** Iom post iom kreskigi, evoluigi, doni pli grandan forton aŭ vastecon aŭ prilaboritecon.

**zigurat/o** Grandega turo, kun ŝtupoj, ordinare sep, ĉiu pli malvasta ol la malsupra, servanta kiel templo en Babilonio. *–EB 315/32*

**stelo** Popola diraĵo, indikanta pri pika aktiveco rezulte de maljuneco.

# Atribuoj

La medio estanta elektronika, perioda reeldonado kostas nenion krom tempo. Sekve atendu postajn eldonojn de tiu ĉi libro se volontulus novaj kontrolistoj, ilustristo, ktp. Iliaj nomoj enlistiĝos sube laŭ ordo de tempo. En la listo, kie mankas indiko pri lando, tio okazis en Usono.

**Verkis:**
Jack Vance (1916-2013)
Anglalingva titolo: *Chateau d'If*
**Permesis:**
Jack & Norma Vance *(inter 1997–2013)*
John Vance & Spatterlight Press *(post 2013)*
**Tradukis:**
Ĝan Ŭesli Starling *— Usono*
Jan Pospíšil *— Ĉeĥio*
**Kontrolis:**
Orlando Hernández *— Hispanio*
*Pluaj kontrolistoj invitiĝas — Ĉu eble vi?*
**Ilustris:**
Rogério Mota *— Brazilo, la kovrilon*
*Interna ilustristo invitiĝas — Ĉu eble vi?*

Se vi volas kontribui per ilustri aŭ per plue kontroli, kontaktu epoŝte: gan@starling.us

Helpis ankaŭ la sube listitaj referenciloj. Se vi ne povas kontribui al nia projekto per kontroli aŭ ilustri, bonvolu pripensi monan donacon al unu el ili.

html **Vortaro** *— reta vesio de PIV*
html **Lingvohelpilo** *— projekto de E@I kaj ESF*

# Senpage Haveblaj

http://esperanto.us

ATOM

## Fantasto — *La Mortanta Tero*

**Mazirien la Magiisto**
: Ses interligitaj noveloj pri la fintempo de la Tero, kiam magio superas ol scienco post ol la luno delonge malaperis kaj eĉ la suno mem ŝvelas ruĝe montante makulajn signojn de baldaŭa mallumiĝo.

**Kugel La Ruza**
: Sep sin-sekvaj noveloj formantaj la duan volumon el la serio 'La Mortanta Tero'. Rakontaro en kiu humore krulea magiisto devigas friponan anti-heroon al grandega aventuro ĉe la fora flanko de l' mondo por plenumi nefareblan mision La aventuroj de Kugel la Ruza iom ŝokas kaj tre amuzas, ambaŭ samtempe.

**Kugel: la Ĉielorompa Ŝpruclumo**
: Plua aventuro de Kugel la Ruza. Refoje li devas transpaŝi la mondon devigita de magiisto al ankoraŭ plua nefarebla misio.

## Scienca Fikcio — *Diversaj*

**Trigamba Joĉjo**
: Sur planedeto senaera du junuloj alfrontas beston nevenkeblan.

**La Luna Sfingo**
: En kulturo kie ĉiuj portas maskojn, ĵus alveninta diplomato ĉasas murdiston.

**Domo de l' Se**
: Post respondi al reklmao pri aventuro, viro ekfrontas multon pli ol antendite.

**Retretejo Ulvarda**
: Kiam surtere estas 50 miliardoj da homoj, ĉu izoleco dezirindas pli ol ĉio?

Tiu ĉi Esperanta traduko *Domo de l' Se* verkita de Jack Vance disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Nekomerce-Nemodifite 4.0 Tutmonda

La permesilo temas sole pri tiu ĉi Esperanta traduko. La permesilo temas neniel kaj neniom pri la originalo kies ĉiuj rajtoj daŭre apartenas al John Vance kaj Spatterlight Press.

